

Chico Xavier
de la Spirito Emmanuel

La Konsolanto



Kolekto Emmanuel



Francisco Cândido Xavier
(Mediumo)

La Konsolanto

Diktita de la Spirito
EMMANUEL



El la portugala lingvo tradukis Esperanten:
Benedicto Silva



Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL e GRÁFICO
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040
Rio de Janeiro, RJ – BRAZILIO

1ª. Eldono en Esperanto

6000 ekzempleroj

Kovrilo de CECCONI

El la portugala lingvo tradukis Esperanten:

Benedicto Silva

73 - AA; 001.6-O; 3/1977

Copyright 1975 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(Brazila Spiritisma Federacio)

SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte

Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

*Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de
Presejo de la Eldona Fako de FEB*

Rua Souza Valente, 17

20941-040 – Rio de Janeiro – RJ – Brasil

C.G.C. nº 33.644.857/0002-84 IE. nº 81.600.503

PRESITA EN BRAZILIO

Impreso no Brasil

TABELO DE LA ENHAVO ⁽¹⁾

<i>KLARIGO</i>	19
UNUA PARTO	
SCIENCO	21
Spiritismo kaj bezono de Scienco.	
I - <i>FUNDAMENTAJ SCIENCOJ</i>	21
Pozicio de la vivoscienco.	
KEMIO	22
La spiritalaj fortoj kaj kampo de la Kemio. — Originfonto de la Elementoj. — Movoj de Brown. — Bazo de la organa karaktero. — Progreso de la kemia individuigo. — Biologia kaj industria ke- mio. — Radioaktiveco. — Fonto de energio. — Ne- nio kreigas, nenio perdiĝas. — Diverseco de la organaj karakteroj. — Atmosfero de la mondo. — Termika morto de nia planedo.	
FIZIKO	26
Plenumiĝo de la fizikaj leĝoj. — Konvenciaj ba- zaj. — Nuntempaj Scioj de la Fiziko. — La Fizi- ko kaj la ekzisto de Dio. — La nocioj de la homo.	

⁽¹⁾ La frazoj metitaj sub la titolojn kaj subtitolojn montras la naturon de la temoj pritraktitaj en la demandoj kaj respondoj de la teksto.

— La etero. — La Fiziko kaj la evoluplano. — Substanco. — Leĝo de ekvilibro kaj leĝo de fluidaĵoj. — Leĝoj de gravito. — Teledinamismo ĉe la interrilatoj inter la du sferoj. — Kompreno pri la magnetismo.

BIOLOGIO	30
<p>Naturo. — Manifestiĝoj de la vivo. — La Spirito kaj la homa embrio. — Organoj en la spirita korpo. — Komenco de la reenkarniĝo. — Interpenetro de fluidaĵoj inter la gravedulino kaj la Spirito. — Relernado. — Genealogia arbo. — Genetiko. — La genetiko kaj la pliboniĝo de la homo. — Kombino de genoj. — Mendelismo. — Teratologiaj monstroj. — La fekundeco kaj la sterileco. — Ideo pri evoluo.</p>	
PSIKOLOGIO	35
<p>Sperto de la materiaj sentumo. — La Psikologio sur la vojo al la vero. — Ĉe la studado de la mensaj malordoj. — Psikanalizo. — Asociiĝo de ideoj. — Kontraŭaj opinioj. — Sidejo de la intelekto. — La sonĝo. — Inklino. — Frenezeco. — Halucinacio. — Influo de la bonaj kaj malbonaj pensoj.</p>	
SOCIOLOGIO	39
<p>Patrujo. — Malegaleco. — Koncepto pri absoluta egaleco. — Proletaj demandoj. — La ŝtato kaj la armeoj. — Spiritismo kaj Sociologio. — La spiritistoj kaj la politiko. — Rasismo. — Ne mortigu. — Ne juĝu. — Kriminalaj procesoj. — Respondeco ĉe la publikaj oficoj. — Evangelia abnegacio. — Feminisma movado. — Nuntempa maltrankvileco.</p>	
II - <i>ABSTRAKTAJ SCIENCOJ</i>	46
<p>Pozicio de la abstraktaj sciencoj</p>	
III - <i>SPECIALAJ SCIENCOJ</i>	47
<p>Konkero de la homa spirito. — Pozicio de la Tero.</p>	

— Malsuperaj sferoj. — Homaro. — Ebleco de interplanedaj vojaĝoj. — Fluidaj kondiĉoj. — Meteologiaj fenomenoj. — La Spiritoj kaj la Botaniko. — Zoologio. — Parenceto de la homo kun la bestoj.

IV - <i>KOMBINITAJ SCIENCJOJ</i>	50
Klopodoj de la homo. — La historio de la surtera civilizacio en la spirita sfero. — Eraraj juĝoj. — Respondeco de la historiisto. — Kanonizo kaj spirita realaĵo. — Unuaj planedaj formoj. — Evoluaj stadioj de la Tero. — Elementoj de formado. — Geologiaj skuoj. — Sciigoj en la sanktaj skriboj.	

V - <i>APLIKATAJ SCIENCJOJ</i>	54
Laborkampo. — Inspiroj el la supera sfero. — La terkulturisto. — La inĝeniero. — La surtera medicino. — Sano. — La malsano kaj ĝia psika kuracado. — Aplikado de la homaj rimedoj. — La emanaĵo. — Fluigo de emanaĵo. — La “sorĉkuracado”. — Nekuraceblaj fizikaj malsanoj. — Agado de la amikaj spiritoj sur la mikroban flaŭron. — Magnetizita akvo. — Kondiĉoj de la spirita helpo. — La medicina konsilo de spirita amiko ne estas neerarema. — Eŭtanazio. — Spiritisma hospitalo. — Bazo de la edukmetodoj. — La infanaĝa periodo. — La plej bona lernejo de preparado. — Seksa edukado. — Renovigo de la edukaj procedoj. — Devoj de la spiritistaj gepatroj. — Direktata ekonomio.	

DUA PARTO

FILOZOFIO.....	65
Interpretado de la Filozofio.	

I - *VIVO*

LERNADO.....	65
La homo kaj lia pasinteco. — Intelektio. — Inter-	

na posedaĵo. — Pluigo de kapablo. — Intelektu kaj sento. — Medio. — Intuicio. — La kredantu kaj la altrudoj. — Homa parolo. — Obstakloj al la supera inspiro. — Vibroj de la bono kaj de la malbono. — Korpo sana kaj menso sana. — Vivo de la besto. — Nutreraro. — Sanktigo de la sabato.

SPERTO..... 70

Akiro de sperto. — Samtempaj determinismo kaj libera volo. — Interna libereco. — Modifo de la determinismo. — Bono kaj malbono. — Absoluta determino. — Vigleco pri la libereco. — Ebleco de eraro. — La cirkonstancoj. — Influo de la astroj. — Influo de la nomoj. — Numerologio. — Kaŝita influo de objektoj. — Antaŭavertaj fenomenoj. — Kartaŭguro kaj Spiritismo.

TRANSIĜO..... 76

Momento de la morto. — Ŝanĝoj. — Unuaj tempoj de la homo en la Transtombo. — La reenkontiĝo kun la amataj estuloj. — La spiritistoj ĉe konsterniteco pro morto. — Kremaciado. — Akcidenta morto kaj natura morto. — Minacoj kaj danĝeroj. — Unuaj impresoj de la memmortigitoj en la Transtombo. — Timo antaŭ la morto. — Ĝojo de la elkarniĝintoj. — Kapabloj de la spiritoj. — Persekutoj el la Nevideblo. — La persekuto kaj niaj Gvidantoj. — Karakteroj de la elkarniĝintaj Spiritoj.

II - SENTO

ARTO..... 83

Arto. — La artisto kaj lia misio. — Eduko de la artisto. — La genio. — La psikismo de la artistoj. — Rememoroj el la Senfino. — La grandaj muzikistoj. — La elkarniĝintaj Spiritoj kaj la artaj valoroj. — Disciplino de la emociiĝemo. — La

genio kaj la malbono. — Arta pliriĉiĝo de perso-
no. — Antikva kaj nova artoj.

ALLIGITECO	88
Simpatio kaj antipatio. — Amikeco. — Sistemo de familio. — Spiritaj familioj. — Spiritita estro. — Afineco en la nevidebla sfero. — Manifestiĝoj de alligiteco. — Kolero. — Konscienciproĉo. — Ĵaluzo. — Memedukado pri seksaj problemoj.	
DEVO	93
Bonfaro. — Hazardo. — Fava menskonduto. — Geedzaj devoj. — Devoj de la surteraj patrinoj. — Nekorekteblaj infanoj. — Agado de la gepatroj sur la Tero. — Mensogo. — Malkaŝa vero. — Spiritita helpo. — Interna klarigo. — La spiritaj amikoj kaj la plendoj de la kredantoj.	

III - *KULTURO*

RACIO	98
La surtera kulturo en la spirita sfero. — La racio- nalismo kaj la evoluo de la Tero. — Racio kaj fido. — Deturnoj de la homa racio. — Scienco kaj filo- zofio. — Limoj al la racionalismo. — Fieraj ra- cionalistoj.	
INTELEKTISMO	101
Morala kaj intelekta progresoj. — Intelekta kapa- blo de la homo. — Nuntempa intelekta pozicio de la Tero. — Intelekta dekadenco. — Faka tasko de la intelekto. — Respondeco de la verkisto. — La laborantoj por Spiritismo kaj la mondaj inte- lektuloj.	
PERSONECO	104
Nocio pri personeco. — Mezklera homo. — Perso- na magnetismo. — Talismanoj. — Bonŝancaj ho- moj. — Socia koncepto pri la digneco. — Vigleco.	

IV - PRILUMO

NECESECO	107
Doktrina propagando. — Elementoj de prilumado. — Kredo kaj prilumado. — Esploro per la racio. — Anima inspiro. — Laboro pro la interna prilumado. — Penado de la elkarniĝintoj.	
LABORO	110
Animsavo. — La spiritaj Gvidantoj kaj la prilumado de la homo. — Graco. — Memprilumado. — Purigo en la monda medio. — Komenco de klopodo. — Tiuj, kiuj plej bezonas lumon.	
REALIGO	114
La plej granda bezono de iu homo. — Kaŭzo de malprogreso de la spirita homo. — Homaj dekretoj. — Prilumado en la Evangelio. — Dezirego de prozelitismo kaj bezono de prilumado. — Instrui kaj prediki la evangelion. — Religiaj renoviĝoj.	

V - EVOLUADO

DOLORO	118
Fizika kaj morala doloroj. — Feliĉo en la Tero. — Definitiva helpo por elaĉeto. — La Evangelio kaj la homaj ĝojoj. — Ĝeneraleco de la doloro. — Pentolokoj en la nevidebla sfero. — Doloro kaj preĝo.	
PROVO	120
Provo kaj elaĉeto. — Leĝo de la provo. — Falo de la Spirito. — Falo de la spirito ekster la Tero. — Kolektiva provo. — Nekredemo. — Intenseco kaj fataleco de la provo.	
VIRTO	123
Nocio pri virto. — Pacienco. — Karitato. — Mate-	

ria almozo. — Espero kaj Fido. — Disĉiploj de Jesuo. — Ĉe la praktiko de la karitato.

TRIA PARTO

RELIGIO.....	127
La Religio antaŭ la Scienco kaj la Filozofio.	

I - LA MALNOVA TESTAMENTO

REVELACIO	127
En la komenco estis la Vorto. — Izraelo. — Judismo. — La Sanktega Triunuo de la katolika teologio. — Absurda ideo pri la “nenio”. — La tagoj de la Kreado. — Pozicio de la Malnova Testamento antaŭ la edukaj valoroj.	

LEĜO	130
La dek ordonoj. — Moseo sur la Sinajo. — Misio de Moseo. — Moseo kaj la definitiva leĝo. — Leĝo de egala repuno. — Modifo en la dua ordono. — La malpermeso de la Readimono.	

PROFETOJ	133
La libroj de la Malnova Testamento. — La antaŭdiro kaj la antaŭvido de la sanktaj skriboj. — Anĝeloj. — Multnombraj profetoj. — Profetoj el Izraelo. — La konstanta kunlaboro de la misiuloj de la Kristo en la mondo. — La legado de la Biblio en la familiaj rondoj.	

II - EVANGELIO

JESUO.....	136
Pozicio de la Evangelio de Jesuo. — Aserto de Johano. — Misio de Johano. — Universa misio de Jesuo Kristo. — Ofero de Jesuo. — Doloro de la Kristo. — Aserto de Jesuo. — La cirkloj de surtera aktiveco kaj la ĉesto de la Sinjoro. — La evangeliaj paraboloj. — La Antikristo.	

RELIGIOJ 139

Koncepto pri religioj. — Religioj antaŭaj al la veno de la Kristo. — Kristanaj doktrinoj. — Tasko de la Reformacio. — La spirito kaj la prefero por difinitaj religiaj ideoj. — Promeso de la Kristo al liaj apostoloj. — La spiritistoj kaj la bapto. — La spiritistoj kaj la geedziĝo. — Difino pri la katolika meso. — La faktoj ĉe la origino de la eklezioj.

INSTRUOJ 143

“Vi estas dioj”. — “Ĉiuj pekoj estos pardonitaj al vi”. — “Enkonduki pacon sur la Teron”. — “Ĉar mi venis, por kontraŭmeti viron kontraŭ lian patron, kaj filinon kontraŭ ŝian patrinon, kaj bofilinon kontraŭ ŝian bopatrinon”. — “Kaj ĉion, kion vi petos per preĝado, kredante, vi ricevos”. — “La lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne komprenis”. — “Kiu havas la fianĉinon, tiu estas la fianĉo, ktp”. — Transfiguriĝo de Jesuo. — “Ĉar Dio ne volis oferon nek donacon, jen Li formis por li korpon”. — “Tri estas la atestantoj en la ĉielo: la Patro, la Vorto kaj la Sankta Spirito”. — Feliĉeco al la malriĉaj en spirito. — Leciono de Jesuo, kiam Li lavis la piedojn de siaj disĉiploj. — Kial Jesuo sin ĉirkaŭvolvis per viŝtuko, kiam Li lavis la piedojn de siaj disĉiploj. — Helpleciono de Simono, Kirenano. — Reviviĝo de Lazaro. — Eŭkaristio. — Judaso kaj la pastro. — Forneo de Petro. — Traduko de la Evangelio de Jesuo.

III - AMO

KUNIĜO 150

Gradiĝo de la amo en la Naturo. — Ĝemelaj animoj. — Konfirmo de la teorio de la ĝemelaj animoj en la sankta teksto. — Altiriĝo de la ĝemelaj animoj. — La ĝemelaj animoj kaj la universala amo. — Leciono de Jesuo Kristo. — Geedziĝoj

en la mondo. — Sapiro kaj la progresintaj Spiritoj. — Helpo de la enkarniĝinta animo. — Eŭnukoj pro la regno de la ĉielo.

PARDONO 155

Pardoni kaj ne pardoni. — La pardono en la dia leĝo. — Pardono kaj klarigo. — Sincera pardono. — Pento kaj kulpelaĉeto. — Reamikiĝo. — Pardononi sepdekoble sep fojoj. — Mallamo. — Pardono kaj forgeso. — La elkarniĝintoj kaj la akuzoj de la mondo.

FRATECO 158

Leciono de Jesuo. — Spiritoj en misio de frateco. — Amo al la proksimulo. — La evangelia konsilo kaj la korpa agreso. — Frateco kaj malbona interpreto. — Lernejo de frateco. — Homa indiferecenteco pri la sincera frateco. — Frateco kaj egaleco. — Frateco kaj abnegacio. — Amo al ni mem.

IV - SPIRITISMO

FIDO..... 162

Reviviĝinta Kristanismo. — Misio de Spiritismo. — Fidi. — Fido kaj rezonado. — Rezonata dubo. — Revelacioj el la supera sfero. — Plej bona posedajo. — Ĉe la meditado pri la fido. — La spiritistoj kaj la dogmoj. — Ĉe la propagando de la fido.

PROZELITOJ..... 166

Devoj de la spiritisto. — Kontraŭfrataj luktoj. — Progreso de la spiritisto. — Atakoj de la kritiko. — Doktrinaj strangaĵoj. — Oportuneco de la doktrina konversacio. — Okazigo de fenomenoj el la nevideblo. — Nekonveneco de la rekta kaj persona elvoko. — Pasintaj vivoj. — Mediumaj fenomenoj.

PRAKTIKO	170
Spiritisma kunsido. — Metodoj. — La direktantoj kaj la mediumoj. — Societoj sen mediumoj. — Difino de doktrina programo. — La studemuloj ne dezirantaj internan evangelizon. — Ĉe la laboro de instruado. — Identigo de la komunikigantaj Spiritoj. — Spiritista devo rilate amatan estulon, forpasintan en la Transmondo. — Plendoj de tiuj, serĉantaj Spiritismon sen serioza celo.	

V - *MEDIUMECO*

ELVOLVIĜO	173
Difino de mediumeco. — Komuna mediumeco. — Mediuma elvolviĝo. — Neceso de sento por la plenumo de la mediuma tasko. — Ĉia kapablo estas utila. — La plej granda bezono de mediumo. — Specialiĝo. — La mediumeco povas esti forprenita. — La mediumo kaj konvertiĝo de la nekredataj. — La bestoj kaj la mediumeco.	

PREPARIĜO	177
La mediumo kaj la bezono de studo. — Obsedo. — Doktrininstruado. — Obsedo kaj frenezeco. — Movo de malbonefikaj fluidaĵoj. — Neceso de mediuma eduko. — Neceso de disciplino. — Ironiaj aŭ insultaj opinioj pri la laboro de la mediumoj. — Mediumoj serĉantaj aliajn mediumojn. — Mistifiko.	

APOSTOLADO	181
Mona pago. — Materiaj aferoj. — La mediumo kaj liaj sociaj devoj ĉe la familio. — La apostolado kaj la malkvietaj spiritistoj. — Agado de la esplorantoj. — La spiritisma veraĵo kaj la helpo de mediumo. — Societoj de materia helpo al la mediumoj. — Valorigo de la apostolado. — Rifido de la mediumeco. — Venko de la mediuma apostolado.	

NOTO	187
-------------------	-----

KLARIGO

En kunsido, okazinta la 31-an de oktobro 1939, ĉe la Spiritisma Grupo “Luís Gonzaga”, en la urbeto Pedro Leopoldo, Brazilo, unu amiko el la spirita sfero sugestis al ĝiaj membroj la diskuton de doktrinaj temoj, per demandoj farotaj al la Spirito Emmanuel, por pliigi la sferon de niaj scioj.

Konsultite pri la afero, la Spirito Emmanuel estigis programon de laboroj pene plenumotan de ni, kaj kiu estis komencita per la du jenaj demandoj:

– Ĉar, en sia karaktero de Konsolanto promesita de la Kristo, Spiritismo prezentas tri diferencajn aspektojn: sciancan, filozofian, religian, kiu el tiuj aspektoj estas la plej grava?

– “Ni povas rigardi Spiritismon, tiel simboligitan, kiel ian triangulon de spiritaj fortoj.

“La Scienco kaj la Filozofio ligas al la Tero tiun simbolan figuron, sed la Religio estas ja la dia angulo, ĝin liganta al la ĉielo. En sia scienca kaj filozofia aspekto, la doktrino ĉiam estos ia nobla kampo de homaj esploroj, simile al aliaj kolektivaj movadoj kun intelekta naturo, celantaj la pliperfektiĝon de la Homaro. En ĝia religia aspekto tamen kuŝas ĝia dia grandeco, ĉar ĝi estas mem la restarigo de la Evangelio de Jesuo, definitive renovigante la homon por la grandeco de lia senmezura spirita estonteco.”

– Por pliigi niajn sciojn pri la triobla aspekto de Spiritismo, ĉu ni povos daŭrigi niajn demandojn?

– “Vi povos demandi, sed ni ne povas nutri la pretendon doni al vi la definitivajn solvojn, kvankam ni plej volonte kunlaboros kun vi.

“Cetere, per la reciproka helpo ni atingos ja la plej altajn esprimojn de la intelektaj kaj sentimentalaj valoroj.

“Trans la toambo, la elkarniĝinta Spirito ne trovas la miraklojn de la saĝeco, kaj la novaj realaĵoj el la senmorta sfero transcendas la kadrojn de la nuntempa sciaro, sin konservante en sfero preskaŭ nealirebla por la homa penso, kaj eskapante do el niaj kapabloj de elmonro, pro la manko de analogiaj komparoj, sola impresrimedo sur la tabulo de la limigitaj valoroj de la homa menso.

Krome, ni ankoraŭ troviĝas en tia evolua sfero, ke ni ne povas porti al via lernorondo la lastajn malkovrojn en tiu aŭ alia sektoro de esploro kaj analizo. Jen la motivo, kial ni povas nur kunlabori kun vi sen la pretendo al la definitiva parolo. Konsiderinte nian kontribuon laŭ tiu nepre necesa koncepto de relativeco, ni penos vin helpi per nia modesta sumo de sperto, ne haltante ĉe la teknika ekzameno de sciencaj demandoj aŭ de la objekto de la polemikoj pri Filozofio kaj religioj, ambaŭ tro multmovaj post la kulisoj de la opinio, sed ni konsideru sole nur la spiritan lumon, disradiantan el ĉio, kaj la mistikan superecon de ĉiuj aktivecoj de la homa spirito en ĝia benata surtera lernejo, sub la favorkora protekto de Dio”.

La prezentitaj demandoj estis plej variaj kaj nombraj. Ĉiuj membroj de la Grupo, kiel ankaŭ aliaj spiritistoj-amikoj el diversaj lokoj, kunlaboris por la provizo de demandoj, jen manifestante siajn bezonojn de interna klariĝo ĉe la studado de la Evangelio, jen interesiĝante pri novaj temoj, kiujn la respondoj de Emmanuel inspiradis.

Poste, la spirita aŭtoro elektis demandojn, ilin ordigis kaj registris laŭ fakaj temoj, kaj jen estas la nova libro.

Ke la saĝaj, konsolaj vortoj de Emmanuel havigu al ĉiuj doktrinaj kunuloj la saman spiritan bonon, kiun ili faris al ni, estas ja la bondeziroj de la modestaj laborantoj el la Spiritista Grupo “Luís Gonzaga”, en Pedro Leopoldo, ŝtato Minas Gerais.

Pedro Leopoldo, la 8-an de marto 1940.

UNUA PARTO

SCIENCO

1 – Ĉu Spiritismo absolute bezonas la surteran sciencan?

– Tiu bezono neniel povas esti absoluta. La scienca kunlaboro estas utila ĉiam, kiam ĝi originas el klarmensa konscienco kaj el kora sincereco. Estas grave konsideri tamen, ke, se la monda scienco ne volas ludi plu la rolon de tirano kaj detruanto, ĝi nepre bezonas Spiritismon, kies dia celo estas la lumigo de la sentoj, ĉe la sankta plibonigo de la moralaj karakteroj de la homo.

I

FUNDAMENTAJ SCIENCOJ

2. – Se ni rekonas la Kemion, la Fizikon, la Biologion, la Psikologion kaj la Sociologion kiel la kvin fundamentajn sciencojn, kia estos la pozicio de la scienco de la vivo, rilate al la ceteraj?

– Studante la internan agadon de la korpoj, iliajn interrilatojn kaj iliajn proprecojn, la Kemio kaj la Fiziko estas la registro de la valoroj de la materia scienco. Ekzamenante la sentojn kaj la sociajn problemojn, la Psikologio kaj la Sociologio reprezentas klasifikan tabelon de la konkeroj de la intelekta scienco. En la centro de ĉiuj troviĝas la Biologio, signifanta la vivo-sciencan en ties profundaĵoj, rivelanta la transcendon de la origino – la Spiriton, la Dian Verbon.

Ĝis nun, ankaŭ la Biologio troviĝas enfermita en la materialismaj skoloj sur la Tero, sed, ĉe siaj plej aŭtentikaj karakteroj, ĝi elvolviĝos al Dio per siaj sublimaj elmontroj, kaj estas necese, ke ni rekonu, ke, eĉ nuntempe, ĝiaj profundaj enigmoj estas la plej noblaj alvokoj al la spirita realo kaj al la ekzameno de la diaj fontoj de la ekzistado.

KEMIO

3. – *Ĉu, en la kampo de la Kemio, la fortoj el la spirita mondo helpas la surteran homon?*

– La komisiitoj de Jesuo troviĝas en ĉiuj sektoroj de la homa laboro kaj, en ĉiuj epokoj, ili kunlaboris kun la homo en lia penado por perfektigi; cetere, la studemuloj kaj la scienculoj sur nia planedo ne kreis la kemiajn fenomenojn, kiuj ekzistis ĉiam, ekde la aŭtoro de la tempoj, certigante ian superan intelekton.

Vere, la homoj lernis Kemion el la Naturo. Ili kopiis ĝiajn asociaĵojn, elvolvante sian sferon de studoj, kaj elpensis nomenklaturon, reduktante la kemiajn valorojn, ne komprenante ilian dian originon.

4. – *Ĉe la studoj de Kemio, oni kalkulas je ĉirkaŭ kvarona miliardo la terajn substancojn, kiuj ja povas reduktiĝi, kvazaŭ ili estus devenintaj el proksimume nur naŭdek elementoj. Kiam la studoj de tiu scienco estos pliigitaj, ĉu povos reduktiĝi ankoraŭ plu la originaj fontoj?*

– La Kemio bezonas prezenti tiun dividon de elementoj por la registrado de la edukaj valoroj celante la sciencajn esplorojn, en la mondo. Se tamen en ĝia bazo troviĝas la atomoj en plej vasta karaktero de diverseco, eĉ tiamaniere ĝi ĉiam direktiĝos al la substanca unueco, revenante, konforme al spiritaj instruoj, al siaj originaj fontoj.

Cetere, rilate la kemiajn individuigojn, vi jam scias, ke, en la kadro de la surteraj scioj, la hidrogeno estas la plej

simpla el ĉiuj elementoj. Ĝia atomo estas la primitiva formo de la planeda materio, kaj ĝi konsistas el absolute simpligita sistemo, ĉar ĝin formas nur unu elektrono, de kie devenas la ceteraj individuigoj de la evolua meĥanismo de la materio, en siaj rudimentaj manifestigoj.

5. – *Ĉu, en la nomataj Brown-aj movadoj kaj en la molekulaĵ altiroj, ni povos rimarki manifestigojn de spiritoj?*

– En la tiel nomataj Brown-aj movadoj, same kiel en la molekulaĵ altiroj, ni ankoraŭ ne povos vidi ĝustasencajn manifestigojn de spiritoj kiel komencon de intelekto, sed nur rudimentajn fenomenojn de la vivo en ĝia elmonro de potenciala energio, en la evoluo de la materio sur vojo al la animaj principoj, sub la luma beno de la dia naturo.

6. – *Ĉu estis ia materia unueco por la formado de la diversaj organaĵ estaĵoj ekzistantaj sur la Tero?*

– Same kiel la homa kemiisto trovas en la hidrogeno la plej simplan formulon por difini la direkton de siaj substancaj komparoj, tiel same la spiritoj kunlaborintaj kun la Kristo, en la unuaj tempoj de nia planeda organizado, trovis en la protoplasmo la deirpunkton por sia realiga laboro, prenante ĝin kiel esencan bazon de ĉiuj vivaj ĉeloj de la surtera organismo.

7. – *Ĉu ekzistas ia leĝo de progreso por la kemia individuigo?*

– Laŭ la koncepto pri la spiritaj valoroj, la leĝo estas de evoluo por ĉiuj estuloj kaj aĵoj de la Universo. Ankaŭ la kemiaj individuigoj sekvas sian direkton, por havigi al si la unuajn animajn karakterojn, kaj estas juste rimarki, ke, en la industria rondo, la individuigo estas ellaborata laŭ la plej krudaj procesoj, ĝis ĝi povos esti utiligita de la nevidebla aganto en la biologia kemio, kie ĝi eniras en novan vivo-ciklon, ascendante al sia destino.

8. – *Kiu estas la diferenco, kiun la Spiritoj rimarkis, inter la biologia kaj la indurstria kemio?*

– Ĉe la unua superstaras la spiritaj influoj sur ĉiuj organismoj; dume, ĉe la dua, ĉiuj faktoroj havas, ĝustedire materialan efikon.

En tio kuŝas ja la granda diferenco. Tiel estas, ĉar en la interno de la organa ĉelo la vivo-fenomeno submetiĝas al ia dia aganto, en sia profunda naturo, kaj, en la industriaj komponaĵoj, la kemiaj kombinoj povas obei al ia homa aganto.

9. – *Ĉu la radioaktiveco okazigas la detruigon aŭ la evoluon de la materio?*

– Per la radioaktiveco okazas la evoluo de la materio. El tiu kontinua konsumiĝo okazas ja la kemiaj individuigoj, transformitaj en energion, movadon, elektron, lumon, en ilia ascendo al novaj evoluaspektoj, obee al la leĝoj regantaj la Universon.

10. – *Ĉar la radioaktiveco agas senĉese, ellaborante siajn fortojn, kie troviĝas la fonto de energio por la materio?*

– La Suno estas tiu vivofonto por ĉiuj nukleoj de la planeda vivo. Ĉiuj estaĵoj, same kiel ĉiuj centroj, kie agas la fortoj de la embria vivo, ricevas la senĉesan renovigon de siaj energioj per daŭra atompluvo sendita de la sistemo-sidejo al la familio de mondoj ekvilibrataj en ties altiro, en la Senlimo.

11. – *Kiel ni komprenu la aserton de la kemiistoj: “nenio kreiĝas, nenio perdiĝas”?*

– Vere, la homa spirito ne kreas la vivon, kio estas atributo de Dio, fonto de la senfina, senĉesa kreado. Se tamen la homo ne povas krei la vivo-fluidaĵon, nenio perdiĝas el la Dia faritaĵo, ĉirkaŭ li, ĉar substancoj aliĝas en ascenda evoluado.

12. – *Konsiderante la ekzaktecon, kun kiu efektiviĝas la naturaj kombinoj de la organika kemio, kiel ni komprenu la plurajn manifestiĝojn de la naturo, en ĝiaj unuaj tempoj?*

– Ĉe siaj primitivaj molekularaj asociiĝoj, la diversaj manifestiĝoj de la surtera naturo obeas al la dia penso de la komisiitoj de Jesuo, okaze de la unuaj signoj de vivo sur la krusto de la terglobo.

Se vi turnos vin al tiuj plej antikvaj originoj, tiam vi povos rimarki la penadon de la saĝaj Spiritoj de la nevidebla sfero ĉe la manipulado de la valoroj de la biologia kemio en la komenco de la planeda vivo, starigantaj la definitivan karakterizon de la Naturaj procedoj en la fiksado de la specioj, antaŭvidantaj ĉian meĥanisman de la estonteca evoluo, kaj konfidantaj sian laboron al la leĝoj de la natura selekto, leĝoj, kiuj, sub la egido de Jesuo, estis daŭrigontaj tra la tempo la perfektigon de la tera verko.

13. – *Ĉu la spiritaĵoj fortoj organizis ankaŭ la mondan atmosferon?*

– Sendube. La inteligenteco, kun kiu estis aranĝitaj la elementoj de la scenejo, por la evolviĝo de la vivo sur nia planedo, pravas tion al vi.

Je distanco de kelkdeke da kilometroj estis metitaj tavoloj el ozono, destinitaj filtri la sunradiojn kaj dozi ties naturon por protekti la vivon.

El la atmosfero vi ricevas pli grandan kvanton da nutraĵo por la konservado de viaj ĉeloj.

Kaj, ĉar ne estas nia celo erudicie citi, nek rediri la sciencajn instruojn de la mondo, ni memoru, ke unu homo, por la konservado de sia organa vivo, bezonas ioman kvanton da oksigeno, dek kvin gramojn da azoto (nutra) kaj kvincent gramojn da karbono (nutra). La oksigeno estas donaco de Dio por ĉiuj kreitaĵoj; rilate la azoton kaj la karbonon, estas ja pro ilia havigo, ke la homo penege luktas sur la Tero, kio rememorigas al ni la admonon de la sanktaj tekstoj al la

erarinta spirito: “En la ŝvito de via vizaĝo vi manĝados panon”.⁽¹⁾

Laŭ tiu kemia kalkulo, la baza problemo de nutrado estas konfirmo pri la patra grandanimeco de la Kreinto kaj la elaĉeta stato en kiu troviĝas la reenkarniĝintaj animoj en tiu ĉi mondo.

14. – *Kiel kompreni la aserton de la astronomoj, rilate al la termika morto de la planedo?*

– Certe estas, ke iam ĉiu materia organismo aliĝos, prenante novajn formojn. La energioj de la Suno, same kiel la teraj fortoj, ĉi tie elĉerpiĝos kaj aperos aliloke. Laŭ kalkulo de kelkaj astronomoj, la termika morto de la planedo okazos post ĉirkaŭ unu miliono da jaroj, de nun.

Oni jam asertis tamen, ke la vivo estas la eterna nuno. Kaj nia ĉefa devo ne estas kalkuli la tempon, difinante sur nefirmaj bazoj la daŭron de la, kiel sciante, pasemaj faritaĵoj, sed valorigi ĝin kiel sanktan okazon por la definitivaj konstruaĵoj de nia spirito, konstruaĵoj liberaj de ĉiaj materiaj aliĝoj, en la senfino.

FIZIKO

15. – *Ĉu ekzistas Spiritoj speciale komisiitaj por plenumi la fizikajn leĝojn sur la tera planedo?*

– Tiu veraĵo estas ja nekontraŭstarebla, kaj la homo povos senĉese esplori kaj studi, tirante la plej bonan profiton ĉe sia rutino de persistaj penadoj; sed ĉiuj difinoj de la materialismo estas neutilaj antaŭ la nerefutebla realeco de la transcendaĵoj faktoroj ĉe ĉiaj gravaj fizikaj fenomenoj de la Naturo.

16. – *Ĉu la novaj sciencaj riveloj pri la atomoj kaj la elektronoj, efektivigitaj de la profesoroj Thomson, Rutherford,*

⁽¹⁾ Genezo, 3:19. – **La Trad.**

Ramsay kaj Soddy, inter aliaj, sur la kampo de la fiziko, povas ja doni la ekzaktan scion pri ĉiuj stadioj de la animevoluo?

– La scienco ĝustadire homa povos starigi konvenciajn bazojn, sed ne la aŭtentikan bazon, en ĝia dia origino, ĉar la atomoj kaj la elektronoj estas fazoj de karakterizado de la materio, kaj ili ne konsistigas, en tiu senfina skalo, la principon, egale troviĝantan en la sfero de la ekstreme malgrandaj.

17. – *Kiel estas rigardataj, en la spirita sfero, la nuntempaj scioj pri la Fiziko, sur la Tero?*

– La nuntempaj nocioj pri la Fiziko pli kaj pli proksimiĝas al la scio pri la universaj leĝoj, sur kies supro kuŝas la dia direktado, reganta ĉiujn mondojn.

La antikvaj sistemoj maljuniĝis. La hieraŭaj konceptoj cedis lokon al novaj deduktoj. Ĵusaj studoj pri la materio igas vin rekonii, ke ĝiaj elementoj disiĝas per la analizo, ke la atomo ne estas nedividebla, ke ĉiu materia manifestiĝo povas aliformiĝi en forton kaj ke ĉiu energio revenas al la provizejo de la universa etero. Kun la tempo, la akademias formuloj renoviĝos je aliaj konceptoj de la transcenda realaĵo, kaj la surteraj fizikistoj ne povos malbezoni Dion ĉe siaj deduktoj, kaj ili restarigos la Naturon en ĝia pozicio de pasiva kampo, kie la dia intelekto manifestiĝas.

18. – *Kie la senpera punkto de observo, por ke la Fiziko konfesu la ekziston de Dio?*

– Ekde la komenca punkto de siaj observoj, la Fiziko estas devigita rekonii la ekziston de Dio ĉe Liaj diaj atributoj. Por demonstri la mondo-sistemon, ĉu la scienculo ne sin turnis al la tiel nomata “imaga akso”? Sufiĉas tiu rimedo, por ke la homo estu kondukita al pli altaj konkludoj, sur la kampo de la transcendo.

La ĉiela meĥaniko pravas la nerefuteblecon de la teorio de la movado. La planedo moviĝas en la senlimaĵo. La materio vibras ĉe siaj plej diversigitaj formoj.

Kiu naskis la movon? Kiu donis la unuan vibran impulson al la universa organismo?

La Scienco klarigas, ke la energio faras la movadon, sed la forto estas blinda kaj la materio ne havas spontaneecon.

Nur en la dia intelekto ni renkontas la originon de ĉia kunordigo kaj ĉia ekvilibro; tial, ĉe siaj plej intimaj demandoj, la surtera Fiziko ne povos disigi je la logiko kun Dio.

19. – *Ĉu la fiziko-nocioj konataj de la homoj estas realaj, definitivaj difinoj?*

– Pri la materio la homoj posedas la sciojn livereblajn de ilia menso kaj ni komprenu, ke la reala aspekto de la mondo ne estas tiu, kiun la mortemaj okuloj povas ampleksi, ĉar la homaj komprenoj estas kondiĉitaj al la sennoj, kaj la homo ne sukcesas transpasi la regionon de certaj vibroj.

Dronitaj en la pezaj vibroj de la karnaj rondoj, la homoj ricevas tre neperfektajn informojn pri la Universo, pro la nesufiĉeco de siaj kvin limigitaj sentumoj.

Estas ja pro tio, ke ĉiam estos limigita la homa observado de la materio, forto kaj movado, ne nur pro nesufiĉeco de la sensoria percepto, sed ankaŭ pro la strukturo de lia okulo, kie la dia saĝeco limigis la homajn eblecojn de analizo, por valorigi la klopodojn kaj iniciativojn de la kreito.

20. – *Kiel ni komprenu la eteron?*

– En la sciencaj rondoj sur nia planedo oni jam multe parolis pri la etero, sed neniu povis doni, per la konataj konvencioj, perfektan bildon de ĝia realeco.

Efektive, la homo ne povas imagi ĝin per la limigitaj perceptoj de sia menso. Niaflanke, ni ne povas doni al vi pli klaran instruon pro manko de analogiaj terminoj.

Se, kiel elkarniĝintoj, ni komencas ekzameni ĝin en ĝia profunda esenco, por la surteraj homoj la etero estas preskaŭ abstraktaĵo. Sed ni iel penu kompreni ĝin kiel ian sanktan vivo-fluidaĵon de la Universo, kiu, en ĉiuj direktoj, estas la portilo de la dia penso.

21. – *Ĉu la Fiziko povas doni al ni elementojn por taksi la dian evoluplanon?*

– Ankaŭ per ĝi vi povas observi la profundan belecon de la universaj leĝoj. En la inteligenta blovo de la dia volo densiĝas la kosma materio en la organismo de la Universo. Aperas la grandaj amasoj da nebulozoj kaj, poste, la familio de la mondoj, kies movadoj estas regataj de la leĝoj de la ekvilibro, en la altira sfero, en la senlima korpo de la kosmo.

La evoluciklo prezentas per ĝi unu el siaj plej belaj aspektoj. Sub la dia gvido, la materio produktas forton, la forto naskas movon, la movo estigas la ekvilibron de la altiro kaj la altiro aliiĝas en amon. Tiam, ĉiuj sferoj de la vivo identiĝas en la sama leĝo de unueco, kiun la dia saĝeco starigis en la Universo.

22. – *Ĉu la substanco estas la sama en ĉiuj mondoj? Kiel ni komprenu la rivelajon de la spektroskopo?*

– Rekoninte, ke la Universo obeas al ia leĝo de unueco, ni devas akcepti, ke, kio troviĝas en la tuto, tio ekzistas same en la partoj.

Sed la spektroskopo ne povas riveli al vi ĉiujn substancojn troviĝantajn en la aliaj mondoj, kaj ni ne povas forgesi, ke la Tero estas tre modesta apartamento en la universa konstruaĵo, kaj ni ne povas ne rekonii, per ĝiaj simplaj detaloj, la senliman grandecon de la verko de la Kreinto.

23. – *Ĉu ekzistas ia leĝo de ekvilibro kaj ia leĝo de fluidaĵoj?*

– La grandaj ĝeneralaj leĝoj de la ekvilibro havas sian sanktan sidejon en Dio, eterna fonto de ĉia vivo. Kaj, koncerne la leĝon de fluidaĵoj, ĉiu mondo ĝin posedas laŭ sia planeda organizo.

Rilate al la tera sfero, nur Jesuo kaj Liaj plej altrangaj senditoj plene konas ĝiajn procesojn, kaj tiu leĝo konsistigas ian dian kampon de studoj ne nur por la homa intelekto, sed ankaŭ por la elkarniĝintaj estuloj, kiuj jam liberigis sin el la

plej maldelikataj laboroj ĉe la rondoj de la karno, por evolui en la sferoj pli proksimaj al la tera scenejo.

24. – *Ĉu la leĝoj de gravito estas similaj en ĉiuj planedoj?*

– La leĝoj de gravito ne povas esti tiuj samaj por ĉiuj planedoj, des pli ĉar, sekve de via scienca evoluo, vi jam komprenas, ke la principoj de Newton estis iamaniere anstataŭitaj de la konceptoj de relativeco, konceptoj, kiuj siavice ankaŭ sekvas la progreson de la kono.

25. – *Ĉu la teledinamismo estas aplikata al la rilatoj inter la videbla kaj nevidebla mondoj?*

– Ĉar la teledinamismo estas la manifestado de fortoj, agantaj en distanco, ni klarigu, ke plurfoje ekfunkcias, en la fenomeno de la komunikoj, la teledinamikaj agoj nepre bezonaj por certaj manifestiĝoj de mediumeco.

26. – *Antaŭ la principoj de la Fiziko, kiel ni komprenu la magnetismon, kaj kiuj estas ĝiaj karakteroj en la interrilato inter enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj?*

– La magnetismo estas fenomeno de la vivo, ĉar ĝi estas la natura manifestiĝo en ĉiuj estaĵoj.

Se la monda scienco jam atingis la kampon de rimarkindaj solvoj per eksperimentoj rilataj al tiu temo, pruvante la ĝeneralecon kaj delikatecon de la magnetaj fenomenoj, vi do devas kompreni, ke tiaspecaj elmontraj, ĉe la rilatoj inter la du mondoj, estas ĉiam pli altaj kaj subtilaj, ĉar en tia okazo estas ia monro de supera vivo.

BIOLOGIO

27. – *Kiel ni komprenu la Naturon?*

– La Naturo estas ĉiam la dia libro, kie la manoj de Dio skribas la historion de Lia saĝeco; libro de la vivo, kiu estas la lernejo por la spirita progreso de la homo, senĉese elvolviĝanta per penado kaj sindonemo de Liaj disĉiploj.

28. – *Ĉu la manifestiĝoj de vivo en la diversaj regnoj de la Naturo, inkluzive de la homo, signifas la esprimon de la Dia Vorto laŭ grada skalo en la procesoj de la surtera perfektigo?*

– Jes, en ĉiuj regnoj de la Naturo pulsas la Dio-vibro, kiel la Dia Vorto de la Senfina Kreado; kaj, en la senfina kadro de laboro kaj sperto, ĉiuj principoj, same kiel ĉiuj individuoj, registras siajn valorojn kaj sanktajn akiraĵojn por la senmorta vivo.

29. – *Ĉu la Spiritoj kunlaboras en la elvolviĝo de la embrio de la korpo, en kiun ili reenkarniĝos? Se jes, ĉu ili influas sur la ĉelajn kompleksojn de la fizikaj heredaĵo, por ke la estontaj korpoj estu dotitaj per certaj elementoj kapablaj kontentigi la sekvojn de la provo aŭ misio, kiujn ili devas plenumi?*

– En la okazo de la progresintaj Spiritoj, mastroj de propraj, netransdoneblaj faroj, tiu kunlaboro preskaŭ ĉiam okazas ĉe la penado de la komisiitoj de Jesuo, kiuj agas por tio, celante la estontecon de siaj luktoj en la materia medio. Ni tamen konsideru, ke la ribelemaj aŭ indiferentaj Spiritoj, senigitaj je la nepre necesaj propraj valoroj, devas akcepti la decidon de la menciitaj komisiitoj, kiuj elektas ja la provojn, kiujn ili meritas, aŭ kiuj estas nepre necesaj por ilia proceso de elaçeto aŭ evoluo.

30. – *Ĉu estas organoj en la spirita korpo?*

– Laŭ la esencaj leĝoj, regantaj la surteran vivon, ampleksante la spiritaĵajn sferojn pli proksimajn al nia planedo, escepte de iaj aliĝoj truditaj de la provo aŭ plenumota tasko, la fizika korpo jam estas preskaŭa eksteraĵo de la perispirita korpo, subordigita al la imperativoj de pli kruda materio, en la meĥanismo de la ĉelaj heredaĵoj, kiuj siavice adaptiĝas al la nepre necesaj provoj aŭ atestoj de ĉiu individuo.

31. – *Ĉu la reenkarniĝo komenciĝas kun la unuaj vivo-manifestiĝoj de la homa embrio?*

– Ekde la unuaj momentoj de tiaj manifestiĝoj, la Spirito spertas la efikojn de sia nova situacio. Sed estas grave konfesi, ke la spiritoj pli klarmensaj, kontraŭe al tiuj pli malklarmensaj kaj nesciaj, ĝuas preskaŭ plenan liberecon, ĝis la kompleta firmiĝo de la materiaj ligiloj ĉe sia nova naskiĝo en la mondo.

32. – *Kiam la embrio formiĝas, ĉu okazas ia interpenetro de fluidaĵoj inter la gravedulino kaj la spirito tiam ligita al la feto? Ĉu ekzistas kontroleblaj sekvoj?*

– Tiu interpenetro de fluidaĵoj estas natura kaj pravigebla, ne malofte okazigante tre subtilajn fenomenojn, kiel la tiel nomatajn “denaskajn signojn”, kiuj nur pli malfrue povos esti komprenataj de la monda scienco, pliriĉigante la kadron de valoroj de la biologio, ĉe la profunda studado de la originoj.

33. – *Ĉu la Spirito, en ĉiu el siaj enkarniĝoj, rememoras siajn evoluajn stadiojn, same kiel okazas al la materia embrio, kiu rememoras, antaŭ la naskiĝo, la tutan evoluon de sia specio?*

– Tiu rememoro en la plimulto da okazoj efektiviĝas pro la oportuneco, kiun ĝi donas al la enkarniĝinta animo dece konduiti, en la samaj cirkonstancoj de sia kulpa pasinteco; sed ĝi ne estas ĝenerala regulo, kaj ni atentigu, ke, ju pli grandaj estas la akiraĵoj de saĝeco kaj amo, des pli malproksime troviĝos la spirito, ĉe sia surtera lernado, de tiu rememoro pri la materiaj spertoj, de kies dolora ĉeesto li tiam povos liberiĝi pro sia supera spiriteco.

34. – *Ĉu la tiel nomata genealogia arbo de la homoj havas identan signifon en la spirita sfero?*

– En la spirita sfero persistas la sama penado por la konservado kaj plivastigo de la familiaj korinklinoj, kaj, jen ĉe la surteraj regeneraj laboroj, jen en la sanktiga lumo de la astraj sferoj, la pasioj kaj malpuraj sentoj aliĝas en sanktajn ligilojn de la spirito.

Sed la genealogia arbo, tiel, kiel ĝi estas konata en la surtera lukto, ne transportiĝas al la nevidebla sfero, ĉar tie la sangaj ligiloj estas anstataŭataj de la altiroy de la sublimaj amo-sentoj purigitaj per la abundo da spertoj kaj luktoj komune travivitaj.

35. – *Ĉu la genetiko estas submetia al pure materiaj leĝoj?*

– La genetikaj leĝoj estas gvidataj de nombraj psikaj agantoj, kiujn la surtera scienco tute ne povas formuli, konforme al siaj materialismaj postulatoj. Ofte, tiuj psikaj agantoj estas vigligitaj de la spirita senditoj komisiitaj por tiu aŭ alia misio ĉe la fluoj de la profunda vivofonto. Jen kial la genetikistoj ofte renkontas neatenditajn problemojn, kiuj translokas la centron de iliaj antaŭaj konkludoj.

36. – *Ĉu la genetiko povas starigi rimedojn por plibonigi la homon?*

– El la fizika vidpunkto, la naturo mem de la mondo senĉese plibonigas la homoj per siaj procesoj de natura selekto. En tiu senco, la genetiko povas agi nur kopiante la propran materian naturon. Sed se tiu scienco esploras la spiritajn faktorojn, aliĝante al la altaj principoj, celantaj la prilumon de la homaj animoj, tiam ĝi povos fondi vastan servon de plibonigo kaj regenerado de la spirita homo en la mondo, des pli ĉar, alie, ĝi povos esti notinda mentoro de eŭgeniko – granda skulptisto de la ĉelaj formoj, sed ĝi estos ĉiam senefika por la homa spirito, kaj povos ja transformiĝi en abomenindan marioneton, en la senkompataj manoj de rasismaj politikistoj.

37. – *Ĉu la kombinoj de genoj, konsilitaj de la genetiko, povas doni al la homo certajn kapablojn aŭ certajn inklinojn?*

– Kelkaj nuntempaj scienculoj proklamas tiujn eblecojn, sed ili forgesas, ke la inklino aŭ kapablo estas atributo de la spirita individuo, neatingebla por iliaj observoprocesoj.

La genetikistoj povas efektiviĝi nombrajn elmontrojn de la materiaj ĉeloj; sed tiuj eksperimentoj ne iros trans tiu supraĵa kono, rilate la akirojn, provojn aŭ evoluan pozicion de la enkarniĝintaj Spiritoj.

38. – *Se la genetiko estas orientita de psikaj elementoj kiel ni klarigu la tiel ekzaktajn konkludojn de mendelismo?*

– Mendelismo faris ja notindajn eksperimentojn, sed ĝi ankoraŭ renkontas neeksplikeblajn fenomenojn ĉe la proceso de siaj pozitivaj observoj. Estas nepre necese konsideri, ankaŭ, ke, laŭ malkreskanta skalo, en la regnoj de la Naturo, la genetiko prezentas feliĉajn rezultatojn en siaj elmontroj, pro la simpla kaj primitiva materialo prenita por siaj praktikaj observoj, kiaj la ĉelaj kompleksoj de vegetaĵoj kaj animaloj, konsistantaj el rudimentaj formoj. Sed laŭ kreskanta skalo, kie la psika evoluo prezentas siajn karakterojn de intenseco kaj efektivigo, la genetiko ĉiam renkontos la spiritan faktorojn ĝin kunvokantajn al pli vasta kaj sublimesa agokampo.

39. – *Kiuj estas la kaŭzoj de naskiĝo de monstraĵoj ĉe la homoj kaj ĉe la bestoj?*

– Ni ne povas forgesi, ke ĉe la homoj tiuj doloraj fenomenoj rezultas el la kadro de purigaj provoj, kaj ni ne forgesu ankaŭ, ke la tera mondo ankoraŭ estas lernejo prepara al perfektigo.

La teratologiaj produktoj konsistigas kulpelpagan lukton ne nur por la sentemaj gepatroj, sed ankaŭ por la Spirito, enkarniĝinta por penigaj elaĉetoj el sia kulpa pasinteco.

Koncerne la bestojn, ni devas konfesi la urĝan bezonon de la multoblaj eksperimentoj en la dramo de la vivevoluo.

En ĉio tamen ni penu ekvidi la edukan aspekton de la surteraj laboroj.

La Tero estas vasta metiejo. Sur ĝi laboras la komisiitoj de la Sinjoro, kiujn ni povas konsideri kiel teknikajn direktantojn ĉe la verko de perfektigo kaj elaĉeto. En iaj fakoj de penado, la homoj estas malbonaj lernantoj aŭ ribelaj laboristoj. En tiuj fakoj, la komisiitoj de Jesuo povas plenumi la saman kutiman laboron; ili tamen renkontas konfuzon kaj

reziston de la favoratoj mem, kaj pro tio la fonto de puraj energioj ne povas respondi por la fenomenoj ĝin difektantaj, fenomenoj kaŭzitaĵ de la indiferento, krima intenco aŭ krueleco de la propraj homoj, kiuj estas ĉiam celo de la amplena zorgo de la Sinjoro sur ĉiuj vojoj de siaj destinoj.

40. – *Ĉu fekundeco kaj sterileco estas provoj?*

– Laŭ la surteraj interpretoj, tiuj konceptoj povas indiki provosituaciojn al la animoj spertantaj sian edifon. Se tamen ni konsideros la aferon el ĝia spirita aspekto, ni devos konfesi, ke sterileco ne ekzistas por la spirito, kiu sur la Tero aŭ ekster ĝi povas esti fekunda je laboroj de beleco, perfektigo kaj elaĉeto.

41. – *Ĉu la ideo pri evoluo, kiu de longe influas la sferojn de ĉiuj sciencoj en la mondo, ekde la darvinaj teorioj, prezentas nun ian novan stadion de alproksimiĝo inter la sciencaj scioj de la homo kaj la veraĵoj de Spiritismo?*

– Ĉiuj evoluismaj teorioj en la mondo marŝas al alproksimiĝo al la veraĵoj de Spiritismo, ĉe fina brakumo kun la superega vero.

PSIKOLOGIO

42. – *Kiel ni komprenu, per Spiritismo, la psikologian normon, asertantan, ke la sperto de niaj kvin sentumoj estas la tuta fundamento de nia mensa vivo?*

– Spiritismo klarigas, ke la homo estas mastro de pli vasta posedaĵo firmigita sur liaj spertoj en pasintaj ekzistadoj, kaj ĝi pruvas, ke la efektiva fundamento de la mensa vivo ne sidas absolute sur la korpaj sentumoj, sed ankaŭ sur la latentaj memorajaĵoj el la pasinteco, pri kiuj la fenomenoj de antaŭtempa inteligenteco, sur la Tero, estas plej elokventaj atestoj.

43. – *Ĉu la monda Psikologio, difinante kiel sidejon de la memoro, de la juĝ- kaj imag-povo, tiujn partojn de la homa*

cerbo, kies funkcioj ankoraŭ ne estas precize konataj de la Scienco, prokrastas la solvon de iu problemo, kiu povas esti plenumata nur per spiritismaj scioj?

– Malakordante kun la diaj pensoj, la surtera Psikologio okazigas tiun prokraston, tiel longe, ĝis ĝi sukcesos atingi la profundan estuaron de la tuta vero.

44. – *Ĉu la Psikologio povos trovi ian plenan solvon de la problemo de la mensaj malordoj, nomataj psikologiaj anomalioj?*

– Utiligante sole nur la materialojn de la homa scienco, la Psikologio ne plenumos tiun deziron, konservante sin sur la kampo de la difinoj kaj studoj, malproksimaj de la kaŭzo.

La mondaj scioj tamen marŝas, celante la evoluon de tiu scienco laŭ la principoj de Spiritismo. Tiam, ĝiaj esplorantoj povos atingi la necesajn solvojn.

45. – *Ĉu, valorigante la nekonatajn povojn de nia mensa aparato, la Freŭda psikanalizo prezentas ian alproksimigan strekon inter Psikologio kaj Spiritismo?*

– Tiuj mondaj skoloj ĉiam estas gravaj provoj al akiro de la profundaj spiritaj veraĵoj, sed iliaj majstroj, kun raraj esceptoj, perdiĝas en la vantamo de akademijaj titoloj aŭ en la falsa taksado de la konvencijaj valoroj.

Almenaŭ nun, la sciencaj antaŭjuĝoj malebligas la efektivan alproksimiĝon de la oficiala Psikologio kaj Spiritismo.

La procesoj de la unua koncernas la nekonatan parton de la mensa mondo, kiun oni nomas konscienco, tute ne difinante tiun misteran kripton de la homa personeco, ĝin ekzamenante nur ĉe la pompa klasifiko de vortoj. Sed nur per la spiritismaj principoj la psikologiaj metodoj sukcesos kompreni, ke tiu sekreta regiono de la psika sfero de ĉiu homo estas la profunda rezervejo de la spertoj el la pasinteco, el multoblaj ekzistadoj de la kreito, mirinda arkivo, kie ĉiuj pasintaj konkeroj estas deponitaj en potencialaj energioj, tiel, ke ili reaperos en oportuna momento.

46. – *Kiel ni komprenu la tiel nomatajn kompleksojn aŭ asociojn de ideoj en la mensa fenomeno?*

– Ni scias, ke la asociadoj de ideoj ne havas sian kaŭzon en la nervaj ĉeloj, sed ke ili estas spontaneaj agoj de la spirito en la vasta cirkonstanca meĥanismo, agoj originantaj el lia senĉesa klopodo, kaj ili estas projektitaj per la materia cerbo, kiu estas nenio alia ol pasiva instrumento.

47. – *Kial, rilate la studon de la mensaj procesoj, la psikologoj de la mondo estas dividitaj, sur la kampo de la opinio?*

– La homaj psikologoj, ankoraŭ troviĝantaj tre malproksime de la spiritaĵoj, dividiĝas sole nur pro persona vanto, en siaj skoloj, des pli ĉar, analizante nur la efikojn, ili ne esploras la kaŭzojn kaj perdiĝas en la komplikaj sciencaj nomenklaturetoj, ne donante seriozan kaj simplan difinon de la mensa proceso, kie superstaras la profundaj realaĵoj de la spirito.

48. – *Ĉu Spiritismo klarigos al la psikologio la problemon pri la sidejo de la intelekto?*

– Nur kun helpo de Spiritismo la psikologia scienco povos difini la sidejon de la homa intelekto, ne en la nervaj aŭ glandaj kompleksoj de la pereema korpo, sed en la senmorta Spirito.

49. – *Kiel ni komprenu la sonĝon?*

– Plej ofte la sonĝo estas refleksa aktiveco de la psikaj situacioj de la homo en la meĥanismo de la ĉiutagaj luktoj, kiam la organaj fortoj dormetas por necesa ripozo.

Sed en certaj cirkonstancoj, same kiel en la antaŭavertaj fenomenoj, aŭ en tiuj de somnambulismo, en kiuj la enkarna animo atingas altan gradon da parta liberiĝo, la sonĝo prezentas la relativan liberecon de la Spirito katenita sur la Tero, kiam

povas okazi la komunikiĝo “inter vivos” ⁽¹⁾, kaj, kiom eble, okazas la profetaj vizioj, faktoj ĉiam aranĝitaj de la spiritaj mentoroj el alta hierarkio, obeantaj al noblaj celoj, kaj kiam la enkarniĝinto, en kelkatempa libereco, povas ricevi de siaj amikoj kaj gvidantoj el la nevidebla sfero la senperajn parolon kaj influon.

50. – *Ĉu la inklino estas ia memoraĵo el la pasintaj ekzistadoj?*

– La inklino estas natura impulso devenanta de la ripeto de analogaj spertoj, tra pluraj ekzistadoj. Ĝiaj karakteroj, en la infana stato, estas la plej konvinka pruvo pri la doktrino de reenkarnejo.

51. – *Ĉu frenezeco ĉiam estas provo?*

– La mensa perturbo ĉiam estas malfacila, dolora provo. Sed, povante prezenti la elpagon de ŝuldo el la malfacilega, nekonata pasinteco, tiu realaĵo eble estas rezulto de hodiaŭa senzorgemo, en la pasema nuno, kaj estas necesa, super ĉiuj ceteraj, tiu admono, rekomendanta preĝon kaj viklecon.

52. – *Ĉu halucino estas cerba aŭ spirita fenomeno?*

– La halucino ĉiam estas ekskluzive spirita fenomeno, sed ĝi povas estiĝi el ekskluzive organaj perturboj, kiuj fariĝos refleksaj en la sensoria aparato, difektante la instrumenton de la sentumoj, per kiuj la spirito manifestiĝas.

53. – *Ĉu la bonaj aŭ malbonaj pensoj de la enkarniĝinta estulo atingas la psikon de liaj surteraj fratoj, al kiuj tiuj pensoj direktiĝas?*

– La animoj, kiuj efektive preĝas kaj viglas laŭ la evangeliuj lecionoj, konstruas sian propran fortikaĵon por ĉiuj agoj de spontanea defendo.

⁽¹⁾ Latina esprimo, signifanta: inter vivantoj. – **La Trad.**

La bonaj pensoj ĉiam naskas la plej grandan bonon ĉe tiuj, kiujn ili celas, ĉar ili adaptiĝas al la esenco de la unika Leĝo, kiu estas la Amo en la pleneco de ĝiaj diaj manifestiĝoj. La malsuperaj pensoj povas atingi sian celon en identaj cirkonstancoj, kiam la homo fariĝas inda je tiuj doloraj batoj, laŭ la kompensanta justeco.

Sed ĉiuj tiaspecaj faroj estas superataj de la Dia Providenco, plenumanta siajn planojn de justeco, kun favorkoreco kaj saĝo.

SOCIOLOGIO

54. – *Kun la disvastiĝo de la spirita lumo, ĉu la homo plilarĝigos sian komprenon pri patrujo, tiel ke li metos sur la saman nivelon ĉiujn naciojn de la mondo?*

– La spirita lumo donos al la homoj novan koncepton pri patrujo, tiel ke nuliĝos la detrua movado farita de la hommortigaj kugloj kaj kanonoj.

Kiam tio okazos, la homo lernos valorigi per laboro kaj amo sian naskolandon, samtempe detruante la materiajn limojn kaj cedante lokon al la nova erao por la homara familio. Tiam la rasoj estos anstataŭitaj de la animoj kaj la patrujo estos honorata ne per morto, sed per vivo bone uzata kaj bone travivata.

55. – *Koncerne la ĝuadon de la surteraj riĉaĵoj, ĉu la socia malegaleco daŭros plu en la estontaj tempoj?*

– La socia malegaleco estas la plej alta pruvo de reenkar-niĝo, per kiu ĉiu spirito akiras sian difinitan pozicion de regenerado kaj elaĉeto. En tiu okazo, ni konsideras, ke malriĉeco, mizero, milito, malklereco kaj aliaj kolektivaj malfeliĉoj estas ja malsanoj de la socia organismo, kaŭze de la situacio de provado de preskaŭ ĉiuj ĝiaj membroj. Post malapero de la patogena kaŭzo, per la spirita iluminado de ĉiuj homoj en Jesuo Kristo, la kolektiva malsano estos forigita de la homaj medioj.

56. – *En Sociologio, ĉu oni povas akcepti la koncepton pri absoluta egaleco?*

– La absoluta koncepto egaligema estas grava eraro de la sociologoj, en ĉiu ajn fako de la vivo. La politika tiraneco povos provi altrudon tiucele, sed ĝi estos nenio alia ol spektakloriĉaj simbolaj unuformigoj, por eksteraj efikoj, ĉar la vera valoro de iu homo kuŝas ja en lia interno, kie ĉiu spirito havas sian pozicion difinita de sia propra diligenteco.

En tiu afero ekzistas ia absoluta egaleco de homrajtoj antaŭ Dio, kiu donas al ĉiuj siaj infanoj egalan okazon en la netakseblaj trezoroj de la tempo. Tiuj estas rajtoj de la konkero de saĝeco kaj amo tra la vivo, per la plenumo de la sankta devo de laboro kaj individua diligenteco. Jen kial ĉiu homo havos sian planon de meritoj sur la evoluovojoj. Ĉe la surteraj luktoj, tiu situacio estas ja grandioza ŝtuparo de progreso, se oni parolas pri rezonadoj kaj sentoj, ŝtuparo, kiun supreniros ĉiu homo mobilizanta la eblecojn disponigitajn al lia ekzistado, por la edifa iluminado de si mem, ĉe la sanktaj elmontoj de la individua diligenteco.

57. – Ĉu la homoj povos solvi sen malpaco la tiel nomatajn proletajn demandojn?

– Jes, kiam ili decidiĝos akcepti kaj apliki la sanktajn principojn de la Evangelio. La pasiaj regularoj, la strikoj, la unuflankaj dekretoj, la revoluciaj ideologioj estas senefikaj kataplasmaj pligravigantaj la vundon de la kolektivo.

Socialismo estas bela esprimo de la homa kulturo, dum ĝi ne glitas sur la polusojn de ekstremismo.

Ĉiuj absurdaĵoj de la sociaj teorioj rezultas de la malklereco de la homoj, rilate la neceson de ilia kristaniĝo. De ĉi tie ni vidas la malbonajn direktantojn kaj la malbonajn direktatojn, ne kiel riĉulojn kaj malriĉulojn, sed kiel avarulojn kaj ribelantojn. En tiuj du situacioj, la homoj okazigis la perturbon de ĉiuj meĥanismoj de la natura laboro.

Estas vero, ke ĉiuj homoj estas proletoj de la evoluo, kaj neniu bona klopodo, sur la Tero, estas neinda je la enkarniĝinta Spirito.

Ĉiu maŝino postulas specialan direktadon, kaj la monda meĥanismo bezonas senliman nombron da kapabloj kaj scioj.

Se ĉiu peco ne harmonie adaptiĝas al sia funkcio, ĉia laboro estas kontraŭefika, kaj neebla estas ĉia bona tasko.

Je la benoj de Dio, ĉiuj homoj estas riĉaj, kaj ĉiuj devas sukcesplene profiti la ricevitajn “talantojn”, ĉar, sen escepto eĉ de unu, iam en la transtombo ĉiuj raportos pri siaj penoj.

La estroj sciu ami, kaj la subuloj neniam malamu. Tiu estas la vero, per kiu ni komprenas, ke ĉiuj laborproblemoj, sur la Tero, havas ian evangelian solvon.

58. – *Tial, ke oni rekonas la ŝtaton kiel ian aparaton de konvenciaj leĝoj, ĉu estas pravigebla ĝia ekzisto, kaj ankaŭ tiu de la armeoj ĝin defendantaj en la mondo?*

– En la nuna situacio (aŭ kondiĉo) de la mondo, kaj konsiderante la diversecon de la karakteroj kaj evoluaj aspektoj de la homoj, kiam ili estas aparte ekzamenataj, oni pravigas la bezonon de ŝtataj aparatoj ĉe la politikaj konvencioj, kaj la bezonon de la armeoj ilin subtenantaj sur la terglobo. Ili ambaŭ estas institucioj de ordo por la plenumado de la individuaj provoj, laŭ la homaj eventualecoj, ĝis kiam la homo perceptos la sencon de konkordo kaj frateco en la leĝoj de la Kreinto, tiam malbezona certajn devigajn determinojn de la homaj leĝoj, konvenciaj kaj nedaŭraj.

59. – *Ĉu Spiritismo havas ian specialan rolon ĉe la Sociologio?*

– En la nuna momento de la surtera homaro, kiam ĉiuj konkeroj de la civilizacio degeneras en la ekstremismojn, Spiritismo estas la granda inicanto de la Sociologio, ĉar ĝi signifas la reviviĝintan Evangelion, kiun la laŭliteraj religioj provis enterigi en ekonomiajn interesojn kaj en la eksteran konvencion de siaj prozelitoj.

Restarigante por la homo la instruojn de Jesuo, kaj klarigante, ke la efektivaj valoroj de la homo estas tiuj, kiuj devenas de la konscienco kaj de la koro, la konsolanta doktrino de la Spiritoj reasertas la veraĵon, ke al ĉiu homo estos donite laŭ lia indeco, laŭ la persona diligenteco, en la aplikado de la leĝo de laboro kaj bono. Pro tio, ĝi prezentas la plej efikan antidoton kontraŭ la sociaj venenoj nun disverŝitaj en la mondo

per la politikaj filozofioj de la absurdo kaj senmezura ambicio, restarigante en la koroj la veron kaj la konkordon.

60. – *Kiel la spiritisto konduku antaŭ la monda politiko?*

– Ĉiu sincera disĉiplo de Jesuo havas pli subliman mision ĉe la politika tasko saturita de materiaj luktoj. Tiu estas la motivo, kial li ne devas estigi situacion de evidenteco ĉe la pasemaj mondaj administracioj. Kunvokite al tiaj situacioj, pro la cirkonstancoj, li devas akcepti ilin ne kiel premion por sia doktrino, sed kiel necesegan, penigan provon, en kiu ĉia sukceso estas ĉiam malfacila. Sincera spiritisto devas kompreni, ke la prilumado de unu konscienco estas kvazaŭ la prilumado de unu mondo, kaj ni atentigu, ke la tasko de la Evangelio ĉe la animoj enkarniĝintaj sur la Tero estas la plej grava el ĉiuj, ĉar ĝi estas definitiva, reala faro. La misio de la doktrino estas konsoli kaj instrui, en Jesuo, por ke ĉiuj mobilizu siajn diajn kapablojn sur la vivovojo. Ŝanĝi ĝin por unu loko ĉe la bankedo de la ŝtato estas inversigi la valoron de la instruoj, ĉar ĉiuj homaj organizaĵoj estas nedaŭraj pro la bezono de renovigo de ĉiuj formuloj de la homo laŭ la leĝo de la universa progreso. El tio ni konkludu, ke la vera konstruado de la ĝenerala feliĉo estos efektiva nur se ĝi havos firmajn bazojn en la spirito de la homoj.

61. – *Kiel ni rigardu la politikon pri rasismo?*

– Se estas prave, ke en la patrujoj ni observu la grupigon de pluraj kolektivoj per la afinaj ligiloj de edukado kaj sento, la rasisma politiko devas esti rigardata kiel grava eraro neniel pravigebla, ĉar ĝi ne povas prezenti seriozan bazon ĉe sia argumentado, apenaŭ kaŝanta la pereigan intencon de tiraneco kaj separatismo.

62. – *Ĉu la ordono “ne mortigu”⁽¹⁾ atingas la ĉasiston, kiu mortigas por distro, kaj la ekzekutiston, kiu ekstermas pro devo de ofico?*

⁽¹⁾ Readmono, 5:17. – **La Trad.**

– Laŭmezure kiel vi evoluos laŭ la evangelia sento, vi komprenos, ke ĉiuj mortigantoj malobeas la sanktan skribon.

Ĉe la grado de viaj nunaj scioj, vi komprenas, ke nur la murdistoj, kiuj mortigas pro malico, estas kontraŭ la dia leĝo. Kiam vi antaŭeniros plu sur la vojo, plibonigante la socian aparaton, tiam vi ne plu toleros la ekzekutiston, kaj kiam vi estos pli spiritigitaj, rigardante la bestojn kiel viajn malsuperajn fratojn en via vivo, tiam la klaso de la ĉasistoj ne havos pravon de ekzisto.

Legante niajn vidpunktojn, vi memoros pri la nocaj bestoj, kaj vi intime pensos pri la neceso de ilia ekstermado. Sed estas eble, ke vi ne memoros tiam pri la homoj nocaj kaj krueleĝaj. Ĉu la kalumnianto ne venenas pli multe ol piko de serpento? Ĉu la armigistoj aŭ la ambicia politikisto, kiuj senkompate muntas la maŝinaron de nekomprenebla milito ne estas ja pli senkompataj ol la sovaĝa leono? ...

Ni pensu tiujn veraĵojn, kaj ni rekonos, ke la estonta spirita homo, kun la lumo de la Evangelio en la intelekto kaj en la koro, estos modifinta sian medion de luktoj, helpante ankaŭ la evoluan penadon de siaj malsuperaj kunuloj en la surtera vivo.

63. – *Konsiderante la pozitivan ordonon “ne juĝu”⁽¹⁾, kiel ni distingu bonon disde malbono, sen juĝado?*

– Inter juĝo kaj distingo ĉiam estas granda distanco. La juĝado, celanta specifi definitivajn sekvojn, apartenas al la dia aŭtoritato, sed la analizo-rajto estas donita al ĉiuj Spiritoj, ke, distingante inter bono kaj malbono, inter eraro kaj vero, la homoj povu plani sian plej bonan vojon al Dio.

64. – *Ĉe la leĝo de la homoj, kiam oni troviĝas antaŭ kriminala proceso, ĉu oni devas voĉdoni por kondamni, konforme al la krimoproceso, aŭ por absolvi la krimulon, obee al la ordono “ne juĝu”?*

– En la sfero de niaj spertoj, ni konsideras, ke, kvankam la pecoj de la homaj procesoj estas kondamnaj, oni devas

⁽¹⁾ Mateo, 7:1. – **La Trad.**

memori tamen la figuron de la Kristo apud la ŝtonumita pekulino, ĉar Jesuo ankaŭ troviĝis antaŭ juĝantaro.

“Kiu el vi estas senpeka, tiu unua ĵetu sur ŝin ŝtonon”

⁽¹⁾ – estas la maksimumo, kiu ĉiam devus memori pri nia komuna situacio de defalintaj spiritoj, por ke ni ne kondamnu tiun aŭ alian el niaj similuloj. “Iru, kaj de nun ne plu peku”

⁽²⁾ – devas esti nia kondutnormo interne de nia propra koro, forigante la herbon de la malbono, kiu en ĝi vikle kreskas.

En la publikaj procesoj, la juĝa aŭtoritatulo, kvazaŭ peco de la ŝtata maŝino, plenumanta siajn fakajn funkciojn, devas scii kie troviĝas la konvena rimedo por korekti aŭ reeduki la socian organismon, mobilizante en tiu ofico la valorojn de siaj sperto kaj respondeco.

Sed ni individue peni lerni tion, ke se ni povas “juĝi” ion, ni ĉiam juĝu unue nin mem, kiel plej proksima frato de tiu, al kiu atribuiĝas krimo aŭ eraro, por ke ni estu konformaj al Tiu, kiu estas la lumo de niaj koroj.

En la ordinaraj horoj de nia ekzistado, ni serĉu la evagelian lumon por analizi la eraron kaj la veron, por ke ni distingu inter bono kaj malbono. Sed en la momento de la definitivaj juĝoj, ni transdonu la procesojn al Dio, kiu, antaŭ ol ni, ĉiam konos la plej bonan vojon de regenerado por siaj devojiĝintaj filoj.

65. – *Ĉu la homo, kiu prenis sur sin la respondecon de publikaj oficoj sur la Tero, respondas, en la spirita sfero, por la ordonoj, kiujn li plenumas kaj plenumigas?*

– Pro siaj moralaj karakteroj, la respondeco de publika ofico ĉiam estas pli grava ol tiu, kiun Dio donis, pri materia riĉaĵo. De tio venas la fakto, ke en la spirita vivo la deonprenanto de la publikaj aferoj ĉiam respondos por la ordonoj diktitaj de sia aŭtoritato en la surteraj taskoj.

⁽¹⁾ Johano, 8:7. – **La Trad.**

⁽²⁾ Johano, 8:11. – **La Trad.**

66. – *Ĉu la evangelia instruo – “Kiu do el vi ne forlasas ĉiujn siajn posedaĵojn, tiu ne povas esti mia disĉiplo”⁽¹⁾ – devas esti komprenata laŭ absoluta senco?*

– Ankoraŭ tiu instruo de la Majstro devas esti konsiderata en sia dia simboleco.

Ankaŭ la homaj riĉaĵo kaj aŭtoritato estas vojoj al spertoj kaj provoj, kaj la homo ilin memvole forĵetinta de si kondukus kun la konscio pri sia nerespondeco, flanke lasante la okazon por progreso, kiun la Dia Providenco metis al li en la manojn.

Ĉiuj homoj estas fruktuzantoj de la diaj havaĵoj, kaj tiuj, kiuj estas kunvokitaj al la adiministrado de tiuj havaĵoj, rigardu sian respondecon kiel unu el la plej seriozaj problemoj en la vivo.

Forlasante egoismon, fieron, malfortecon, elmontron de vantemo, la homo plenumos la evangelian ordonon, kaj, sentante la grandecon de Dio, la sola disdonanto de la reala riĉaĵo de la vivo, li estos la disĉiplo de la Sinjoro en ĉia cirkonstanco, ĉar li uzas siajn materiajn kaj spiritajn kapablojn sen la mondaj venenoj, kiel ia sincera interpretanto de la diaj planoj por ĉies feliĉo.

67. – *Kiel ni interpretu la feminisman movadon en la nuntempa civilizacio?*

– Per la geeza institucio, viro kaj virino estas kvazaŭ cerbo kaj koro de la hejma organizo.

Ambaŭ portas egalan respondecon ĉe la sankta familia grupo; se la ina animo ĉiam prezentis pli altan gradon de spiriteco en la vivo, tiel estas, ĉar de longe la vira spirito venenis la fontojn de sia libereco per ĉiaj misuzoj kaj malutilis al sia morala pozicio tra sennombraj ekzistadoj, en multoblaj jarcentaj spertoj.

Sed la feminisma ideologio de la modernaj tempoj, kun siaj diversaj politikaj kaj sociaj standardoj, povas esti ia veneno por la virino neglektanta siajn grandajn spiritajn devojn sur la Tero. Se ekzistas ia aŭtentika feminismo, ĝi devas esti tiu

⁽¹⁾ Luko, 14:33. – **La Trad.**

de la reedukado de la virino por la hejmo, sed neniam por kontraŭefika agado ekster ĝi. Tiel estas, ĉar la virinaj problemoj ne povos esti solvitaj per la viraj kodoj, sed nur konforme al la diaj, noblaj principoj de la Evangelio.

68. – *Kiel ni difinu la spiritostatton de la moderna homo, kiu tiom multe priokupiĝas pri “prosperi en la vivo”, “gajni multe” kaj “labori por riĉiĝi”?*

– Tiu celo de la nuntempa degenerinta homo estas forta karaktero de nescio de la spiritaj valoroj sur la Tero, kie okazas la inversigo de preskaŭ ĉiuj moralaj konkeroj.

Estis ja tiu eksceso de maltrankvilo, en la plej senbrida egoismo, kiu okazigis la moralan krizon en la mondo, el kies sinistraj spektakloj ni povas konfesi, ke la fizika homo de la epoko de radiofonio kaj transatlantika ŝipo bezonas pli multe da vero ol da mono, pli multe da lumo ol da pano.

II

ABSTRAKTAJ SCIENCOJ

69. – *En la kadro de la spiritaj valoroj, kia estas la pozicio de la abstraktaj sciencoj, kiaj Matematiko, Statistiko kaj Logiko, kiuj postulas la maksimumon da metodo kaj observo por siaj deduktaj aktivecoj?*

– Ankaŭ en ĉi tiu okazo ni vidas Matematikon kaj la Statistikon mezurantaj, kalkulantaj kaj denombrantaj la materian posedaĵon, kaj la Logikon orientanta la intelektajn aktivecojn de la homo ĉe la eventualaĵoj de ties vivo sur la Tero.

Ni ne povas malestimi la kontribuon de la abstraktaj sciencoj al la edukaj principoj, ĉar ili lertigas la intelekton, plivastigante la spiritan spontaneecon, tiel ke fariĝas pli facila la komprenado de la valoroj de la surtera vivo. Sed ni konfesu, ke iliaj aktivecoj, preskaŭ ĉiuj ligitaj al la mondomedio, estas procedoj aŭ rimedoj per kiuj la homo atingos la vivoscion en

ĝiaj plej profundaj spiritaj revelacioj, scion simbolantan la dian celon de ĉiuj esploroj kaj analizoj de la surteraj organizaĵoj.

III

SPECIALAJ SCIENCOJ

70. – *Ĉu la specialaj sciencoj, kiaj Astronomio, Meteologio, Botaniko kaj Zoologio estis kreitaj per la klopodo de la homa spirito ĉe la evoluado de la fundamentaj sciencoj?*

– Kiel aldonaj aktivecoj de la fundamentaj sciencoj, tiuj specialaj studoj prezentas ian amason da konkeroj de la homa spirito ĉe la sankta laboro de la abstrakta estaĵo, kiun ni nomas “civilizacio”.

Tiaj klopodoj estas la registro de la esploroj kaj faroj ĝustadire homaj; ili tamen konverĝas al la integra scienco laŭ la senfina plano, kie ili asociiĝas al la moralaj valoroj, ĉe la glorado de la saviĝinta homo.

71. – *Kiel ni juĝu la pozicion de la Tero rilate al la aliaj mondoj?*

– La grandeco de la astra spaco, kie moviĝas la tutaĵo de la sistemoj, estas tro profunda, por ke ni povu starigi ĝian difinon per la mizeraj surteraj formuloj.

En la kirlego de la Senfino, la planeda sistemo, kies centro estas nia Suno, estas tro simpla, konsistigante tre malriĉan aspekton de la Kreitaĵaro.

Sufiĉas memori, ke Kaprino, unu el niaj plej proksimaj najbaroj, estas suno 5.800-oble pli granda ol la nia, kaj ni ne forgesu, ke la Tero estas 1.300.000-oble malpli granda ol nia Suno.

Per tiuj grandiozaj ciferoj ni komprenas la amplekson de nia malgrandeco en la Universo, sincere komparante la situacion de ĉiaspecaj homaj konkerantoj, kiuj, sopirante akapari materiajn havaĵojn, faris al ni la impreson de ridindaj, vantaj marionetoj de la vivo.

72. – *Ĉu ekzistas planedoj en kondiĉoj pli malbonaj ol tiuj de la Tero?*

– Ekzistas mondoj, kiuj prezentas pli malbonajn perspektivojn de ekzistado ol la via, kaj, rilate al perspektivoj, la Tero estas gaja, bela sfero de lernado. La sola elemento sur ĝi, ne harmonianta kun la Naturo, estas ja la homo, kiun la egoismo submetis.

Ni konas planedojn, kies loĝantoj estas devigitaj al kontinua, laciga penado por havigi al si la elementojn esencajn al sia vivo; ankoraŭ aliajn, kie multegaj estuloj troviĝas en dolora ekzilo. Sed sur la via vi havas, tute senpage kaj sen iu ajn peno por vi, bluan ĉielon, riĉajn fontojn, abundan oksigenon, amikajn arbojn, fruktojn kaj florojn, koloron kaj lumon kaj sanktajn laboreblecojn, kiujn en ĉiuj tempoj la homo forlasas.

73. – *Ĉu la surtera homaro estas identa al tiu de aliaj mondoj?*

– Ĉe la fizikaj trajtoj tia analogeco estas neebbla pro la esencaj leĝoj, regantaj ĉian evoluon sferon; sed ni penu kompreni kiel homaron la tutan spiritan familion konsistantan el ĉiuj kreitoj de Dio, kiuj loĝatigas la Universon, kaj, esplorante la demandon tra tiu prismo, ni vidos la surteran komunumon identigita kun la universa kolektivo.

74. – *Ĉu scienculo povos rigardi kiel sukcesplenajn la eblecojn de interplaneda vojaĝo?*

– Almenaŭ dum daŭros ĝia konfuza, egoisma kaj ribela sinteno, la surtera homaro ne nutru iun ajn intencon al interplaneda vojaĝo.

Kion ni diru pri la homo, kiu, ne tenante ordon en sia propra domo, volus invadi la loĝejon de siaj najbaroj? Se tiom da fojoj la surteraj homoj de longe forlasas la riĉaĵojn, kiujn la Dia Providenco metis al ili en la manojn, ĉu ne estus juste teni ilin en ilia malvasta, malriĉa sfero?

La izoliteco de la Tero estas netaksebla bono.

Ni observu la rezultojn de la homa progreso, rezultojn kiuj estas mobilizitaj por milito kaj detruo ĉe la triumfoj de

la forto, kaj ni glori la Ĉielan Patron pro tio, ke Li ne plivastigis sur la Tero la observoprocesojn de siaj fieraj kreitoj.

75. – *Ĉu la spirito estas devigita adaptiĝi al la fluidaj kondiĉoj de ĉiu mondo, en la diverseco de siaj spertoj?*

– Tio estas imperativo por la akiro de liaj evoluaj valoroj, laŭ la leĝoj de perfektigo.

76. – *Ĉu pli malfrue la meteologiaj fenomenoj povos esti kontrolataj de la homoj?*

– Kvankam ne kontroleblaj por la homoj, la meteologiaj fenomenoj tamen tiaj ne estas por la komisiitoj de Jesuo, kiuj penas distribui ilin laŭ la spiritaĵaj valoroj, kiuj devos esti observataj ĉe ĉiuj evoluaj procesoj.

Ni tamen ne forgesu, ke la Tero estas lernejo.

Se en la nuna momento ne estas eble doni ateston pri plena scio al ribelaj kaj mallaboremaj lernantoj, iam tio estos ebla, kiam la morala evoluo estos atinginta la nivelon necesan por la utiligo de tia aŭ alia forto, je profito de ĉiuj.

77. – *Ĉu la spiritoj priokupiĝas pri Botaniko?*

– Ĉe Botaniko vi trovas la samajn problemojn de originoj eksplikeblajn nur per la transcendaĵaj faktoroj, kio pruvas la atenton de la spirita sfero al la tiel nomata vegetala regno.

Tiu fakto de la Naturo, evolukampo simila al la ceteraj, ankaŭ ricevas la sanktan influon de la Sinjoro, per helpo de Liaj senditoj, de antaŭ la organizo de la Tero.

Memoru, ke la homo estas lernanto en lernejo, kiun lia rezonkapablo jam trovis organizita de la dia saĝo, kaj en la nomo de Tiu, kiu estas la sankta fonto de niaj vivoj, amu la arbojn kaj zorgu pri la kampoj, kie floras la ĉielaj benoj.

78. – *Ĉu ankaŭ Zoologio estas objekto de atento de la spiritaĵaj sferoj?*

– Sendube, ankaŭ Zoologio indas la zorgon de la nevidebla sfero, sed estas necese, ke ni konsideru la utilecon de iu averto,

invitanta la homojn atente ekzameni siajn parencajn ligilojn kun la bestoj, en la limo de la evoluaj linioj. Estas do juste, ke ili penu amike zorgi pri la malsuperaj estaĵoj de la surtera vivo.

Cetere, la regnoj de la Naturo estas kampo de aktiveco kaj laboro de la homoj, kaj estas ja akceptinda, ke tiuj regnoj estas sub ilia respondeco pli multe ol ĝustedire sub tiu de la Spiritoj. Tial, ili respondos antaŭ la diaj leĝoj por tio, kion ili konscie faris el la posedaĵoj de la surtera naturo.

79. – Kiel ni klarigu nian parencecon kun la bestoj?

– Konsiderante, ke ankaŭ ili havas en la tempo ian estontecon de fruktoriĉaj faroj. Tra multenombraj spertoj ili iam alvenos al la tiel nomata homa regno, same kiel ni niavice atingos, en la fluo de jarmiloj, la rangon de anĝeloj. La progresoskalo estas sublimes kaj senfina. En la malvastega kadro de viaj scioj, ni serĉu figuron, kiu nasku en ni senton de solidareco kaj amo, kiu devas superregi en ĉiuj apartaĵoj de la naturo videbla kaj nevidebla. La mineralo estas altiro. La vegetalo estas senso. La animalo estas instinkto. La homo estas racio. La anĝelo estas dieco. Ni penu rekoni la grandan nombron da ligiloj nin kunigantaj ĉe la gradaj valoroj de la evoluo, kaj ni konstruu en nia internaĵo la eternan sanktejon de la universa frateco.

IV

KOMBINITAJ SCIENCOJ

80. – Ĉu la tiel nomataj kombinitaj sciencoj, inter kiuj troviĝas la Historio, la Geologio kaj la Geografio, aperis en la mondo nur el la klopodo de la ĉi tie enkarniĝintaj Spiritoj?

– Nerekte, la homoj ricevadas, en ĉiuj epokoj, la kunlaboron el la spirita sfero, por la starigo de siaj plej aŭtentikaj valoroj.

La tiel nomataj kombinitaj sciencoj estas esprimoj de la sama kadro de homaj scioj, same konvergantaj al la integra scio, en la senlima plano.

Ĉu la Historio, kia vi ĝin konas, ne estas ia statistiko pri la surteraj eventoj?

Ĉiuj tiuj sciencoj estas procesoj evoluaj al la intelektaj valoroj de la homo survoje al la definitivaj konkeroj de sia senmorta personeco.

81. – *Ĉu en la spiritaĵoj sferoj la historio de la surteraj civilizacioj estas konata sammaniere kiel ni ĝin konas el la homaj historiistoj?*

– La priskribo de la faktoj estas proksimume la sama; sed la metodoj de taksado de la okazaĵoj kaj situacioj estas preskaŭ absolute malsamaj.

Plurfoje la herooj en la surteraj libroj estas tre mizeraj estuloj en la spirita sfero. Okazas do la malo. Ni konas superegajn Spiritojn, kiuj venis el la mondo kovritaj per gloraj virtoj, kaj pri kiuj tamen la Homaro gardas nenian memoron. La altaroj kaj patriotaj galerioj sur la Tero ĉiam estis kompromititaj de la malnobla politiko de pasioj. Malmultaj surteraj herooj indas tiun titolon en la mondo de la vero.

Jen la motivo, kial la monda historio, estante ekzakta rilate la priskribon kaj kronologion, estas ja malĝusta koncerne la justecon kaj sincerecon.

82. – *Ĉu la falsaj juĝoj de la Historio pligravigas la situacion de tiuj, kiuj foriras de la Tero kiel herooj, ne estante tiaj?*

– La solenaj funebraj ceremonioj, la brilaj nekrologoj, la pompaj adjektivoj, kiujn oni konsentas al la “mortintoj” kontraŭ la postlasita oro de la konvencia pozicio, kaŭzas nedireblan afliktiteco al la forpasintoj. Estas peniga la angoro, kiu estiĝas por tiuj suferantaj, menskonfuzitaj Spiritoj, kiuj hontas pri si mem, espertante la plej profundan abomenon kontraŭ la ricevitaj omaĝoj.

Post tiu fazo de la nesincera monda juĝo, oni ofte povos rimarki la senkoherecon de la homoj.

La “iama heroo” revenas en la mondon kun vestoj de almozulo aŭ kruda proleto: per silentaj larmoj li lernas komponi kantikojn pri la sanktigaj devo kaj laboro. Sed neniu vidas

lin, ĉar en la mondhistorio, en ĉiuj tempoj, la homo ĉiam incensadis la tiranecon, kaj nur tre malofte li fiksas sian malkvietan rigardon sur la karesa, humila floro de la virto.

83. – *Ĉu la historiisto respondas por la falsaj juĝoj de la Historio?*

– Konsiderante, ke ĉiu spirito enkarniĝinta havas sian specialan taskon en tiu aŭ alia evolua sektoro, la historiistoj, kiuj sin lasas droni en la ekonomia intereso de la politikaj sinekuroj, ebriigitaj de la vino de la vulgareco, en la transtombo respondos por la komerca ekspluato de la intelekto, kiun ili praktikis sur la Tero, malvirtigante la justicon kaj la juron, evitante la veron, aŭ liverante mensogojn al la kredema spirito de la posteularo.

84. – *Se en la nevidebla sfero iu Spirito ne estas efektive sanktigita estulo, kiel li ricevos la preĝojn de la siaj kultantoj, se la mondhistorio kanonizis lin?*

– La kanonizo estas tre aŭdaca proceso de la homa ambicio por esti konsiderata ĉe la spirita vero.

Ni scias pri inkvizitoroj, ekzekutistoj de gentoj kaj perfidintoj de la bono, kiuj estis kondukataj sur altaron, dank'al la falsa juĝo de la homa politiko. La preĝo por ilia helpo, fare de kultantoj plurfoje ne memorantaj la patrecon de Dio, eĥas en iliaj konsternitaj koroj, kvazaŭ voĉoj de terura, dolora akuzo, ĉar tiuj ĉi plinudigas iliajn vundojn.

Ofte la Spiritoj troviĝantaj en tiu peniga situacio petas al Jesuo, ke Li konsentu al ili la plej modestajn spertojn sur la Tero, por ke ili forgesu la nocan bruadon de la falsa surtera gloro, en la silento de la grandaj doloroj, kiuj iluminas kaj regeneras.

85. – *Ĉu la unuaj surteraj formoj obeis iun specialan modelon antaŭekzistantan?*

– Jesuo estis la dia skulptinto de la geologia verko de la Tero. Kune kun siaj komisiitoj, Li prilumis la ombrajn originojn

per la sublimaj emanaĵoj el Lia amo, emanaĵoj saturintaj ĉiujn substancojn de la tiam formiĝanta mondo.

Ni ne povas aserti, ke, ĉe sia komenca manifestiĝo, la formoj de la Naturo obeis antaŭekzistintan modelon, kvazaŭ ia imitado, ĉar ili ĉiuj ricevis la sanktan influon de la koro de la Kristo.

La vero estas, ke, tiel same, kiel ĉe viaj materiaj konstruaĵoj, ĉiuj verkoj antaŭe vivis en la cerbo de ia inĝeniero aŭ de ia arkitekto, tiel same ĉiuj formoj de vivo sur la Tero estis unue konceptitaj de Lia dia imago.

86. – *Ĉar la Tero formiĝis de la dia povo, kial tiu ĉi planedo trairis tiom da evoluaj stadioj, el kiuj multaj daŭris milionojn da jaroj?*

– En la senfina Universo, la evoluado de la spirita principo nepre eskapas ĉiuj viajn limigojn de tempo kaj spaco, laŭ la tabelo de la surteraj valoroj.

La akiraĵoj de ĉiu individuo rezultas el la leĝo de la persona diligenteco sur la senlima vojo de la Kreado, kaj ĉe tio elstariĝas la plej diversaj evoluaj pozicioj de la homoj, kaj fariĝas kompreneble, ke tempo kaj spaco estas diaj laboratorioj, kie ĉiuj vivoprincipoj estas submetitaj al la pliperfektigaj eksperimentoj, tiel ke ĉiu ŝuldas al si mem ĉiujn farojn, en la tago de la akirado de la plej altaj valoroj de la vivo.

87. – *El kie estis tiritaj la elementoj por la formado de la Tero?*

– Ni scias, ke la molekula aglutino, same kiel la transcenda mondomotoro, obeis la generan blovon de la vivo, devenintan de la Ĉiopova kaj ĵetita sur la senfinan universan kreaĵon. Sed ni ankoraŭ estas simila al la lernanto, kiu trovis la lernejon jam konstruita, kaj tial ni devas laŭdi kaj serĉi, per laboro kaj pliboniĝo, ĝian Dian Aŭtoron.

88. – *Ĉu la surtera homo devas vidi en la geologiaj skuoĵ de la terglobo elementojn de provado por sia vivo?*

– La sismaj skuoj ne estas simplaj akcidentoj de la Naturo. La mondo ne estas direktata de blindaj fortoj. La skuoj de la terglobo estas instrumentoj de kolektivaj provadoj, krudaj kaj penigaj. Ĉe tiuj kataklismoj la homamaso elpagas ankaŭ siajn iamajn krimojn kaj ĉiu membro ĝin konsistiganta kvitiĝas el la individuaj ŝuldoj faritaj en la pasinteco.

89. – *Kial ne ekzistas en la sanktaj tekstoj pozitiva sciigo pri la regionoj eltrovitaj post la veno de Jesuo sur la Teron?*

– Pri tiu afero ni konsentu, ke la profetaĵoj, tra ĉiuj epokoj kaj situacioj de la Tero, kvazaŭ ia eĥo de la diaj regionoj, celis nenion alian ol la konstruadon de la Regno de Dio en la koroj, flankelasante la nefirmajn, pereemajn homajn fondaĵojn. Sed en la disvolviĝo de la revelacioj, vi ektrivos sciigojn pri la novaj regionoj poste eltrovitaj, sciigojn troviĝantajn sub la simbolaj vualoj, kiel okazis al ĉiuj ceteraj informoj, kiujn la Malnova kaj Nova Testamentoj transdonis al la spirita homo.

V

APLIKATAJ SCIENCOJ

90. – *Ĉu la aplikataj sciencoj, kiaj la Terkulturo, la Inĝenierarto, la Medicino, la Edukado kaj la Ekonomio prezentas la laborkampon de la enkarniĝintaj Spiritoj, cele al pliampleksigo de la homaj konoj, por materia profito de la Homaro?*

– La aplikataj sciencoj estas fortoj mobilizitaj por la komforto de la civilizacio; sed, malgraŭ iliaj materiaj karakteroj, estas ja interne de iliaj kadroj, ke organiziĝas la benataj klopodoj de la spirito, ĉe regeneraj provoj aŭ ĉe purigaj misioj, en lia suprenira marŝo al la perfekteco.

Akordante kun la akcesoraj aktivecoj de la ceteraj sciencoj de la Tero, ili ĉiuj harmoniiĝas ĉe la luktoj de la homo, kvazaŭ iaj surteraj rimedoj por la plenumado de la diaj celoj.

91. – *Ĉu, en la kadro de la scienco, la inspiroj el la supera sfero sin destinas al difinitaj studemuloj, aŭ ĉu ili estas senditaj al ĉiuj scienculoj ĝenerale?*

– En la apartaĵoj de la scienca aktiveco iafaje ekzistas tiu aŭ alia misiulo kun tasko specifa kaj al li donita nur pro lia diligenteco.

Sed rilate al novaj ideoj kaj aparatoj en la evoluaj movadoj, la inspiroj el la spirita sfero estas disdonitaj al ĉiuj fluoj de la homa penso, sed ilin kaptas nur tiuj, kiuj estas agorditaj al iliaj vibradoj.

92. – *Aplikante la sciencajn sciojn al la plibonigo de sia medio kaj plialtigo de sia socia nivelo, ĉu ankaŭ la terkulturisto plenumas ian spiritan mision?*

– La homo ankaŭ ricevis gravan taskon ĉe la tera grundo, fonto de subteno de lia vivo, kaj li devas plenumi la bonan servon kulturi kaj plibonigi la agrokulturon, kiu provizore kuŝas sub lia mastrado, ĉar en la laborejo de la terglobo li ja preparas sin por sia senfina estonteco plena de beleco kaj definitivaj faroj en la eterna sfero.

93. – *Ĉu la inĝeniero, plivastigante la eblecojn de interpopola komunikado, per la utiligado de la materiaj posedaĵoj de la terglobo, estas ja helpata de la spiritaj fortoj?*

La fontoj de protekto el la nevidebla sfero helpas al la noblaj, sinceraj klopodoj, celantaj ne nur la plibonigon de la tera lernejo, sed ankaŭ tiun de ĝiaj idoj. Tiamaniere, ni devas rekoni en la abnegacia inĝeniero iun laboriston de la progreso kaj frateco.

Tiu estas la motivo, kial kvankam materiaj, la grandaj inĝenieraj verkoj posedas, ĉe sia bonfara aspekto, tre altan signifon, pro la vasteco de sia utileco por la kolektiva spirito.

94. – *Kiel, en la spiritaj sferoj, estas konsiderata la surtera Medicino?*

– Komprenata kaj aplikata laŭ siaj superaj celoj, la homa Medicino estas nobla spirita misio.

La honesta, sincera kuracisto, amiko de la vero kaj sindonema al la bono, estas ja apostolo de la Dia Providenco, de kiu li ricevas la necesan helpon kaj inspiron, kiaj ajn estas la religiaj principoj al kiuj li sin donis en la vivo.

95. – *Rilete la penojn de la Medicino, kiel ni konsideru la sanon?*

– Por la surtera homo sano povas signifi la perfektan ekvilibron de la materiaj organoj; por la spirita sfero tamen sano estas la perfekta harmonio de la animo, por kies akiro estas plurfoje necesa la altvalora kontribuo de la malsanoj kaj nedaŭraj surteraj neperfektaĵoj.

96. – *Ĉu ĉia korpa malsano havas spiritajn kaŭzojn?*

– La vundoj de la animo manifestiĝas tra la homa envolvvaĵo. La malsana korpo spegulas la internan staton de la malsana Spirito. La patogenezo estas tuto da malsuperaĵoj de la psika aparato.

En la animo kuŝas ja la primara fonto de ĉiuj definitivaj kuracaj rimedoj. La farmacia helpo en la mondo ne povas formovi la transcendantajn kaŭzojn de la malsana karaktero de la individuoj. La efika kuracilo estas en la agado de la malsana spirito mem.

Vi povas kontraŭdiri, ke la injekcioj kaj tablojdoj forigas la doloron; sed la malsano reaperos pli malfrue en la ĉeloj de la korpo. Afliktite, vi demandas pri la malsanoj nekuraceblaj por la surtera scienco, kaj mi diros al vi, ke la reenkarniĝo per si mem jam prezentas, en la cirkonstancoj de la mondo maljuniĝinta pro la misuzoj, ian stadion de flegado kaj kuracado, kaj ke estas animaj malsanoj tiel persitaj, ke ili povas postuli plurajn sinsekvajn stadiojn, kun la sama intensecon, kiel en la regeneraj procesoj.

97. – *Se la malsanoj havas spiritan originon, ĉu estas ĝusta la aplikado de homaj medikamentoj, de la kirurgo, ktp, ktp?*

– La homo devas mobilizi ĉiujn atingeblajn rimedojn por sia organa ekvilibro. Ankoraŭ dum longa tempo, la homaro ne povos forlasi la kontribuon de la kuracisto, de la kirurgisto kaj de la farmaciisto, misiuloj de la kolektiva bono. La homo flegos la korpan sanon, ĝis li lernos antaŭsavi kaj defendi ĝin, konservante la altvaloran sanon de sia animo.

Super ĉio, ni devas konfesi, ke la servoj por defendo de la organaj energioj, ĉe la homaj procesoj, kiel ili nun efektiviĝas, certigas la firmecon de granda fabrikejo de sanktigaj penoj en la mondo. Sed kiam la spirita homo superregos la fizikan homon, tiam la medikamentaj elementoj el la Tero estos ŝanĝitaj en la bonegajn psikajn rimedojn, kaj tiu granda fabrikejo aliĝos en sanktejon de spiritaj fortoj kaj eblecoj ĉe la animoj.

98. – *Ĉe la procesoj de sanigo, kiel ni komprenu la fluigon de emanaĵo?*

– Same kiel la transfuzo de sango estas ia renovigo de la fizikaj fortoj, tiel same la fluigo de emanaĵo estas ia transfuzo de psikaj energioj, kun la diferenco, ke la organaj rimedoj estas eltirataj el limigita provizejo, kaj la psikaj elementoj venas el la senlima provizejo de la spiritaj fortoj.

99. – *Kiel ni ricevu kaj fluigu emanaĵon?*

– La fluigo de emanaĵo povos obei procedon kun plej granda procento da fidindeco, ne nur por la aplikanto, sed ankaŭ por la ricevanto. Ni klarigu tamen, ke la fluigo de emanaĵo estas la trandono de psika kaj spirita forto, estante nenecesa ĉia fizika kontakto ĉe ĝia aplikado

100. – *Ĉu la tiel nomata “benado”, konata en la popularaj medioj, estas ia aspekto de la fluigo de emanaĵo?*

– Ĉiam, kiam ili estas uzataj por karitato, la tiel nomataj “benadoj”, tiel komunaj en la populara medio, estas malgravaj aspektoj de la regenera fluigo de emanaĵo, vulgarigita ĉe la spiritistaj helpinstitucioj.

Jesuo donis al ni la unuan ekzemplon tiaspecan, surmetante siajn diajn manojn sur malsanulojn kaj suferantojn, pri kio Li estis imitata de la apostoloj de la primitiva Kristanismo.

“Ĉiu bona donaĵo kaj ĉiu perfekta donado estas de supre”⁽¹⁾ – diris la apostolo, en siaj profundaj instruoj.

La praktiko de la bono povas prezentiĝi laŭ plej diversaj aspektoj. Sed ĝia esenco estas ĉiam la sama antaŭ la Sinjoro.

101. – *Kial ne estas permesite al la Spiritoj la revelacio de procesoj de kuracado de lepro, kancero, ktp?*

– Antaŭ ĉia konsidero, ni ekzameni la provoleĝon kaj la neceson de ĝia plenumado.

En la naturo mem de la Tero kaj ĉe la organizado de la fluidaĵoj propraj al via planedo kuŝas ja ĉiuj tiuj rimedoj ĝis hodiaŭ nekaptitaj de la homa scienco. Jesuo kuracadis la leprulojn per la simpla surmeto de siaj manoj.

La spirita plano ne povas rompi la ritmon de la leĝoj de la diligenteco, same kiel la direkcio de unu lernejo ne povas klarigi la problemojn rilatajn al la evoluado de siaj lernantoj.

Krom tio, la nekuracebla malsano portas en si profundajn bonojn. Kio estus kun la surteraj kreitoj sen la doloraj malsanoj putrigantaj al ili la vantamon? Ĝis kie povus iri la fiero kaj la aroganteco de la homa spirito sen la konstanta minaco de ia febla, turmentita karno?

Ni observu la Diajn donacojn sur la kampo de la grandaj eltrovoj, donacoj mobilizitaj por la ekstermomilitoj, kaj ni rigardu kun simpatio la hospitalojn izolitajn kaj mallumajn, kie multfoje la homa animo enfermiĝas por la necesaj meditadoj.

102. – *Ĉu la amikaj Spiritoj povas influi la mikroban flaŭron ĉe la nekuraceblaj malsanoj, mildigante la suferojn de la homo?*

– La amikaj Spiritoj povas malgradigi la intensecon de la doloro ĉe la nekuraceblaj malsanoj, kaj tute forigi ĝin, se tiu bono povos efektiviĝi en la kadro de la individuaj provadoj, laŭ la saĝaj, favorkoraj projektoj de la supera sfero.

⁽¹⁾ Jakobo, 1:17. – **La Trad.**

103. – *Ĉe la kuracado fare de la amikaj Spiritoj, ĉu la akvo magnetizita por unu malsanulo havas la saman efikon sur alian malsanulon?*

– Ĝenerale, la akvo povas esti magnetizita en profito por ĉiuj; sed ĝi ankaŭ povas esti magnetizita speciale por ia malsanulo, kaj, tiaokaze, konvenas, ke la uzo estu persona kaj ekskluziva.

104. – *Por ke la amikaj Spiritoj povu magnetizi puran akvon, ĉu ekzistas specialaj kondiĉoj, kiel, ekzemple, la ĉeesto de sanigivaj medioj, kuniĝoj de diversaj personoj, ktp, ktp?*

– La karitato ne povas priamenti specialajn situaciojn. La ĉeesto de sanigivaj medioj, tiel same kiel la specialaj kunsidoj, neniel povas esti la prezo de bonfaro al la malsanuloj, ĉar la rimedoj de la spirita gvidantoj, en tiu agokampo, povas nedependi de la mediuma kunlaboro, konsidere al la problemoj de la individuaj meritoj.

105. – *Ĉu la fakto, ke unu spirita gvidanto receptas por ia malsanulo, nepre signifas, ke tiu ĉi estos resanigita?*

– Ankaŭ la spirita gvidanto estas frato kaj amiko, kiu neniam vundos viajn plej karajn esperojn.

Konsilante pri la uzo de medikamenta substanco, rekomendante ĉi tiun aŭ tiun antaŭzorgon, li kunlaboros por la pliboniĝo de malsanulo, kaj, se eble, por lia kompleta fizika resaniĝo, sed li ne povos modifi la leĝon de la provoj aŭ la superegajn projektojn de la superaj sferoj, okaze de elkarniĝo, ĉar, laŭ la Leĝo, nur Dio, lia Kreinto, povas lin senigi de suferoj.

106. – *En kazoj de nekuracebla malsano, ĉu eŭtanazio estas bono?*

– La homo ne havas la rajton praktiki eŭtanazon en iu ajn okazo, eĉ ne en tiuj okazoj, kiam ĝi estas ŝajna elmonro de bonfaro.

Daŭra agonio povas havi utiligan celon por la animo kaj la nekuracebla malsano eble estas bono, kvazaŭ la sola valvo

por elfluo de la neperfektaĵoj de la spirito marŝanta al la sublima akirado de la riĉaĵoj de la senmorta vivo. Krome, la diaj projektoj estas nesondeblaj, kaj la nefirma scienco de la homoj ne povas decidi pri la transcendantaj problemoj de la spiritalaj bezonoj.

107. – *Ĉu spiritisma hospitalo havas utilon por la spiritisma familio?*

– La fondo de hospitalo, ĉe kies kuracprocesoj estas vivaj la principoj de la evangelia Spiritismo, estas ja nobla realigo altiganta la konsolajn instruojn de la ĉielaj senditoj.

Tiaspecaj fondaĵoj tamen postulas maksimuman rezignacion flanke de tiuj, kiuj ilin efektivigas, ĉar en ili la monda kuracisto estas devigita forgesi la universitatajn titolojn, por fariĝi unu el la plej aŭtentikaj misiuloj de Tiu Kuracisto de Animoj, kiu kuracis la blindulojn kaj la leprulojn, la malgajulojn kaj la demonhavantojn, donante ekzemplon de amo kaj humileco en la meĥanismo de ĉiuj servoj por la bono de la similuloj.

Spiritisma hospitalo devas esti hejmo de Jesuo.

Ĝiaj aparatoj estas ia dia maŝinaro, postulanta identan superecon en la servistoj vokitaj por movi ĝiajn pecojn, tiel ke ne estu difektita la profunda grandeco de ĝiaj celoj.

108. – *Kie troviĝas la plej nobla bazo por la edukaj metodoj?*

– La religiaj scioj, kun la ekzemploj de la plej altaj devoj de la vivo, estas ja la bazo de la tuta edukado, en la sankta familisistemo.

109. – *Ĉu la infanaĝo estas la plej grava periodo por la eduka tasko?*

– La infanaĝa periodo estas la plej serioza kaj la plej favora por la asimilado de la edukaj principoj.

Ĝis la aĝo de sep jaroj la spirito ankoraŭ troviĝas en fazo de adaptiĝo al la nova ekzistado, lin koncernanta en la mondo. Ĉe tiu aĝo ankoraŭ ne ekzistas perfekta interligiĝo inter li

kaj la organa materio. Tial, liaj rememoroj pri la spirita sfero estas pli vivaj, plifaciligante la renovigon de lia karaktero kaj la starigon de nova vojo por la firmigo de la principoj de respondeco, se li trovos en siaj gepatroj efektivajn reprezentantojn de la familia grupo.

Jen kial la hejmo estas tiel grava por la edifado de la homo, kaj kial estas tiel profunda la misio de la virino antaŭ la diaj leĝoj.

Post la infanaĝo, inda je ĉia atento kaj kareso de la patraj energioj, la procesoj de morala eduko, formantaj la karakteron, fariĝas pli malfacilaj por la interligiĝo de la Spirito al sia materiala organa mondo. Kaj, atinginte la plenaĝecon, se la edukado ne fariĝis en la hejmo, tiam, nur la perforta proceso de la krudaj provoj, en la mondo, povas renovigi la personon kaj la komprenon de la homoj, ĉar la reenkarigiĝinta animo jam reprenis sian tutan nocan posedaĵon de la pasinteco kaj ĝi nepe ripetos la samajn erarojn, se mankis al ĝi la internan lumon de la sanktaj edukaj principoj.

110. – *Kiu estas la plej bona lernejo por preparado de la reenkarigiĝintaj animoj, sur la Tero?*

– La plej bona lernejo ankoraŭ estas la hejmo, kie la homo ricevos la bazojn de la sento kaj de la karaktero.

La lernejoj propre de la mondo povas instrui, sed sole nur la familio povas eduki. Jen do la kaŭzo, kial la universitato povas fari la civitanon, sed nur la hejmo kapablas edifi la homon.

En sia grandioza tasko de kristanigo, tiu estas la tre grava celo de la evangelia Spiritismo, nome: prilumi la konsciencon de la homo, por ke la hejmo restariĝu kaj nova ciklo de spirita progreso manifestiĝu, ĉe la homoj, en kristanaj hejmoj, por la nova erao de la Homaro.

111. – *Ĉu estas justa la fondado de institucioj por seksa edukado?*

– Kiam la surteraj instruistoj estos tute senzorgaj pri la administraciaj tabeloj, pri la oficialaj helpoj, pri la klasifiko de salajroj, pri la elstaraj pozicioj en la instruado, pri la

promocioj, ktp, kaj rigardos siajn gelnantojn kvazaŭ amatajn infanojn de sia koro, tiam estos juste pensi pri la fondo de tiaj edukejoj, ĉar tiam estos multe da amo en la animoj, certigante la sukceson de tiuj iniciatoj.

Konsiderinte la aŭtentikajn esceptojn, la surteraj instruistoj tamen ankoraŭ estas nenio alia ol ŝtataj oficistoj, afliktitaj de la profesia konkurado. Ĉe la sankta instrua misio, ili informas la intelekton, sed ĝenerale ili ankoraŭ ne scias prilumi la koron de la gelnantoj, ĉar al ili mem mankas la propra prilumo.

Tiel ekzameninte la aferon, kaj atentante la cirkonstancojn de la evolupozicioj, ni konsideras, ke la gepatroj estas la majstroj nature indikitaj por tiu tasko, ĝis nia mondo posedos ĉie la verajn lernejojn de Jesuo, kie la virino, ĉe iu ajn civila stato, integriĝu al la dia misio de spirita patrino de siaj etaj zorgatoj, kaj kie la viro, vokita al la eduka laboro, transformiĝu en centron de patreca amo kaj ama respekto al siaj gelnantoj.

112. – *Kiel renovigi la edukprocesojn por la plibonigo de la mondo?*

– La surteraj instrulernejoj ĉiam povos renovigi siajn pedagogiajn metodojn per ĉi tiuj aŭ tiuj novaj procedoj, laŭ la infanpsikologio, sed la eduka lernejo de la hejmo havas sole nur unu fonton de renovigo, kiu estas la Evangelio, kaj sole nur unu modelon de majstro, kiu estas la sublima personeco de la Kristo.

113. – *Ĉu la spiritistaj gepatroj devas doni la doktrinan edukon al siaj infanoj, aŭ ĉu ili povas ne fari tion, argumentante, ke, pri religia afero, ili preferas la plenan liberecon de siaj infanoj?*

– La infanaĝo, en sia unua fazo, estas la plej grava periodo por ĉiuj edukaj bazoj, kaj la kristanaj spiritistaj gepatroj ne povas forgesi siajn devojn de orientado al siaj infanoj, ĉe la grandaj okazaĵoj de la vivo. En nenia okazo tiu unua stadio de la surteraj luktoj devas esti indiferente rigardata.

La preteksto, ke la infano devas elvolviĝi kun la maksimuma nocio pri libereco, povas okazigi gravajn danĝerojn. Jam estis dirite, en via mondo, ke libera infano estas semo de krimulo. Ĉu la reenkarigi ne estas, per si mem, ia konsiderinda limigo al la absoluta sendependeco de la animo, bezonanta kulpe-laceton kaj korektadon?

Krom tio, la spiritistaj gepatroj devas kompreni, ke ĉia indiferento en tiu rilato povas konduki la infanon al aliaj religiaj antaŭjuĝoj, al alligiĝo al la konveneco, kaj al la manko de amo al la vero.

La infana koro devas sin nutri per la kredo, per la boneco, per la espero kaj per la fido al Dio. Agi kontraŭe al tiuj normoj estas malfermi al la hieraŭa pekinto la saman larĝan pordon al la ĉiaspecaj eksceso, kondukantaj al sindetruo kaj al krimo.

La spiritistaj gepatroj devas kompreni tiun karakteron de siaj sanktaj devoj, konsciante, ke la hejmo ne stariĝis por la egoisma kontemplado de la homo, sed, kontraŭe, por esti la sanktejo, kie iafoje estas postulataj la rezignacio kaj la sinofero de tuta ekzistado.

114. – Ĉu la ekonomio devas esti direktata?

– koncerne la teknikon de produktado, la neceson de disdivido kaj la konsumprocedojn, estas pli ol justa la direktado de la ekonomio. Sed, en tiu senco, ĉia politika eksceso, malutiliganta la harmonion de la leĝo de interŝanĝoj, de kiu tute dependas la progreso, estas kondamninda eraro kun danĝeraj sekvoj por la tuta strukturo de la kolektiva organismo.

Tiuj eksceso okazigis la aŭtarkiajn sistemojn de regado en la nuntempo, kiam pereas ĉiuj idealoj de ekonomia justeco kaj frateco, pro la eraraj vidpunktoj de la malbona naciismo.

La vivo dependas de konstantaj interŝanĝoj kaj ĉia limigo al tiuj altaj principoj de harmonio estas transiro al revolucia eldetruo, kie inversiĝas ĉiuj vivovaloroj.

Estu direktata la ekonomio, sed la politikaj pasioj ne penetru en ĝiajn kampojn de ekvilibro kaj reciprokeco, ĉar, pro sia pereiga influo, la “memsufiĉo” estas la nigra ideologio de la ambicio kaj egoismo, kie la fermento de la milito trovas la favoran klimaton por siaj manifestoj de perforto kaj ekstermado.

DUA PARTO

FILOZOFIO

115. – *Ĉu la Fiologio estas konciza interpretado de ĉiuj aktivecoj de la spirito evoluanta sur la Tero?*

– La Filozofio estas, efektive, la renumo de la evoluaj aktivecoj de la enkarniĝinta Spirito sur la Tero.

Ĝiaj rezultoj estas la energioj fekundigantaj la Sciencon, malmateriigante ties principojn, ĝis kiam, nedisigeble kuniĝintaj unu al la alia, ili penetros en la dian atrion de la eternaj veraĵoj.

I

VIVO

LERNADO

116. – *Ĉu la fizika homo estas ĉiam ligita al sia spirita pasinteco?*

– Ĉar la plimulto de la homoj troviĝas ĉe elaĉetaj luktoj, ni povas prezenti la surteran homon kiel iun, luktantan por liberiĝi de sia propra kadavro, kiu estas la kulpa pasinteco, por ascendi al la vivo kaj al la lumo kuŝantaj en Dio.

Tiun bildon ni vidas en la semo de la mondo, kiu, por elvolvi sian embrion plenan de vivoforto kaj beleco, bezonas kelkatempan restadon en la ŝlima sino de la Tero, por liberiĝi de sia volvaĵo, poste kreskante en la direkto al la sunlumo kaj

plenumante sian sanktan mision ornamitan per floroj kaj fruktoj.

117. – *Konsiderate laŭ la homa modelo, ĉu la inteligento estas la resumo de la diversaj spertoj de la Spirito sur la Tero?*

– La intelektaj valoroj prezentas la sumon de multaj spertoj en diversaj ekzistadoj de la Spirito en la materia sfero. Profunda inteligento signifas grandegan amason da surteraj luktoj. Se la homo, atinginte tiun pozicion, konservas ĉe si mem identan karakteron de spirita progreso per la sento, tiam li estos kapabla altiĝi al novaj sferoj de la Senfino, por la konkero de sia perfekteco.

118. – *Kiel estas registrataj la spertoj de la Spirito en ia enkarniĝo, por ke ili servu kiel evolua posedaĵo en la postaj enkarniĝoj?*

– En sia propra interna posedaĵo la animo registras siajn spertojn akiritajn dum la lernado, ĉe la vivoluktoj. Li ĉiam gardos pri ili ian denaskan rememoron dum la purigaj laboroj de la estonteco.

119. – *Kiel ni konduku por plilarĝigi nian spiritan kapablon?*

– Ni ankoraŭ ne trovis ian konduton pli noblan kaj pli belan ol tiun de la propra diligenteco kun humileco kaj amo en la medio de laboro kaj lecionoj sur la Tero, kie Jesuo konsentis instalii nian metiejon de perfektigebeco por la estonta nobligo de niaj destinoj de senmortaj spiritoj.

120. – *Ĉu povas ekzisti inteligenteco sen spirita elvolviĝo?*

– Ni parolu pli klare: homa inteligenteco sen sentelvolviĝo, ĉar sur tiu maelekvilibro inter sento kaj racio kuŝas nuntempe la dolora realaĵo de la mondo. La surtronigo nur de la inteligenteco, forgesante la efektivajn valorojn de la koro sur la vojoj de la vivo estis ja la granda eraro de la homaro.

121. – *Ĉu la medio influas sur la spiriton?*

– La medio, kie la animo renaskiĝis, plurfoje estas la elaĉeta provo. Ĉar ĝi potence influas sur la personecon, la nobla koro nepre kunlaboru por ĝia pliboniĝo, plibonigante kaj plialtigante la materiajn kaj moralajn kondiĉojn de ĉiuj, kiuj vivas sur lia kampo de influo.

122. – *Kion ni faru por la elvolviĝo de la intuicio?*

– La kampo de persista studo, kune kun la sincera diligenteco kaj la altpensa meditado, estas ja la granda vehiklo por la plilarĝigo de la intuicio, en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

123. – *Ĉu la kredanto devas krei al si mem absolutajn devigojn, celante atingi pli rapide la spiritan perfektigon?*

– La kredanto devas kiel eble plej multe klopodi, sed li neniel nutru la pretendon atingi per unu fojo la kompletan spiritan superecon, ĉar la homa vivo estas lernado de purigaj luktoj, kaj, en la elaĉeta krisolo, ne ĉiam la temperaturo povas esti milda, sed iafoje devas atingi la plej altan gradon por la dezirata purigado.

En ĉiuj cirkonstancoj la kristano preĝu kaj viglu: aktiva preĝo, kiu estas la laboro de bono, kaj vigeleco, kiu estas la necesa prudento por ne preni sur sin novajn kompromisojn. Kaj, en tiu klopodo, la animo estos preparita por strukturi sian propran estontecon sur la eterna vojo de la spaco kaj tempo, sen la senkuraĝiĝo de la malĝojaj kaj sen la maltrankvileco de la plej kuraĝaj.

124. – *Kia estas la graveco de la homa parolo por la evoluo de la spirito?*

– La parolo estas dia bono, se akompanata de la agoj ĝin atestantaj. Per ĝiaj parolaj aŭ skribaj signoj, la homo ricevas la posedaĵojn de sanktaj spertoj de ĉiuj, kiuj antaŭiĝis al li en la evolua meĥanismo de la civilizacioj. Per ĝia forto, la dia fajro de la progreso, en la benata surtera lernejo, transiras de generacio al generacio.

125. – *Konfesante, ke niaj amikoj el la spirita sfero ĉiam estas ĉe ni, ĉe ĉiuj laboroj kaj malfacilaĵoj, por nin inspiri, kiuj estas la plej grandaj malhelpoj, kiujn ilia bonkoreco trovas ĉe ni, por ke ni ricevu ilian nerektan, ameman, efikan helpon?*

– La plej grandaj psikaj malhelpoj, kiujn la surtera homo antaŭmetas al siaj spiritaj amikoj kaj mentoroj, originas el la manko de sincera humileco en la koroj, humileco necesa por la ekzamenado de la propra situacio de egoismo, ribeleco kaj bezono je sufero.

126. – *Ĉu la vibroj rilataj al la bono kaj malbono, eligitaj de la enkarniĝinta animo dum sia surtera lernado, daŭras plu en la Spaco, por la ekzameno kaj pesado de la estonteco?*

– Vi devos konsenti kun ni, ke ekzistas fizikaj fenomenoj tro transcendantaj, por ke ni povu ilin ĝuste ekzameni en la mallarĝaj limoj de viaj nuntempaj scioj.

Temante tamen pri vibroj elsenditaj de la enkarniĝinta Spirito, ni estas devigitaj konfesi, ke tiuj vibroj restas porĉiame gravuritaj sur la memoro de ĉiu homo; kaj la memoro estas kvazaŭa fotografa plako, kie la figuroj neniam konfuziĝas. Sufiĉos la manifesto de la memoro, por ke efektiviĝu pli malfrue ĉiuj konsideroj sur la kampo de la esprimoj de malbono kaj bono.

127. – *Ĉu la instruo “sana korpo, sana menso” povas esti observata sole nur per la praktikado de sportoj kaj atletismo?*

– Rilate la “sanan korpon”, atletismo ludas gravan rolon kaj havus plej edifan agadon ĉe la problemo de la fizika sano, se la homo, en sia vantamo kaj egoismo, ne estus difektinta ankaŭ la fonton de gimnastiko kaj sporto, aliigante ĝin en scenejon por surtronigo de perforto, de la morala bastardigo de la junularo iluziita per la bruta forto kaj trompita per la imperativoj de la tiel nomata eŭgenio aŭ per la strangaj konkuroj de la sektaj grupoj, deturnante de ĝiaj noblaj celoj unu el la grandaj kolektivaj movadoj por kunfratiĝo kaj sano.

Sufiĉos ja tiu rimarko, por ke ni komprenu, ke “sana menso” estos realaĵo nur tiam, kiam estos perfekta ekvilibro inter la mondomovadoj kaj la internaj konkeroj de la animo.

128. – *Ĉu ankaŭ la vivo de besto havas misiajn karakterojn?*

– La besta vivo ne estas ĝustedire ia misio, sed ĝi prezentas ian superan celon, kiu estas ĝia propra perfektigo laŭlonge de la bonfaraj spertoj de laboro kaj akirado de la sanktaj principoj de la intelekto, tra senĉesaj, paciencaj penadoj.

129. – *Ĉu estas eraro la fakto, ke la homo sin nutras per besta vianto?*

– La englutado de besta viando estas ja eraro je gravaj sekvoj, el kiu originis malbonaj kutimoj de la homa nutrado. Estas bedaŭrinda tiu situacio, des pli ĉar, se la materia stato de la homo postulas la kunagadon de certaj vitaminoj, tiuj nutraj valoroj povas troviĝi en la vegetalaj produktoj, sen la absoluta bezono de buĉejoj kaj fridujoj.

Sed ni devas konsideri la ekonomian maŝinon de la intereso kaj kolektiva harmonio, en kiu tiom multe da laboristoj fabrikas sian ĉiutagan panon. Ĝiaj pecoj ne povas esti subite detruataj sen gravaj danĝeroj. Ni konsolu nin ĉe la vido de la estonteco, kaj estas juste, ke ni sindone laboru por la alveno de novaj tempoj, kiam la surteraj homoj ne plu bezonos sin nutri per la sangaj restaĵoj de siaj malsuperaj fratoj.

130. – *Kiel ni, laborantoj ĉe la surtera lernado, povos rigardi la sanktan tekston: “memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta” ⁽¹⁾, kiam la laborkontraktoj difinas por tio la dimanĉon?*

– La homo devas sanktigi la dimanĉan ripozon ne pro tio, ke temas pri dimanĉo, sed pro la bezono starigi semajnan paŭzon al la agado de la fizika vivo, por spirita rifuĝo de la

⁽¹⁾ Eliro, 20:8. – **La Trad.**

animo en sin mem, sur la vojo de la surtera aktiveco. La dimanĉa ripozo plene anstataŭas la antikvan sabaton, kaj ni atentigu, ke la rigideco de ĝia observado estis starigita de la hebreaj leĝodonintoj pro la ambicio kaj potenco de la sinjoroj de sklavo, en tiu epoko tre nombraj, kaj kiuj nur tiamaniere obeis la homaman normon, permesante halton al la laciga diligenteco, kutime neniiganta la vivon de malfortaj, sendefendaj sklavoj.

La homo ĉiam devas dediĉi la semajnan ripozon al la spiritalaj praktikoj de sia vivo, sed ne sindonante al iu ajn eksceso laŭ la senco de la litero en tiu afero, ĉar post la vorto de Moseo, ni devas aŭdi la lecionon de la Sinjoro, kiu klarigis, ke “la sabado estiĝis por la homo, kaj ne la homo por la sabato”.⁽¹⁾

SPERTO

131. – *Kiel la enkarniĝinta Spirito akiras sperton?*

– La lukto kaj la laboro estas tiel nepre necesaj por la pliperfektigo de la spirito, kiel la materia pano estas neforigebla por la subtenado de la fizika korpo. Laborante kaj luktante, suferante kaj lernante, la animo akiras la necesajn spertojn dum sia marŝo al perfektigo.

132. – *Ĉu estas, samtempe, determinismo kaj libera volo en la homa ekzistado?*

– Determinismo kaj libera volo kunekzistas en la vivo, eniĝante unu en la alian sur la vojo de la destinoj, por la altiĝo kaj elaĉeto de la homoj.

La unua estas absoluta en la plej malaltaj evoluaj tavoloj, kaj la dua pligrandiĝas per la valoroj de la edukado kaj sperto. Plie, ni rimarku, ke super ili ambaŭ staras la diaj ordonoj, bazitaj sur la sankta, unika leĝo de amo, kies plej elokventa atesto ĉiam estis la profetaĵoj.

⁽¹⁾ Marko, 2:27. – **La Trad.**

Ĉu vi ne rimarkas nun la okazaĵojn antaŭviditajn de la senditoj de la Sinjoro jam antaŭ du kaj kvar jarmiloj, en la diaj simboloj de la Sankta Skribo?

Fiksita la veraĵo, ke la homo estas libera laŭ siaj edukado kaj meritoj, laŭ la leĝo de la provoj, koncernas nin konfesi, ke, laŭmezure kiel li fariĝas respondeca, la homo mem organizas la determinismon de sia ekzistado, pligrandigante aŭ mildigante ŝian rigorecon, ĝis li povos definitive altiĝi sin ĝis la superaj sferoj de la Universo.

133. – *Se ekzistas samtempe determinismo kaj libera volo, en la homa vivo, kiel ni komprenu la parolon de la spirita gvidantoj, kiam tiuj ĉi asertas, ke al ili ne estas eble influi sur nian liberecon?*

– Ni ne devas forgesi, ke ni parolas pri korpa valoro, kiam temas pri la natura determinismo, pli influanta la homajn destinojn.

La submetiĝo de la homo, en la limoj de lia fizika mondo, estas logika kaj natura laŭ la leĝoj de la kompensoj, en la necesaj provoj, sed, en sia interno, regiono de pura spirita influado, la homo estas libera por elekti sian estontan vojon. Liaj amikoj el la nevideblo tie lokas la sanktejon de lia sankta sendependeco.

En ĉiuj situacioj la edukita homo povas rekoni, kie la cirkonstancoj de la Dia volo parolas favore por li, kaj kie parolas tiuj, kiujn formiĝas per la forto de lia persona vantamo aŭ per lia egoimo. Ĉe li ĉiam do troviĝos la merito de la elekto, en tiu punkto.

134. – *Kiel la homo povas pligrandigi aŭ mildigi la determinismon de sia vivo?*

– En la sankta universa leĝo la dia determino ĉiam estas tiu de la bono kaj feliĉo, por ĉiuj homoj.

Ĉu vi ne vidas, en la homa hejmo, ameman, aktivan patron kun vasta programo de laboro por la feliĉo de siaj infanoj? kaj, ĉesinte la penado de la eduko en la infanaĝo, ĉu ĉiu infano ne devus esti, ĉe la preparo por la vivo, ia fidela kunlaboranto de la grandanima gepatra antaŭzorgo por la bono de la tuta

familio? La plimulto de la homaj gepatroj tamen foriras de la Tero, ne estante komprenataj, malgraŭ ĉia penado en la edukado de siaj infanoj.

Kompare kun la dia patreco, en tiu modesta figuro ni vidas ian similaĵon de la situacio.

La spirito, iel konservanta iajn edukajn valorojn, estas kunvokita al tiu aŭ alia respondeca laboro kune kun aliaj estuloj en kruda provado, aŭ serĉantaj konojn por akiro de libereco. Tiu laboro devas esti farita laŭ la rekta linio de la bono, tiamaniere, ke tiu infano estu la bona helpanto de sia Superega Patro, kiu estas Dio. La administranto de institucio, la estro de laborejo, la verkinto de libro, la instruisto ĉe lernejo, havas sian parton de sendependeco por kunlabori en la dia verko, kaj ili devas reciproki la spiritan konfidon donitan al ili. Tiuj, kiuj edukiĝas kaj konkeras naturajn rajtojn proprajn al la personeco, ĉesas tute obei en la evolua determinismo, ĉar ili estos kapablaj kunlabori per ordonoj, kaj povos krei cirkonstancojn por la suprenira marŝo de siaj subuloj aŭ homaj fratoj, ĉe la meĥanismo de la klara konscienco.

En tiu laboro ordoni kun Dio, la infano devas konsideri la patrajn zorgemon kaj amon, por ke li ne deturnu sian taskon for de la rekta vojo, supozante, ke li estas arbitra sinjoro de la situacioj, komplikante la vivon de la homa familio, kaj prenante certajn kompromisojn iafoje tre penigajn, ĉar, kontraŭ la intenco de la patroj, ekzistas infanoj, kiuj misuzas la “talantojn” metitajn en siajn manojn, pro mallaboremo, egoismo, vantamo kaj fiero.

De tio la neceso, ke ni konkludu kun la apologio de la Homaro, reliefigante, ke la homo atinginta ian parton de libereco reciprokas la konfidon de la Sinjoro, ĉiufoje kiam li agas laŭ Lia favorkora, saĝa volo, rekonante, ke lia individua klopodo estas tre valora ne pro li, sed pro la amo de Dio, kiu lin protektas kaj prilumas en la konstruado de sia senmorta verko.

135. – *Se la dia determinismo estas tiu de la bono, kiu do kreis la malbonon?*

– Lia dia determinismo konsistas el ununura leĝo, kiu estas la leĝo de amo al la universa komunumo. Sed, fidante al si mem,

pli ol al Dio, la homo transformas sian malfortecon en fokuson de agoj kontraŭaj al tiu sama leĝo, tiamaniere efektivigante ian nekonvenan intervenon en la dia harmonio.

Jen estas la malbono.

Urĝas al ni rekunigi la sanktajn ĉenerojn de tiu subluma harmonio.

Jen estas la elaĉeto.

Vidu do, ke la malbono, konsiderata en sia esenco, ne povas ekzisti por Dio, ĉar ĝi estas devio de la homo, kiu estas nulo rilate la diajn saĝon kaj providencon.

La Kreinto ĉiam estas la grandanima kaj saĝa, justa kaj amika Patro, konsideranta la devojiĝintajn filojn, spertantajn longajn provojn. Sed, ĉar Jesuo kaj ties komisiitoj estas liaj diaj kunlaborantoj, kaj ili mem estigas la taskojn kontraŭ la deturno de la homoj, ili enfokusigas la malutilojn de la malbono per la forto de siaj edukaj respondumoj, por ke la Homaro rekte iru sian veran vojon al Dio.

136. – *Ĉu ekzistas estaĵoj agantaj sur la Tero, sub absoluta determinismo?*

– La bestoj kaj la preskaŭ sovaĝaj homoj donas al ni ideon pri estaĵoj agantaj sur tiu ĉi planedo, sub absoluta determino. Kaj tiuj estaĵoj servas por starigi la malluman realaĵon de la monda etoso ankoraŭ malproksima de la amoformulo, per kiu la homo devas fariĝi la efektiva kunhelpanto de Dio, ordonante per sia patra saĝeco.

Ne sciante ami la bestojn kaj siajn fratojn pli malklerajn, metitajn sub ilia senpera protekto, la plej edukitaj homoj sur la Tero ekstermas la unuajn, por sin nutri per ili kaj sklavigas la duajn, por krudaj ekspluatadoj, kun esceptoj, por ilin mobilizi je profito pro siaj egoismo kaj ambicio.

137. – *Ĉu la edukita homo devas vigli super sia grado de libereco?*

– La homo bezonas ja plejmulte vigli super sia propra sendependeco.

Kiam la edukita homo permesas al si ekzameni aliulan konduton, senpripense aŭ nekonvene, tio signifas, ke lia vigleco

suferas danĝeran mankon, ĉar ies libereco finiĝas tie, kie komenciĝas aliula libereco, kaj ĉiu respondos por si mem, iam, antaŭ la Dia Vero.

138. – *Rilate la demandojn pri determinismo, ĉu ĉiu ajn raciulo povas esti submetita al eraroj?*

– Ĉiu raciulo povas erari, sed li ne devas esti subigita al eraro.

En sferoj de provoj kaj spertoj, kia la Tero, la eraro ĉiam devas esti rigardata kiel tiuj spertoj mem, tuj kiam tiu eraro estos rekonata de sia rekta aŭ nereкта aŭtoro, klopodanta uzi ĝiajn rezultatojn en identaj cirkonstancoj de la vivo, kaj estos laŭdinde, ke la homoj rezignu ripeti la spertojn, por sia propra bono ĉe la senfina irado de la tempo.

139. – *Se ĉie, en la lukto de la surtera vivo, ekzistas cirkonstancoj, el ĉiuj, kiu estas ja la plej bona kaj sekvinda?*

– En ĉiuj situacioj de la ekzistado la homa intelekto alfrontas cirkonstancojn de la dia kaj de la homa determinismo. Sed la cirkonstanco akceptota ĉiam devas esti tiu de la unua determinismo, por ke la dua estos prilumita. Tiu sama cirkonstanco elstariĝas pro sia karaktero de ĝenerala bonfaro, plurfoje kun ofero de la egoisma kontentiĝo de la persono. Pro tiu karaktero, en sia interno la homo ĉiam estas kapabla elekti la definitivan bonon de ĉiuj kaj la pasema kontentigo de sia memo, plifortigante la fratecon kaj la lumon, aŭ pliigante sian propran egoismon.

140. – *Ĉu ankaŭ la astroj influas la homan vivon?*

– La antikvaj astrologiaj asertoj havas sian pravon de ekzisto. La magnetika kampo kaj la konjunkcioj de la planedoj influas ja la ĉelan kompleksan de la fizika homo, lian organan formiĝon kaj lian naskiĝon sur la Tero. Sed la surplaneda ekzistado estas sinonimo de lukto. Se la astraj influoj ne estas favoraj al iuj homoj, urĝas al ili lukti kontraŭ la malhelpantaj elementoj, ĉar, super ĉiaj astrologiaj veraĵoj, ni havas la Evangelion, kaj la Evangelio instruas al ni, ke ĉiu ricevos proporcie

al siaj verkoj, kaj ke ĉiu homo troviĝas sub la influoj, kiujn li meritas.

141. – *Ĉu estas spiritaj influoj inter la homo kaj ties nomo, tiel sur la Tero, kiel en la Spaco?*

– Sur la Tero aŭ en la nevidebla sfero ni havas la sanktan simbolon de la vortoj. Sed la studo de tiuj influoj postulas grandan nombron da specialaj konsideroj, kaj, tial, ke nia modesta verko estas ia apologio de la klopodo de ĉiu homo, ni ankoraŭ devas rekoni ĉi tie, ke ĉiu ricevas la influojn, kiujn li rajtas. Koncernas ĉiun koron renovigi siajn proprajn valorojn en la irado al realigoj pli kaj pli altaj, ĉar la determinismo de Dio estas ja tiu de la bono, kaj ĉiuj, kiuj sin dediĉas efektive al la bono, triumfos super ĉiuj mondaj malhelpaĵoj.

142. – *Ĉu ni povus ricevi ian instruon pri la numero sep, tiel ofte utiligita en la instruado de la sanktaj tradicioj de la Kristanismo?*

– Izola opinio kondukos nin al multaj analizoj sur la kampoj de la tiel nomata numerologio, deturnante nin de la celo de niaj spiritaj pripensoj.

Same kiel la vibroj, tiel ankaŭ la numeroj havas sian naturan mistikon, sed, pro niaj bezonoj de eduko, ni devas konsenti, ke ĉiuj numeroj, same kiel ĉiuj vibroj, estos por ni sanktaj, kiam ni estos sanktigintaj nian koron por Dio. Pri tio estas ja juste, ke ni rememoru la malnovan atentigon de la Kristo pri la sabato, ke la numeroj estas faritaj por la homoj, kaj ne la homoj por la numeroj.

143. – *Ĉu oni devas kredi en la okulta influo de certaj objektoj, kiel juveloj, ktp, kiuj ŝajnas akompanataj de ia malfeliĉiga, fatala influo?*

– La objektoj, precipe tiuj de persona uzo, havas sian vivan historion kaj, iafoje, ili povas esti punkto de atento de konsternitaj spiritoj, de siaj iamaj posedantoj en la mondo. Tial ili iafoje estas kvazaŭ tuŝitaj de strangaj kaŝitaj influoj, sed nia klopodo devas esti tiu de la spirita liberiĝo, kaj estas

ja nepre necese, ke ni luktu kontraŭ la fetiĉoj, por konsideri sole nur la moralajn valorojn de la homo en ties irado al la Perfekta.

144. – *Ĉu la antaŭavertaj fenomenoj atestas la eblecon de antaŭscio, rilate al la estonteco?*

– La spiritoj de nia sfero ne povas diskonigi la estontecon, kaj ili konsideras tiun aktivecon kiel ian karakterizaĵon de la atributoj de la Superega Kreinto, kiu estas Dio.

Ni tamen konsideru, ke la homaj ekzistadoj estas submetitaj al ia plano de ĝeneralaj provoj, kie la persono devas moviĝi per sia klopodo koni la estontecon, kaj, en tiu plano la plej altaj spiritaj mentoroj povas organizi la antaŭavertajn faktojn, kiam ĉi tiuj konvenas al la elmonro, ke la homo ne konsistas nur el konglomeraĵo de kemiaj elementoj, konforme al la difino de la dissolviganta materialismo.

145. – *Kion ni diru pri kartaŭguro, rilate la Spiritismo?*

– La kartaŭguro povas enkadriĝi en la psikajn fenomenojn, sed ne en la evangelian Spiritismon, kie la kristano devas kulturi la valorojn de sia intima mondo kun viva fido kaj kun amo en la koro, penante servi la Jesuo en la sanktejo de sia animo, havante ne alian volon ol tiun, sin altigi ĝis lia amo per la laboro kaj lumino de si mem, sen iu ajn zorgo pri la nocaj okazintaĵoj, aŭ pri la venontaj faktoj, laŭ la ne ĉiam sincera sugesto de tiuj, kiuj invadas la kaŝitan mondon.

TRANSIĜO

146. – *Ĉu estas fatala la momento de la morto?*

– Eceptinte memmortigon, ĉiuj kazoj de elkarniĝo estas antaŭe ordonitaj de la spiritaj fortoj, gvidantaj la homan aktivecon sur la Tero.

Klarigante al vi tiun escepton, ni konsideru, ke, se la homo estas sklavo de la eksteraj kondiĉoj de sia vivo en la mondo, li male estas ja libera en sia intima mondo. Jen la motivo, kial, tenante en sia plano de provoj la tenton dizerti el la elaĉeta,

reboniga vivo, li prenas sur sin penigan ŝuldon, ruinigante sin mem kaj detruante siajn proprajn energiojn.

La edukado kaj la prilumado de nia intimo estas la amo al la sanktejo de Dio en nia animo. Kiu ilin efektivigas en si mem, en la profundo de la interna libereco, tiu povas ŝanĝi la determinismon de la materialaj kondiĉoj de sia ekzistado, ĝin altigante ĝis la lumo kaj la bono. Kiuj tamen ekstermas siajn proprajn energiojn, tiuj atencas kontraŭ la dia lumo, brilanta en ili mem. El tio rezultas la komplekso de iliaj doloraj ŝuldoj.

Kaj ankoraŭ ekzistas la malrapidaj, gradaj memmortigoj, kaŭzitaĵoj de la ambicio aŭ inerteco, de trouzo aŭ nesingardemo, ĉiuj tiel danĝeraj por la vivo de la animo, kiel tiuj spektaklecaj, okazantaj inter la mondoluktoj.

Jen la motivo, kial la instruantoj de la enkarniĝintoj multajn fojojn avertas pri ĉiama bezono de preĝo kaj viglo, por ke siaj amikoj ne fiasku ĉe la tentoj.

147. – *Ĉu la morto kaŭzas neatenditajn ŝanĝojn kaj certajn rapidajn aliĝojn, kiel dezirinde?*

– La morto ne havigas statojn miraklajn al nia konscienco.

Elkarniĝi estas ŝanĝi sian sferon, kvazaŭ iu translikiĝus de unu urbo al alia, tie en la mondo, kaj tiu fakto tute ne aliĝus al li la malsanojn aŭ la virtojn pro la nura modifo de la eksteraj aspektoj. Estas grave, ke ni nur rimarku la ampleksiĝon de tiuj aspektoj, komparante la surteran sferon kun tiu de la agado de la elkarniĝintoj.

Prezentu al vi homon, kiu translokiĝas de sia vilaĝo en modernan metropolon. Kiel li kondutos, se li ne estos bone preparita por la devoĵo de sia nova vivo?

La komparo estas ja modesta, sed ĝi servas por klarigi, ke la morto ne estas salto en la Naturo. La animo daŭrigos sian evoluan iradon sen iaj eksterordinaraj mirakloj.

La du mondoj, videbla kaj nevidebla, interprentras, kaj, se la homo estas nekapabla percepti la sferon de la nemateria vivo, estas pro tio, ke lia sensorio kapablas kapti nur iujn perceptojn, kaj dume al li ne estas eble trairi la mallarĝan fenestron de la kvin sentumoj.

148. – *Kion la elkarniĝinta homo esperas jam en la unuaj tempoj de sia transtomba vivo?*

– La elkarniĝinta animo nature serĉas siajn aktivecojn preferatajn en la rondo de la materia vivo, obee al la alligiteco, ĝuste tiel, kiel okazas en la socioj de via mondo.

Ĉu viaj urboj ne estas plenaj de asocioj, kluboj kaj tutaj klasoj kuniĝantaj kaj sindikatanigantaj kun difinitaj celoj, por komunaj interesoj de pluraj individuoj? Ĉu tie ne brakumas unu la alian la aĝiotistoj, la politikistoj, la komercistoj, la pastroj, ĉiu grupo, celanta defendi siajn proprajn interesojn?

La elkarniĝinta homo aflikte serĉas, en la Spaco, la grupojn pensantajn kiel li mem, por ke li povu daŭrigi la saman specon de vivo, kiun li forlasis sur la Tero. Tenante tamen pri pasiaj, malvirtaj estuloj, ilia menso retrovos materiajn obsedojn, nome tiujn de la mondo, alkoholaĵo, ktp, obsedojn fariĝantajn ilia ĉiumomenta morala turmentego, en la sferoj plej proksimaj al la Tero.

De tio la neceso, ke ni rigardu ĉiujn niajn surterajn aktivecojn, kiel taskon preparan por la spirita vivo, estante nepre necesa por nia transtomba feliĉo, ke ni tenu nian koron ĉiam puran.

149. – *Tuj post la morto, ĉu la homo liberiĝinta de la materia envolaĵo povas ĝui la kuneston de siaj amataj estuloj, kiuj antaŭiĝis al li en la transtombo?*

– Se lia surtera ekzistado estis ia apostolado de laboro kaj amo al Dio, la transiro de la tera al la spirita sfero estos ĉiam milda.

En tiaj kondiĉoj li povos tuj renkonti tiujn spiritojn, kiuj estis objekto de lia amemo sur la Tero, se ili troviĝos sur la sama nivelo de evoluo. Ia dolĉa feliĉo kaj ia eterna ĝojo ekestas en tiuj amikaj, afablaj koroj post la amaraĵoj de la disiĝo kaj longedaŭra foresto.

Sed tiuj, kiuj liberiĝas de la Tero saturitaj de obsedemo pro la pasemaj posedaĵoj de la mondo kaj tuŝitaj de la ombro de la nekompreneblaj ribeloj, tiuj ne trovos tre rapide siajn amatajn estulojn, kiuj antaŭvenis al ili en la tomo. Iliaj perceptoj limigitaj al la malluma atmosfero de iliaj pensoj kaj

iliaj negativaj valoroj malebligas al ili la dolĉajn plezurojn de la renkontiĝo.

Estas ja pro tio, ke vi plurfoje rimarkas, ke suferantaj, konsternitaj Spiritoj aspektas kvazaŭ estuloj forlasitaj kaj forgesitaj de la superega boneco, sed kiuj, efektive, estas forlasitaj de si mem, pro sia persistemo en la malbono, en la krima intenco kaj en la malobeo al la sanktaj planoj de Dio.

150. – *Ĉu estas eble, ke post la morto la spiritistoj suferos konsternitecon?*

– La morto ne kaŭzas konsternitecon al la rekta konscienco nek al la koro, ŝatanta la veron kaj la amon de tiuj, kiuj vivis sur la Tero nur por kulturi la praktikadon de la bono en ĝiaj diversaj formoj kaj laŭ la plej diversaj kredoj.

La kristana spiritisto ne rigardu sian titolon de lernanto de Jesuo kiel nuran etiketon, konsiderante la evangelian admonon: “Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata” ⁽¹⁾, preparante sin per la scioj kaj la bonfaroj, ĉe la mondaj spertoj, por sia estonta vivo, kiam la nokto de la tombo malfermos antaŭ liaj spiritaj okuloj la vidon je vero, en la irado al la senmorta vivo.

151. – *Ĉu la elkarniĝinta Spirito eble suferas el la brulado de la kadavraj elementoj?*

– Ĉe kremaciado necese estas kompati la kadavrojn, prokrastante je pliaj horoj la detruadon de la materiaj visceroj, ĉar, ĉe la unuaj horoj post la forpaso, pro la organikaj fluidaĵoj ankoraŭ altirantaj la animon al la sensacoj de la materia ekzistado, ĉiam ekzistas, iamaniere, multaj interŝanĝoj de sento inter la elkarniĝinta Spirito kaj la korpo en kiu estingiĝis la “viva tonuso”.

152. – *Ĉu la nenatura morto kaŭzas al la elkarniĝintoj sensacojn malsamajn ol tiujn de la tiel nomata “natura morto”?*

⁽¹⁾ Luko, 12:48. – **La Trad.**

– Kaŭze de la situacio de surprizo antaŭ la gravegaj, neeviteblaj okazintaĵoj, la elkarniĝo pro akcidentoj, la subitaj disiĝoj estigas ja tre dolorajn sensacojn al la elkarniĝinta animo. En tiaj cirkonstancoj, la estulo preskaŭ ĉiam ne troviĝas sufiĉe preparita, kaj la subiteco de la situacio alportas al li amarajn, terurajn emociojn.

Tiuj malĝojaj surprizoj tamen ne okazas al la animoj en okazo de doloraj kaj longedaŭraj malsanoj, ĉe kiuj la koro kaj la intelekto estas atingataj de la lumo de edifaj meditoj, kaj rimarkas la trompojn kaj malprofitojn de la troa alkroĉiĝo al la Tero, kaj estas juste, ke ni konsideru la utilecon kaj bezonon de la fizikaj doloroj en tiu aparta situacio, ĉar nur per ĝia valora helpo la homo povas liberiĝi de la ŝarĝo de siaj nocaj impresoj el la mondo, por trankvile pasi tra la sojlo de la vivo en la Senfino.

153. – *Se ne estos alveninta la horo de la morto, ĉu la homo povos pereji sub la danĝeroj lin minacantaj?*

– Ĉe la eksteraj aspektoj de la vivo, se nur la enkarna Spirito kondukas laŭ la reguloj de pura konscienco kaj bonintenca koro, sen la malprudento de la rapidemaj kaj la egoismo de la ambiciaj, ĉia defendo de la homo kuŝas en Dio.

154. – *Kiaj estas la unuaj impresoj de tiuj, kiuj elkarniĝis per memmortigo?*

– La unua elreviĝo lin atendanta estas la realeco de la vivo, kiu ne estingiĝas per la morto de la fizika korpo, vivo gravigita de la timigeĝaj turmentoj, pro lia decido plena de ekstrema ribelemo.

Ekzistas memmortigintoj, kiuj spertas plu la senfinajn fizikajn suferojn de sia lasta surtera horo. Dum tutaj jaroj ili sentas la terurajn impresojn de la tokso, neniiginta al ili la energiojn, la traboradon de la cerbo pro fremda korpo elpafita el la armilo uzita ĉe lia lasta ago, la pezon de la pezaj radoj, sub kiujn ili sin ĵetis ĉe la dezirego foriri el la vivo, la pasadon de la silentaj, malgajaj akvoj sur sia kadavro, kie ili serĉis la kriman forgeson de siaj taskoj en la mondo, kaj, ordinare, la plej malagrabra sensaco de la memmortiginto estas akompani

minuton post minuto la malkomponiĝadon de la korpo forlasita en la sino de la tero, plena de vermoj kaj putrinta.

El ĉiuj devojiĝoj de la homa vivo, memmortigo estas eble la plej grava pro sia karaktero de falsa heroco, de absoluta neado de la amoleĝo kaj de ekstrema ribelo kontraŭ la volo de Dio, kies justeco neniam sentiĝis, ĉe la homoj, sen la lumo de la favorkoreco.

155. – *Ĉu la timo al la morto montras mankon de spirita evoluo?*

– En tiu senco, ni ne povas ĝeneraligi tian difinon.

Rilate al tiuj timoj, ni plurfoje estas devigitaj akcepti la pravigojn prezentitajn de la amo, pravigojn ĉiam sublimajn en sia spirita manifestiĝo. Sed ne estas juste, ke la sincera kredanto pleniĝu de timegoj antaŭ la ideo de sia transiro al la sfero nevidebla por la homaj okuloj, kaj estas ja oportuna la konsilo pri ĉiama preparado de la homo por la nova vivo, kiun la morto prezentos al li.

156. – *Tuj post sia elkarniĝo, ĉu la Spiritoj ĝojas pro la ebleco komunikiĝi kun ni?*

– Ĝenerale, estas tre malgranda la nombro da homoj, kiuj, dum siaj ordinaraj laboroj sur la Tero, sin preparas por la mortoemocioj, kaj ofte la meditoj dum la malsanoj ne sufiĉas por starigi situacion de perfekta trankvileco en la unuaj tempoj de la transtombo. Jen la motivo, kial fariĝas tiel edifaj viaj kunsidoj por studoj kaj predikado de la Evangelio, en kiuj partoprenas granda nombro de niaj fratoj, avidaj je parolo el la Tero, ĉar la impresoj, kiujn ili portas el la mondo, ne ebligas al ili percepti la altrangajn mentorajn el la plej altaj spiritaj sferoj.

157. – *Ĉu la elkarniĝintaj Spiritoj povas aŭdi kaj vidi nin ĉiam, kiam ili volas? Kiel ili plenumas tiun deziron?*

– Tio estas ebla ne tiam, kiam ili volas, sed kiam ili tion meritas, des pli ĉar ekzistas kulpaj Spiritoj, kiuj nur multajn jarojn post sia disiĝo je la mondo sukcesas permeson

por aŭdi la amikan, konsolan parolon de siaj fratoj aŭ amataj estuloj sur la Tero, por sin gvidi en la labirinto de la elaĉetaj suferoj. La ĉeesto de ĵuselkarniĝinta estulo ĉe evangelia kunsido jam signifas benon de Dio por lia seniluziiginta koro, ĉar tiu cirkonstanco estas sekvata de la plej altaj helpoj al lia interna vivo.

Koncerne la proceson de ilia kontakto kun ni, ni konsideru, ke, por komunikiĝi en la monda sfero, la transtombaj estuloj devas, en sia ĝeneraleco, adaptiĝi al via naturo, kaj ili akordigas siajn kapablojn kun via fluida situacio sur la Tero. Jen la motivo, kial en tiuj momentoj, en komuna formo, ili posedas vian sensorian kapablon kaj limigas siajn vibrojn, tiel ke ili ree adaptiĝas al la surtera medio.

158. – *Se iu elkarniĝas postlasante malamikojn sur la Tero, ĉu estas eble, ke li daŭrigu plu sian persekuton kontraŭ sia kontraŭulo, en la situacio de nevidebleco?*

– Sur la kampo de la surteraj interrilatoj, tio estas ebla kaj preskaŭ ĝenerala, ĉar se la amo estas ligilo kuniganta la animojn en la ĝojoj de la libereco, la malamo estas la kateneno de la erarintoj, ilin reciproke katenanta en la karcero de la malfeliĉo.

Se iu foriris kun malamo, kaj se en la mondo lia kontraŭulo obstinas en la kulturado de la ĝermoj de antipatio kaj kruelaj rememoroj, estas ja pli ol nature, ke en la nevidebla sfero persistu la elementoj de la senkompataj malamikeco kaj venĝo, konforme al la leĝo de reciprokeco. El tio ni konkludu, ke pardono kun plena forgeso pro la malbono estas bezono, ke la pura frateco manifestiĝu per la preĝo kaj vigeleco, transformante malamon en amon kaj kompaton, surbaze de la plej sanktaj ekzemploj prenitaĵ el la Evangelio de Jesuo.

159. – *Rilate al la persekutoj fare de la spiritaj malamikoj, ĉu ties agado efektiviĝas sen la kono de niaj amemaj, klarmensaj gvidantoj?*

– La tiel nomataj persekutoj de la nevidebla sfero, je ĉiu ajn speco, ne okazas sen la konscio de Jesuo kaj liaj

senditoj, mentoroj de la homo en ties irado en la direkto al la scio kaj al la lumo.

La persekutoj de nevidebla malamiko havas limon kaj atingas sian objekton, nur en okazo de propra bezono, ĉar, en la amemaj okuloj de viaj gvidantoj el la supera sfero, ĉiuj tiuj movadoj havas la sanktan celon instrui al vi la moralan forton, la toleremon, la paciencon, la rezignacion, laŭ la plej sanktaj devoj de frateco kaj bono.

160. – *En la sferoj plej proksimaj al la Tero, ĉu la elkarniĝintaj Spiritoj ankaŭ dividiĝas en inajn kaj virajn estulojn?*

– En la sferoj plej proksimaj al la Tero, la elkarniĝintaj animoj konservas la karakterojn, kiuj al ili estis pli agrablaj en la aktivecoj de la materia ekzistado. Konsideru, ke iuj el tiuj animoj, vagantaj en la mondo, en organa vesto, al ili trudita de la cirkonstancoj de la tasko plenumota apud surteraj estuloj, reprenas, nun pli spertaj, siajn kondiĉojn antaŭajn al ilia reenkarnejo, se ili sciis plenumi siajn devojn sur la kampo de la doloroj kaj materiaj malfacilaĵoj.

Pilongigante tamen la demandon, ni konsideru, ke la Spiritoj, kun ĉi tiuj aŭ tiuj karakteroj, marŝas en la direkto al Dio, purigante ĉiujn sentojn kaj plibeligante siajn kapablojn, por respuguli la dian lumon. Tiam ili sin transformas, en tiuj aŭ ĉi tiuj kondiĉoj, en perfektajn plenumantojn de la projekto de la Eternulo.

II

SENTO

ARTO

161. – *Kio estas la arto?*

– La arto pura estas la plej alta spirita kontemplado de la kreitoj. Ĝi signifas la plej profundan eksterigon de la idealo, la dian manifestiĝon de tiu “pli transa”, kiu respugulas la esperojn de la animo.

La vera artistoj estas ĉiam la “mediumoj” de la eternaj belaĵoj, kaj en ĉiuj tempoj lia laboro estis vibrigi la plej delikatajn kordojn de la homa sento, ĝin altigante de la Tero ĝis la Senfino, kaj malfermante sur ĉiuj vojoj la deziregojn de la koroj al Dio, dum ties superegaj manifestiĝoj de belo, saĝo, paco kaj amo.

162. – *Ĉu ĉiu artisto povas esti ankaŭ misiisto de Dio?*

– Ankaŭ la artistoj, same kiel la tiel nomataj saĝuloj el la mondo, povas esti venkitaj de la surtera konvencio, kiam en iliaj koroj ne trembrulas la flamo de la diaj idealoj. Sed plej ofte ili fariĝas grandaj misiistoj de la ideoj, sub la egido de la Sinjoro, en ĉiuj fakoj de sia propra aktiveco, kiel de literaturo, muziko, pentrarto, plastiko.

Ĉiufoje kiam ilia arto liberiĝas de la nedaŭraj, pereemaj mondaj interesoj, por konsideri sole nur la spirita lumon, venantan de la koro akordanta kun la cerbo, en la realigoj de la vivo, tiam la artistoj estas ja unu el la plej sindonaj misiistoj de Dio, ĉar li scios penetri en la korojn ĉe la paco de la meditado kaj silento, atingante la plej altan sencon de la evoluo de si mem kaj de siaj homfratoj.

163. – *Ĉu iu povas fariĝi artisto sole nur per la faka edukado en ununura ekzistado?*

– La teknika, individua perfektigo de ia artisto, same kiel liaj plej notindaj karakterizaĵoj, ne estas la rezulto de la aktivecoj de ununura vivo, sed de centjaraj spertoj sur la Tero kaj en la spirita sfero, ĉar la genio, en ĉiu aĝo, en la plej diversaj artaj manifestiĝoj, estas ja la profunda sintezo de pluraj vivoj, en kiuj la persistemo kaj klopodo kuniĝis por la plej brilaj kaj spontaneaj floradoj.

164. – *Kiel ni komprenu la genion?*

– La genio estas la resumo de la plej longa penado tra multoblaj ekzistadoj je abnegacio kaj laboro por la konkero de la spiritaĵoj.

Komprenante la vivon tra ĝia reala aspekto, li plurfoje malatentas la malvastan rondon de la surtera vivo, koncerne ĝiajn konvenciajn formulojn kaj antaŭjuĝojn, fariĝante ia fremdulo en sia propra medio, pro siaj superaj, nekofuzebaj ecoj.

Jen la motivo, kial la surtera scienco, katenita al la konvenciaj reguloj, pretendas vidi en la genio ian damnindan psikozon, kaj preskaŭ ĉiam lin traktas kvazaŭ malsanan ĉelon de la socia organismo, por plurfoje lin glori, post lia morto, tuj post kiam ĝi povas kapti la grandecon de lia spirita vido en la pejzaĝo de la estonteco.

165. – *Kiel ni konprenu la psikismon de la artistoj, psikismon tiel diferenca de tiu, karakterizanta la ordinaran homon?*

– Ĝenerale, la artisto preskaŭ ĉiam vivas prefere en la spirita sfero ol ĝustedire en la tera mondo.

Lia psikismo ĉiam estas la sekvo de lia interna mondo, plena de sennombraj rememoroj pri la pasintaj ekzistadoj, aŭ de la sublimaj vizioj, kiujn li sukcesis kapti en la spiritaj rondoj, antaŭ sia reenkarigiĝo sur la Tero.

Pro la multnombraj spertoj en la pasinteco, liaj sentoj kaj perceptoj transcendas tiujn de la ordinara homo, situacio iafoje kaŭzanta la falsan taksadon de la homa scienco, kiu erare interpretas liajn ekzistojn kiel neŭrozon aŭ nenormalaĵojn.

Vere, pro sia speciala psika pozicio, la artisto neniam cedas al la konvenciaj postuloj de la Tero, sin tenante super la nuntempaj antaŭjuĝoj. Ni reliefigu, ke plurfoje, pro troa indiferento al la disciplino, malgraŭ siaj superaj kvalitoj, li ne povas doni sin al la ekscesoj nocaj al la libereco, kiam ĝi estas malbone direktita aŭ false utiligita.

Jen kial, en ĉiuj situacioj, la dia idealo de la fido ĉiam estos la antidoto kontraŭ la moralaj venenoj, malobstrukcanta la vojon de la animo al la altaj konkeroj de la perfekteco.

166. – *Rilate al la artistoj, kiuj triumfis sen iu ajn helpo de la mondo, kaj kiuj fariĝis notindaj nur pro la klopodoj de sia inklino, ĉu iliaj verkoj estas iaj rememoroj el la vivo en la Senfino?*

– Plej ofte, la grandaj artaj ĉefverkoj signifas ja la konkretigon de tiuj profundaj rememoroj. Sed ne ĉiam ili estas eĉ simpla skizo de la belaĵoj duonviditaj, en la Transmondo, de la menso, kiu ilin konceptis, sed rememoroj el antaŭaj ekzistadoj, inter la luktoj kaj larmoj sur la Tero.

Iuj eminentaj pentristoj, mirindaj pro verkoj faritaj sen la homaj modeloj, kreis nenion alian ol siajn proprajn rememorojn perditajn en la tempo, en la duonombro de la pejzaĝo de forpasintaj vivoj. Rilate la verkistojn, la amikojn de la literatura fikcio, ne ĉiam iliaj konceptaĵoj obeas al la fantazio, ĉar tiuj ĉi estas fruktoj de denaskaj rememoroj, per kiuj ili restarigas la dramon travivitan de sia propra individueco, en la mortintaj jarcentoj.

La impresema mondo de la artistoj havas konstantajn rilatojn kun la spirita pasinteco, el kie ili tiras la materialon necesan por la spirita konstruado de siaj verkoj.

167. – *Kiam ili komponas senmortajn verkojn, ĉu ankaŭ la grandaj mizikistoj povas ricevi influon de rememoroj el iu antaŭa ekzistado?*

– Tiu influo povas okazi koncerne iliajn eblecojn kaj tendencojn, sed, sur la kampo de la komponado, la grandaj surteraj muzikistoj universale rekonataj, ne obeas al rememoroj el la pasinteco, kaj jes al la gloraj impulsoj de la fortoj de la Senlimo, ĉar la muziko sur la Tero estas la plej altgrade dia arto.

La senmortaj operoj ne naskiĝis ja el la surtera ŝlimo, sed el la profunda harmonio de la Universo, kies sublimaj kantikoj estis parte kaptitaj de la mondaj komponistoj, en la momentoj de sankta inspiro.

Nur tiamaniere vi povos kompreni la sanktan influon de la nobla muziko sur la animojn, ilin forportante, en iuj ajn okazoj, el la dubaj ideoj de la Tero al la vibroj de ilia interno akorde kun la Senlimo.

168. – *En la sferoj nevideblaj por la homoj, ĉu la elkarniĝintaj Spiritoj ankaŭ zorgas pri la artismaj valoroj?*

– Ni konsentu, ke ĉiuj artesprimoj sur la Tero estas signoj de spiriteco plurfoje fremda al la surtera vivo.

Laŭ tiu realeco, vi povos rekoni, ke la arto, en kiu ajn el siaj puraj formoj, estas objekto de zorga atento de la Spiritoj, havantaj aliajn eblecojn, kiujn la surtera artisto apenaŭ povas prezenti al si.

En la Transtombo, per ĝia helpo transformiĝas la plej kruelaj sentoj, inklinigante la malfeliĉajn Spiritojn al la elaĉetaj, purigaj provoj. Altiĝante al ĝiaj regionoj de perfekteco kaj beleco, la animo elvolviĝas al Dio kaj riĉiĝas per liaj sublimaj mirindaĵoj.

169. – *Ĉu la emocio devas esti disciplinata?*

– Ĉia emocia esprimo devas esti disciplinata de la fido, ĉar ĝia libera elverŝiĝo, pro la monda nekomprenemo, povas havi gravajn sekvojn.

170. – *Kun tiom da superaj kvalitoj por la bono, ĉu la genia artisto povas transformiĝi en instrumento de malico?*

– La genia homo similas al la intelekto, atinginta la plej perfektajn kondiĉojn de realiganta tekniko, pro tio, ke li sukcesis havigi al si la elementojn de la spontaneeco. Tiu havigo tamen ne liberigas lin de la neceso morale progresi, prilumante lian koron.

Ĉar sennombraj geniuloj ne atingis la kulminon de la sento, ni ofte vidis en la mondo la plej noblajn talentulojn enkarcerigitaj en teruraj obsedoj aŭ degenerintaj en dolorajn devojiĝojn, ĉar la homo devas meti la fidon super ĉiaj ĝustedire materiaj konkeroj, kiel eternan dian idealon.

171. – *Ĝenerale, ĉu ĉiuj homoj devos serĉi la artajn valorojn por sia personeco?*

– Jes; tra siaj pluraj vivoj, la homa animo penas havigi al si tiujn posedaĵojn, ĉar estas juste, ke la surteraj estuloj povu kunporti el sia lernejo de provoj kaj pliperfektigo, kiu estas la Tero, ĉiujn spertojn kaj valorojn troveblajn en la luktoj de la materia sfero.

172. – *Ĉu ekzistas, efektive, unu arto antikva kaj alia moderna?*

– La arto elvolviĝas kun la homoj, kaj, estante la spirita kontemplado de ĉiuj, kiuj eksterigas ĝin, ĝi ĉiam estos la manifestiĝo de la eterna beleco, kondiĉita al la tempo kaj medio de ĝiaj disvastigantoj.

La arto do ĉiam estos unu sola en sia riĉeco de celoj, en sia senlima spiriteco.

Ni tamen konsideru, ke, se hodiaŭ ekzistas granda nombro da telementoj kun troa priokupiĝo pri originaleco, senbridigante la plej strangajn esprimojn de primitivismo, tiuj estas la senripozaj flatantoj de la monda gloro, kiuj, pli malproksimaj de la aŭtentika arto, sukcesas fari nenion alian ol respeguli la konfuzon de la pasintaj tempoj, apogante la nedaŭran regadon de la frivoleco kaj forto. Tiuj tamen forpasos, kiel forpasos ja ĉiaj necertaj situacioj de kataklismo, kvazaŭ burdoj de la sankta abelujo de la dia beleco, kiuj, anstataŭ spiritigi la naturon, penas malnobligi ĝin per siaj strangaj, nocaj konceptoj.

ALLIGITECO

173. – *Kiel ni rigardu la simpatian kaj la antipatian?*

– Simpatio aŭ antipatio havas profundajn radikojn en la spirito, ĉe la subtilega kombino de fluidaĵoj propraj al ĉiu, kaj, ĝenerale, preskaŭ ĉiam ili atestas ian renovigon de sensacoj spertitaj de la homo, ekde la delikta pasinteco, en identaj situacioj.

Sed ni konsideru, ke ĉia antipatio, eĉ la ŝajne plej justa, devas morti por doni lokon al la simpatio, kiu edifas la koron por la konstrua, aŭtentika laboro de frateco.

174. – *Ĉu ni povas ricevi ian difinon de la amikeco?*

– Ĉe la skalo de la homaj sentoj, la sincera amikeco estas ja la oazo de ripozo por la vojiranto de la vivo, en lia irado al perfekteco.

Sur la surteraj vojoj, la lojala amikeco estas la plej bela speco de fratamo, sanktiganta la korimpulsojn ĉe la plej doloraj kaj maltrankviligaj luktoj de la ekzistado.

Kiu scias esti vera amiko, tiu ĉiam estas la sendito de feliĉo kaj paco, aliĝante al la vicoj de la disĉiploj de Jesuo, per la natura prilumiĝo de sia spirito, kiu, konkerante la plej grandajn simpatiojn de la enkarniĝintoj kaj bonkoraj estuloj el la Nevideblo, povos disradii ĉie siajn vibrojn de purigaj sentoj.

Havi amikecon estas same kiel havi koron, kiu amas kaj klarigas, kiu komprenas kaj pardonas, en la plej amaraj horoj de la vivo.

Jesuo estas la Dia Amiko de la Homaro.

Ni sciu kompreni lian subliman sindonemon, kaj ni transformos nian aman medion en oceanon da eternaj paco kaj konsolo.

175. – *Ĉu la familia institucio estas organizita en la spirita sfero, antaŭ ol ĝi reuniĝos sur la Tero?*

– La familia grupo havas sian sanktan originon en la spirita sfero. Per ĝiaj ligiloj, kuniĝas ĉiuj, kiuj en la Transmondo prenis sur sin la kompromison konstrui sur la Tero realan, definitivan fratecon.

Super tiu dia institucio superstaras la amoĉeneroj forĝitaj per la spertoj en aliaj tempoj. Sed tien alfluas ankaŭ la malamoj kaj la persekutoj el la malluma pasinteco, por ke ili disfandiĝu en fratecan solidarecon, celante la estontecon.

Per la malfacilaĵoj komune provitaj, per la doloroj kaj spertoj ricevitaj sur la sama vojo de elaĉeta evoluo, oni forgesas la amaraĵojn de la fora pasinteco, transformante ĉiujn malsuperajn sentojn en rebonigitajn, sanktigajn esprimojn.

Purigante la alligitecojn, super la sangaj ligiloj la sankta familisistemo eterniĝas en la Senlimo per la nepereemaj ligiloj de la Spirito.

176. – *Ĉu en la nevidebla sfero la spiritaĵoj grupiĝas laŭ falangoj kaj pligrandiĝas aŭ plimalgrandiĝas, kiel okazas sur la Tero?*

– Ankaŭ en la Transtombo la familioj grupiĝas laŭ falingoj, daŭrigante tie la instruadon kaj elaĉeton de kelkaj membroj de la grupoj, elementoj pli ribelemaj kaj neprogresemaj, kiuj estas pelataj de siaj afinaj kunuloj al la edifaj laboroj por konkeri amon kaj saĝon.

Laŭmezure kiel ili ekkomprenas la Ĉiopovan, ĉiuj tiuj grupoj nature plivastiĝas, ĝis ili atingos la luman sferon de la dia unuiĝo per la eternaj, netransdoneblaj akiraĵoj en la Senlimo.

177. – *Ĉu ankaŭ la spiritalaj familioj havas estron?*

– Ĉiuj spiritalaj kolektivoj grupiĝas laŭ siaj familiaj karakteroj per la sanktaj animaj alligitecoj, kaj ĉiu posedas sian grandan mentoron en la plej altaj sferoj, el kie venas la eternaj substancoj de amo kaj saĝo.

178. – *Ĉu ni povus ricevi ian klarigon pri la leĝo de la alligiteco inter la elkarniĝintaj Spiritoj?*

– Sur la Tero la homoj multfoje malkaŝas siajn afinecojn ĉe la materialaj interesoj, kiuj povas maski la veran moralan pozicion de personeco. Sed en la mondo de la superaj Spiritoj la aŭtentikaj alligitecoj elmontriĝas sen iu ajn artifiko, per la plej puraj sentoj.

179. – *Sur la kampo de la surteraj korinklinoj, ĉu geedziĝi aŭ ne geedziĝi dependas aŭ ne de la homa volo?*

– La geedziĝo sur la Tero ĉiam estas rezulto de certaj decidoj faritaj jam en la vivo en la Senfino, antaŭ la reenkarneco de la Spiritoj, ĉu sub gvidado de la pli altaj mentoroj, kiam la estulo ne havas la necesan edukitecon por uzi siajn proprajn kapablojn, ĉu pro kompromisoj libere prenitaj de la animoj antaŭ siaj novaj spertoj en la mondo. Tial la homaj geedziĝoj estas antaŭviditaj por la ekzistado de la individuoj, en la malluma kadro de la elaĉetaj provoj, aŭ en la amaso da valoroj de la regeneraj, sanktigaj misioj.

180. – *Ĉe la evoluprocesoj de la surtera vivo, en la horoj de ĉagreno kaj ĝojo, ĉu indifereco ĉe la manifestiĝoj de ama*

sentemo estas ja pravigebla sinteno kiel rimedo de spirita vikleco?

– La indiferento rigardata kiel neŝanĝemo de la sentoj estas ĉiam danĝera por la animovivo; sed ĉe la eksterigo de emocio ekzistas sintenoj, kiuj estas pravigitaj pro la nobleco de sia eduka karaktero.

181. – *Kiel oni komprenu la senton de kolero sur la vojoj de la homa vivo?*

– La kolero ne solvas la evoluajn problemojn kaj ĝi signifas nenion alian ol rememoraĵoj el la unuaj tempoj de la homa vivo en ĝiaj plej krudaj manifestiĝoj.

La serena energio ĉiam edifas, en la formado de la purigaj sentoj; sed la impulsigema kolero, ĉe siaj atrabilaj movoj, estas kvazaŭa venenita vino, el kies ebriigo la animo ĉiam vekigaas kun la koro plena de amareco.

182. – *Ĉu la konscienciproĉo estas puno?*

– La konscienciproĉo estas forto preparanta la penton, same kiel tiu ĉi estas la energio antaŭiĝanta al la reboniga klopodo. Estante spirita bato ĉe siaj profundaj karakterizaĵoj, la konscienciproĉo estas la interspaco al la lumo, per kiu la homo ricevas la nerektan kunlaboron de siaj amikoj el la Nevideblo, ke li riparu siajn devojiĝojn kaj renovigu siajn moralajn valorojn dum sia irado al Dio.

183. – *Kiel oni komprenu la ĵaluzon en la spirita sfero?*

– La ĵaluzo, konsiderata en siaj manifestoj de skandalo kaj perforto, estas ja signo de morala malprogreso aŭ de halto de egoismo, dolora situacio, kiun la homo superos nur per multe da klopodoj, ĉe preĝo kaj vikleco, ke li riĉigu sian internon per la lumo de la universala amo, komencante per kompato al ĉiuj, kiuj suferas kaj eraras, ankaŭ konservante sinceran deziron kunlabori en la plialtigo de ĉiu estulo.

Nur la kompreno de la vivo, metanta nin en la situacion de tiu, kiu eraris aŭ kiu suferas, por ke ni lumigu nian rezonadon por serena analizado de la okazintaĵoj, nur tiu kompreno povos neniigi la ĵaluzon en la koro, tiel ke fermiĝu al la danĝero la pordo, tra kiu ĉiu animo povas sin ĵeti al teruraj tentoĵoj, kun grandaj sekvoj en la estontaj tagoj.

184. – *Kiel ni efektivigu nian memedukadon klarigitan per la evangelia lumo, rilate al la problemoj de la seksaj altiroj, kies egoismaj tendencoj multfoje kondukas nin al kontraŭfrataj kondutoj?*

– Ni ne forgesu, ke la seksamo devas esti komprenata kiel la vivimpulso, kondukanta la homon al la grandaj realigoj de la dia amo, en la progreso de sia spiritigo, ĉe sindonemo kaj ofero.

Ĉiun fojon, kiam vi spertos kontraŭfratajn impulsojn en via rondo, tio signifas, ke en via psika organizaĵo superregas nocaj rememoroj, inklinantaj al halto ĉe la evolua irado.

Tiam urĝiĝas ja la penado por memedukado, ĉar ĉiu homo bezonas solvi la problemon de siaj propraj valoroj.

Vi devas rimarki, ke Dio ne ekstermas la homajn pasiojn, sed ilin evoluigas, ilin transformante, per la doloro, en sanktajn posedaĵojn de la animo. Koncernas ĉiujn homojn bridi la koron, gvidi la impulsojn, direkti la tendencojn, ĉe la subluma evoluado de siaj sentoj.

Ekzamenante plu la grandan nombron da devioj de la seksamo, kreitan de la homoj por ilia destino, ni estas devigitaj konsideri, ke, se multaj prenas sur sin penigajn ŝuldojn, inter la ekscesoj de riĉaĵo, intelekto kaj povo, aliaj tion faras per la sekso, trouzante unu el la plej sanktaj punktoj de sia vivo.

Tial ni plurfoje vidas sennombrajn animojn lernantaj, inter la seksaj angoroj de la mondo, la rezignon kaj oferon, serĉe de akiroj de dia amo.

El tio oni konkludas, ke, anstataŭ la seksa edukado per la kontentigo de la instinkto, estas nepre necese, ke la homoj eduku sian animon por la sankta kompreno de la sekso.

DEVO

185. – *Kiuj estas la karakteroj de bona ago?*

– La bona ago estas ĉiam tiu, celanta la bonon de aliulo kaj de ĉiuj, kiuj en la vivo ĉirkaŭas lian klopodon.

En tiu problemo, la kriterio pri la ĝenerala bono devas esti la esenco de ĉia konduto. La plej bona ago iafaĵe povas suferi la malkomprenon de aliulo, en la momento, kiam ĝi estas praktikata, sed ĝi estos ĉiam triumfanta pro la bono farita al la individuo aŭ al la kolektivo.

186. – *Ĉu kristana spiritisto povas pensi pri hazardo?*

– La hazardo mem ne povas esti pripensata de la sincera disĉiplo de la evangelia veraĵo.

Sur la kampo de laboro kaj sufero, la klarmensa homo sentas la bezonon de la propra elaĉeto, konsiderante la deliktan pasintecon. Koncerne la nuntempajn devoĵiĝojn kaj erarojn, pli bone ol neniu alia, lia konscienco devas scii pri la nejustaĵo farita kontraŭ la amoleĝo starigita de Dio, koncerne lin atendi, sen ia ajn penso pri hazardo, la estontajn dolorajn elaĉetojn kaj regenerojn.

187. – *Kia mensa konduto plej multe helpos nian spiritan sukceson ĉe la surteraj laboroj?*

– Tiu konduto devas esti tiu, kiu al vi estas instruata de la dia leĝo, dum via nuna enkarniĝo, tio estas, la leĝo de la forgeso pri ĉia malbono, por ke vi memoru nur la bonon kaj la sanktan okazon de laboro kaj edifo ĉe la eterna posedaĵo de la tempo.

Forgesi la malbonon estas neniigi ĝin, kaj pardoni tiun, kiu ĝin praktikis, estas instrui amon, konkerante sincerajn, karajn amikojn.

El tio venas la neceso de la pardono en la mondo, por ke la brulego de la malbono povu esti estingita, kaj la aŭtentika paco revenu en la korojn.

188. – *Kiel konduki la geedzojn por bone plenumi siajn devojn?*

– Sur la Tero, tre ofte la geedziĝo estas provo malfacila sed elaceta.

Klopodante por bone plenumi siajn diajn taskojn, la geedzoj devas kiel eble plej multe observi reciprokajn atenton, respekton kaj kareson, kaj koncentri sin en sia hejmo, ĉiufoje kiam iu danĝero minacos al ili la hejman feliĉon, ĉar en la preĝo kaj spirita vigleco ili ĉiam trovos la plej bonajn defendojn.

En la hejmo, plurfoje kiam unu el la geedzoj deflankiĝas, la tasko estas de penigaj luktoj kaj larmoj. Ĉe la ofero tamen ĉiu animo sin sanktigas kaj iluminas, fariĝante modelo en la sankta institucio de la familio.

Por atingi la hejmajn paciencon kaj heroecon, estas ja necesa la plej profunda fido al Dio, kaj preni kiel Dian spegulon la ekzempladon de Jesuo en ties apostolado de abnegacio kaj doloro sur la Tero.

189. – *Kion faru la surtera patrino por evangelie plenumi siajn devojn kaj konduki siajn infanojn al la bono kaj vero?*

– En la hejma medio la patrino devas esti la dia eksponento de ĉia spirita komprenemo kaj de ĉiaj oferoj por la familia paco.

En tia sfero de laboro, ĉe la plej sankta tasko de persona abnegacio, la kristana virino ekverŝas la veran lumon sur la vojon de siaj infanoj, tra la vivo.

La patrino konsistas nur el la ĉiama disdonado de la amo de Dio, la Patro de Senlima Boneco, kiu metis en la koron de la patrinoj la sanktan vivesencon. En la surteraj laboroj ekzistas tiuj, kiuj lasas sin treni de la egoismo kaj individueco; estas necese tamen vekigi ĝustatempe, tiamaniere ke ne difektiĝu la fonto de amemo.

Antaŭ ĉio, la surtera patrino komprenu, ke ĉiaj infanoj estas unue infanoj de Dio.

Ekde la infanaĝo, ŝi devas prepari ilin por la laboro kaj lukto, ilin atentantaj.

Ekde la unuaj jaroj, ŝi instruu al la infanoj eviti la abismon de libereco, kontrolante al ili la sintenojn kaj korektante iliajn

pensmanierojn, ĉar tiu estas ja la plej oportuna okazo por la fiksado de la vivobazoj.

Ŝi devas senti la infanojn de aliaj patrinoj, kvazaŭ ili estas de ŝi mem, neniel nutrante la falsan komprenon, ke la ŝiaj estas pli bonaj kaj plimulte dotitaj ol tiuj de la aliaj patrinoj.

Ŝi instruu al ili la plej puran toleremon, sed ne flankemetu la energion, kiam ĝi estos necesa en la edukprocedo, rekonante la variecon de tendencoj kaj la diversecon de la temperamentoj.

Ne rompante la normon de spirita grandeco de sia tasko, ŝi oferu sin ĉiel, kiel ŝi povos, por la paco de siaj infanoj, instruante al ili, ke ĉia doloro estas respektinda, ke ĉia edifa laboro estas dia, kaj ke ĉia malŝparo estas grava peko.

Ŝi instruu al ili la respekton al la aliula malfeliĉo, ke ankaŭ ili estu protektataj en la mondo, en la ilin atendanta suferhero, komuna al ĉiuj enkarnaj spiritoj.

Ĉe la problemoj de doloro kaj laboro, de provo kaj sperto, ŝi ne pravigu ĉian plendon de siaj infanoj sen senpasia, skrupula ekzameno de la demandoj, altigante iliajn sentojn al Dio, ne permesante, ke ili haltu ĉe la frivolaĵoj aŭ moralaj antaŭjuĝoj de la nedaŭraj situacioj de la mondo.

Hejme, ŝi estu la bona, senpartia konsilantino, la stimulo al la laboro kaj la fonto de harmonio por ĉiuj.

Ŝi serĉu en la kompatema Patrino de Jesuo la simbolon de la kristanaj virtoj, transdonante al siaj ĉirkaŭantoj la sublimajn dotojn de humileco kaj persistemo, sen ia ajn priokupiĝo pri la pasemaj gloretoj de la materia vivo.

Se tamen ĉiuj ŝiaj sindonoj kaj rezignoj fiaskos ĉe la plenumado de tiu programo de evangelia diligenteco, koncernas la nekomprenatajn patrinojn transdoni al Dio la frukton de siaj laboroj, malbezonante ĉian juĝon de la mondo, ĉar la Favorkora Patro scios taksu ŝiajn oferojn kaj benos ja ŝiajn penojn, en la sankta institucio de la familia vivo.

190. – *Kiam la infanoj estas ribelemaj kaj nekorekteblaj, rezistantaj al ĉiaj edukaj procedoj, kiel konduku la gepatroj?*

– Uzinte ĉiujn procedojn de amo kaj energio ĉe la laboro de eduka gvidado de la infanoj, estas juste, ke la respondantoj pri la familia institucio atendu, sen interrompo de siaj sindono

kaj ofero, la manifestiĝon de la Dia Providenco por la klarigo de siaj nekorekteblaj infanoj, komprenante, ke tiu manifestiĝo nepre venos tra akraj doloroj kaj provoj, tiel ke la kampo de kompreno kaj sento estu sukcesplene semita.

191. – *Kiel la gepatroj povos vekti en la sino de sia ribelema infano la sanktajn sentojn pri la devo kaj ŝuldoj al la Ĉiopova Dio, kies infanoj ni estas?*

– Post la elĉerpiĝo de ĉiuj rimedoj por la bono de la infanoj kaj post la sincera praktikado de ĉiuj amaj, energiaj procedoj por ilia spirita evoluo, sen ia ajn sukceso, estas necese, ke la gepatroj vidu en tiuj plenaĝaj infanoj, kiuj ne komprenis iliajn parolon kaj ekzempladon, indiferentajn aŭ krudajn fratojn de sia animo, krimhelpantojn en delikta pasinteco, kiujn estas necese transdoni al Dio, tiel ke ili estu nature prilaboritaj de la doloraj, perfortaj procedoj de la monda edukado.

La doloro havas nekonatajn povojn por penetri en la spiritojn, kie la amolimfo ne sukcesis flui, malgraŭ la netaksebla agado de la gepatra, homa amemo.

Tial, en certaj cirkonstancoj de la vivo estas nepre necese, ke la gepatroj havu superegan rezignon kaj konstati en la sufero de siaj infanoj la manifestiĝon de ia supera boneco, kies kaŝita ĉizilo el suferoj reformas kaj perfektigas por la spirita estonteco.

192. – *Ĉu la mensogo prokrastas la spiritan elvolviĝon?*

– Mensogo ne estas ago gardi la veraĵon por oportuna momento, ĉar tiu mensa sinteno praviĝas ĉe la leciono mem de la Sinjoro, kiu rekomendis al siaj disĉiploj ne ĵeti trafe-maltrafe la benitan semon de liaj instruoj de amo.

La mensogo estas insida ago, celanta tujan profiton por la mensoganto, kun malprofito por la aliulaj interesoj, laŭ ties aŭtentika, sankta mieno. Kaj tiu mensa sinteno de la homo estas el tiuj, kiuj plej humiligas la homan personon, ĉiel prokrastante la dian evoluon de la spirito.

193. – *Kiam ĝi estas dirita kun nudaj sincereco kaj nekaŝemo, ĉu la vero povas prokrasti la spiritan progreson, pro la doloro, kiun ĝi kaŭzas?*

La vero estas la spirita esenco de la vivo.

Ĉiu homo aŭ ĉiu grupo da homoj posedas ja sian porcion da relativaj veroj, per kiu la animoj sin nutras, en la diversaj evoluaj sferoj.

La koro havanta pli grandan porcion, estas kapabla nutri siajn fratojn sur la vojo al pli altaj akiroj, sed estas nepre necesa la plej bona ama kriterio ĉe la disdonado de la bonaĵoj de la vero, ĉar tiuj bonaĵoj devas esti liverataj laŭ la komprenkapablo de la Spirito, al kiu sin destinas la instruo, tiamaniere ke la klopodo ne estu akompanata de kontraŭefikaj sekvoj.

Ankoraŭ en ĉi tiu okazo ni povas ekzameni la ekzemplojn de la materia naturo.

La nutraĵo de infano devas enhavi la substancon subtenantan la vivon, sed ĝi ne povas esti egala al la nutraĵo de plenaĝulo. La senzorgemo pri tiu afero povus konduki la infanon al konsumiĝo, kvankam la substancoj donataj estas plenaj de vivigaj elementoj.

194. – *Ĉu ni devas nepre kalkuli je la helpo de la spiritaj gvidantoj al niaj homaj realigoj?*

– Spirita gvidanto povos ĉiam kunhelpi ĉe viaj laboroj, ĉu nerekte helpante vin ĉe viaj malfacilaĵoj, ĉu konsolante vin ĉe via doloro, stimolante vin al la morala edifado, nepre necesa por ĉies ilumino. Vi tamen ne prenu liajn fratecajn esprimojn por fomala promeso, sur la kampo de la mondaj realigoj, ĉar tiuj realigo dependas de via propra klopodo kaj troviĝas alĝustigitaj la la meĥanismo de la provoj nepre necesaj por via perfektiĝo.

195. – *Kiel ni povu trovi en ni mem la elementon klarigantan ĉian dubon, koncerne la fratecan, bonegan kvaliton de la ago, kiun ni deziras efektiviĝi en la ĉiutagaj luktoj de la interrilata vivo?*

– Pri tio ni estas devigitaj rememori la malnovan ordonon: “ami nian proksimulon kiel nin mem”.⁽¹⁾

⁽¹⁾ Levidoj, 19:18. – **La Trad.**

Ĉe ĉiuj siaj faroj, la disĉiplo de Jesuo devos konsideri, ĉu li estus kontenta, ricevante ilin de unu sia frato, en la sama kvalito, intenseco kaj maniero, en kiu li intencas apliki la maksimon aŭ ekzemplon al la aliaj.

Per tiu introspekta procedo, ĉesus ĉiuj ventanimaj kampanjoj de agoj kaj paroloj, kaj la kristana komunumo estute iradus sian efektivan vojon.

196. – *Kiel la spiritaj gvidantoj rigardas niajn plendojn?*

– Multaj plendoj estas konsiderataj veraj preĝoj, indaj je ĉia zorga atento de la elkarniĝintaj amikoj.

Sed la plimulto de ili estas nenio alia ol vana lamentado, al kiu la homo al kutimiĝis, kvazaŭ al iu ajn malvirto, ĉar, se vi havas en la manoj la efikan kuracilon de la Evangelio de Jesuo kaj la konsolajn klarigojn de la Doktrino de la Spiritoj, la ripetado de certaj plendoj esprimas malbonan volon ĉe la aŭtentika apliko de la spiritisma scio al vi mem.

III

KULTURO

RACIO

197. – *En la spirita sfero, kiel oni rigardas la posedaĵon de la surtera kulturo?*

– En la nevidebla sfero, ĉiuj esprimoj de la homa kulturo estas taksataj kiel sankta kolekto da klopodoj de la planeda homo en ties kontinuaj, respektindaj laboroj.

Sed estas necese reliefigi, ke sur ĉi tiu “alia flanko” de la vivo, via kultura pozicio estas konsiderata kiel proceso, ne kiel celo, ĉar ĉi tiu kuŝas en la perfekta saĝo, glora sintezo de la animo, edifinta sin mem tra ĉiuj okazoj de laboro kaj studo en la materia ekzistado.

Inter la surtera kulturo kaj la spirita saĝo estas eksterordinara diferenco, kiun oni bezonas konsideri. La unua ŝanĝiĝas

ĉiutage kaj varias laŭ vidpunkto de la individuoj, kiuj estas ĝiaj eksponantoj, en la plej evidentaj karakteroj de nekons-tanteco; la dua tamen estas la dia, pura kaj netrandsonebla scio, kiun la animo amasigas dum sia marŝo survoje al la senmorta vivo.

198. – *Ĉu la racionalismo povas garantii la evoluadon sur la Tero?*

– Per si mem la racionalismo ne povas efektiviĝi tiun grandiozan penadon, des pli, ĉar ĉiuj centroj de la surtera kulturo jam de longe tro misuzas tiun koncepton. Ĉe iliaj ekscesoj ni rimarkas ian respektindan civilizacion kondamnita al amaraj ruinoj. La racio sen la sento estas malvarma kaj senkompata, same kiel la numeroj, kaj la numeroj povas esti faktoroj de observado kaj registrado de aktiveco, sed ili neniam kreis la vivon. La racio estas nepre necesa bazo, sed sole nur la sento kreas kaj edifas. Tial la konkeroj de humanismo neniam malaperos tra la evoluaj procesoj de la Homaro.

199. – *Ĉu la Racio eble malbezonos la Fidon?*

– La homa racio ankoraŭ estas tre malforta kaj ne povos malbezoni la kunhelpon de la fido, ĝin prilumanta, por la solvo de la grandaj, sanktaj problemoj de la vivo.

Pro la disigo de ili ambaŭ, sur la vivovojoj, ni vidas ja la surteran homon en la terura labirinto de mizero kaj detruo.

Pro la malsaĝeco de la racio, sen la dia lumo de la fido, la forto faras siajn lastajn provojn por alproprigi al si ĉiujn konkerojn de la mondo.

Vi tro parolis pri racio kaj tamen vi restas plu en la detrua milito, kie nur iradas mizeraj venkitoj; vi elmontris la plej altajn signojn de inteligento, sed mobilizas vian tutan konon por la senkompata buĉado; vi predikis la pacon, kaj fabrikis hommortigajn kanonojn; vi pretendis esti solvinta la sociajn problemojn, intensigante la konstruadon de prizonoj kaj bordeloj.

Tia estas la progreso de la racio sen la fido, kie la homoj perdiĝas en senglora, sencela lukto.

200. – *Kie oni lokalizu la originon de la deturnoj de la homa racio?*

– La origino de tiu malekvilibro kuŝas en la dizertado de la pastraro en la diversajn ekleziojn fonditajn konforme al la instruoj de Kristanismo. Kaŝante la veron, por ke superregu la ekonomiaj interesoj de ĝiaj malvirtaj elmontrantoj, la religiaj sektroj okazigis la degeneradon de la fido, pro absoluta manko de kunlaboro kun la prudento, sur la senfina vojo de la vivokonkerroj.

201. – *En la kadro de la raciaj valoroj, ĉu Scienco kaj Filozofio sin kompletigas reciproke, celante la realigojn de la spirito?*

– Ili ambaŭ kompletiĝas sur la kampo de la mondaj aktivecoj, same kiel du grandaj riveroj, kiuj, servante al diversaj regionoj en la sfero de produktado nepre necesa por la vivotenado, kuniĝas ĉe difinita punkto de la fluejo por kune enflui en la saman oceanon, kiu estas tiu de la saĝo.

202. – *Ĉu en la problemo de la esplorado estas limoj por apliko de la racionalismaj metodoj?*

– Tiuj limoj ekzistas ne nur por la apliko, sed ankaŭ por la observo; tiuj limoj dependas de la spiritaj fortoj, regantaj la planedan evoluon, obee al la konveno kaj stato de morala progreso de la homoj.

Tial la limoj de la tiel nomataj pozitivaj aplikoj kaj analizoj ĉiam akompanas kaj ĉiam sekvas la spiritan evoluadon de la Spiritoj enkarniĝintaj sur la Tero.

203. – *Kiel oni juĝu la racionalistojn, fierantajn pri siaj surteraj realigoj, per kiuj ili pretendas trovi lastajn, definitivajn valorojn?*

– Tiuj, kiuj fieras pri io, preskaŭ ĉiam falas en la izolisman egoismon, ilin apartigantan disde la universa plano, sed tiuj, amantaj sian penon ĉe la aliulaj efektivecoj aŭ la sanktan kontinuecon de la aliulaj verkoj, ĉe sia propra aktiveco,

neniam konservas absurdajn pretendojn kaj neniam limigas sian evolusferon, ĉar la profundaj energioj de la spiritoj sanktigas al ili la sincerajn penojn, ilin kondukante al la grandaj faroj, tra la noblaj vojoj de la inspiro.

INTELEKTISMO

204. – *Ĉu la homa animo povos sin levi al Dio sole nur per la morala progreso, sen la intelektaj valoroj?*

– Sento kaj saĝo estas la du flugiloj, per kiuj la animo sin levos al la senlima perfekteco.

En la malvasta rondo de la Tero, ili ambaŭ estas konsiderataj kiel morala progreso kaj intelekta progreso, sed, ĉar ni ekzamenas nun la ĝustedire mondajn valorojn, aparte, tial ni devas konfesi, ke ili ambaŭ estas nepre necesaj por la progreso. Estas juste tamen konsideri la superecon de la unua super la dua, ĉar la intelekta parto, sen la morala, povas oferi plurajn okazojn de falo ĉe la ripetado de la eksperimentoj, dum la morala progreso neniam estos troa, prezentante la plej gravan nukleon el la evoluaj energioj.

205. – *Ĉu ni povas havi ideon pri la amplekso de nia intelekta kapablo?*

– La intelekta kapablo de la surtera homo estas tro malvasta, kompare kun la altaj povoj de la spirita estulo libera de la materiaj ligiloj.

La ĉeneroj de la reenkarigi ludas la rolon de lumŝirmilo super ĉiuj antaŭaj konkeroj de la reenkariginta Spirito. En tiu ombro kuŝas la amaso da neklaraj rememoroj, da denaskaj inklinoj, da sennombraj spertoj, da naturaj, spontaneaj valoroj, kiujn vi nomas subkonscio.

La ordinara homo estas parta reprezento de la transcenda homo, kiu revenos al siaj akiraĵoj de la pasinteco, post kiam li estos plenuminta la provon aŭ mision postulatajn de liaj moralaj kondiĉoj, en la meĥanismo de la dia justeco.

Cetere, la intelekta nekapablo de la fizika homo havas sian originon en lia propra situacio, karakterizita de la neceso de amaraj provoj.

La homa cerbo estas fragila, nesufiĉa aparato, kie la falinta Spirito devas valorigi siajn laborajn realigojn.

Prezentu al vi la kranion, kie kuŝas mikroskopaj ĉeloj tute okupitaj pri sia soifo je oksigeno, ne malbezonante eĉ por unu miliono da sekundo da sangofluon ilin irigaciantan; la fragilecon de la filamentoj, ilin kunigantaj, kies konektivoj mezuras cent milionojn da milimetro, kaj tiel vi havos ĝustan ideon pri la mizero de la pensanta maŝino, kiun la saĝulo el la Tero havas por siaj fieraj deduktoj. Kaj tiam vi rimarkos, ke, pro lia kondiĉo de Spirito falinta en la elaĉeta lukto, ĉio emas elpruvi al la surtera homo lian humilan pozicion, tiel ke, en ĉiuj kondiĉoj, li povu kulturi al aŭtentikajn valorojn de la sento.

206. – *En la spirita sfero, kiel estas konsiderata la nuntempa intelekta pozicio de la Tero?*

– En la modernaj tempoj la surteraj intelektaj valoroj suferas la humiligon de ĉiuj malvirtigaj fortoj de la dekadenco. La nuntempa generacio, kiu tiom da fojoj sin donis al fanfaronado, atribuante al si mem la plej altajn konkerojn sur la kampo de la pozitiva rezonado, kaŭzis la plej vastajn malekvilibrojn en la evoluaj fluoj de la terglobo, per sia nepravigebla apartiĝo de la sento.

La edukaj rondoj el la Tero neniam posedis tiom da facileco por plivastiĝo, kiel nun, dank' al la evoluo de la presarto; la libro kaj la ĵurnalo neniam estis tiel disvastigitaj; malgraŭ tio, la gazetaro estas, preskaŭ ĝenerale, ilo de skandalo por la komunumo, kaj centro de ekonomia intereso por la privata medio, dum malmultaj libroj triumfas sen helpo de la privata aŭ oficiala bonŝanco, en la okazo, ke ili pritraktos la altajn vivoproblemojn.

207. – *Ĉu la intelekta dekadenco povas pligravigi la malekvilibron de la mondo?*

– Sen ia dubo. Tial ni rimarkas en la politika-socia pejzaĝo de la Tero la deflankiĝojn, la teoriajn absurdojn, la ekstremismojn, estigantajn la renverson de ĉiuj valoroj.

Tro multe priokupitaj pri siaj ekstravagancoj, la misiuloj de la intelekto ŝanĝis sian laboron ĉe la spirito por okupo de

superregado, kiel la religiaj pastroj, kiuj ŝanĝis la lumon de la fido por la tuŝeblaj prebendoj de la ekonomia situacio. Tia situacio kaŭzis ja la plej altan malekvilibrion al la socia organismo de la Tero, kaj, kiel reala pruvo, de tiu aserto, ni memoru, ke la milito de 1914-1918 kostis al la plej inteligentecaj popoloj el la mondo pli ol cent mil miliardojn da frankoj, reliefigante, ke, per malpli ol la centona parto de tiu kvanto, tiuj nacioj povus esti elpelintaj la fantomon de la sifiliso el la scenejo de la Tero.

208. – *Ĉu la intelekto havas specialan taskon sur la terglobo?*

– Kiel multenombraj Spiritoj ricevas la provon de riĉeco, de nedaŭra regado kaj de aŭtoritato, tiel same ekzistas tiuj, kiuj ricevas la santkan mision, en elaĉetaj luktoj aŭ sanktigaj komisioj, plenumi la bonan taskon de la intelekto, por reala profito de la kolektivo.

Sed, kiel la mono kaj la elstara pozicio estas kvazaŭ medioj de luktoj, kie ĉiu spirita sukceso estas pli disputata kaj malfacila, tiel ankaŭ la intelekta reliefo ofte malpliigas en la mondo la vidokapablon de la enkarna spirito, kondukante lin al la nepravigebla vantemo, kie la plej puraj intencoj neniigaĝas.

209. – *Ĉu la verkinto de ia libro estos juĝata laŭ la efikoj produktitaj de sia intelekta laboro sur la Tero?*

– La libro similas al semado. La solida, sincera, bon-intenca verkisto estas kvazaŭ antaŭzorgema terkulturisto, kiu trafos abundan rikolton kaj altan rekompencan de la diaj leĝoj por sia aktiveco. La frivola literaturisto, amiko de bagatelaĵoj kaj vantemo, estas ĝuste tiu mallaborema, senvalora laboristo, kiu “semas ventojn por rikolti tempeston”⁽¹⁾. Kaj la intelektulo, kiu vendas sian plumon, sian opinion kaj sian penson, ĉe la merkato de la kalumnio, intereso, ambicio kaj malico, tiu estas simila al la krima terkulturisto, kiu humiligas la malavarajn eblecojn de la Tero, kiu priŝtelas

⁽¹⁾ Hoŝea, 8:7. – **La Trad.**

najbarojn, kiu nek plantas nek permesas la disvolviĝon de la aliula semejo, ĉar li kulturis dornojn kaj pliigas ŝuldojn, por kiuj li respondos unu tagon, kiam li estos demetinta siajn karnajn vestojn por aperi antaŭ la veraĵoj de la Senlimo.

210. – *Por kompreni siajn spiritajn devojn, ĉu la laborantoj de Spiritismo devas iri al la intelektuloj?*

– La laborantoj de la doktrino estu ĉiam pretaj en la klariga tasko, ĉiufoje, kiam al ili venos tiuj, kiuj sincere deziras kunlabori kun ili. Sed vekti la atenton de aliuloj por ilin regeneri, kiam ni ĉiuj, eĉ la elkarniĝintoj, strebas al perfektigo kaj lernado, ne ŝajnas juste, ĉar ni ankoraŭ havas unu esencan devon, kiu estas tiu de nia propra edifado.

En la doktrina laboro ni devas konfesi, ke Spiritismo estas la reviviĝinta Kristanismo, per kiu ni devas atesti la veron, kaj, laŭ nia koncepto pri relativeco, la tuta fundamento de la vero, sur la Tero, troviĝas en Jesuo Kristo.

La vero triumfas per si mem, sen la helpo de la malfortaj homaj eblecoj. Neniu homo devos serĉi ĝin, opiniante sin elemento nepre necesa por ĝia venko. Kiel ĝia voĉo sur la Tero, Spiritismo ne bezonas iajn homojn por konsoli kaj instrui la estulojn. El tio oni konkludas, ke la surteraj intelektuloj mem devas ja spontanee serĉi, ĉe la fonto de la doktrinaj scioj, la favoron de ĝia prilumado.

PERSONECO

211. – *Kiel oni komprenu la nocion pri personeco?*

– En la mondo, la nocio pri personeco estas tre deturnata de siaj aŭtentikaj valoroj, fare de la strangaj spiritoj treege priokupitaj pri sia altrangeco en la vasta mondo de beletro. Multaj opinias, ke “havi personecon” estas posedi spiriton de ribelo kaj kontraŭdiro en la parolo ĉiam preta por kritiki la aliajn, forgesante sian propran situacion. Aliaj opinias, ke la “homo de personeco” devas iri tra la mondo, serĉante notindajn poziciojn per falsaj triumfoj, ĉar ĉi tiuj postulas la plenan forgeson pri la plej sanktaj devoj de la koro. Malmultaj zorgas

pri la bono de humileco kaj rezigno por la vera edifo de la homa personeco, ĉar, por la sfero de la pura spiriteco, la konkero de la interna prilumado valoras ĉion, se oni konsideras, ke ĉiuj esprimoj de la noca, maltrankvila personeco de la surtera homo forpasos kun la tempo, kiam la nefleksebla morto estos malfermita la realajn okulojn de la homo.

212. – *Ĉu homo sen grandaj intelektaj kapabloj estas ĉiam senvalora homo?*

– La koncepto pri senvaloreco ŝanĝiĝas en la sfero de niaj universaj konkeroj, post la transiĝoj de la morto.

En via mondo vi kutimas surtronigi la verkiston, kiu trompis la publikon; la politikulon, kiu makulis la juron; la kapitaliston, kiu riĉiĝis sen skrupuloj de konscienco, ĉiuj lokitaj en la galerio de la superaj homoj. Altigante al ili la individuajn meritojn per ekscasaj flataĉoj, vi multe parolas pri “senvaloreco”, “bando”, “rutino”, “supera personeco”.

Por ni, la virto de la rezigno de la saĝaj, abnegaciaj patroj de familio, ĉe la vasta amaso da rutinaj aktivecoj de la surtera ekzistado, estas ja nekomparebla, laŭ grandeco, kun la spiritaĵoj de la intelektuloj, kiu senespere baraktas ĉe tribunon, sen iu ajn serioza edifo, aŭ kiu embarasiĝas en vortaj konfuzoj en la literatura sfero, sen la sincera priokupiĝo lerni el la ekzemploj de la vivo.

La laboristo, kiu pasigas la tutan vivon en la sunlumo, kulturante la teron, fabrikante la bongustan vivopanon, estas pli valora en la okuloj de Dio ol la artistoj kun malvirta intelekto, kiuj faras nenion alian ol malordigi la dian marŝon de liaj leĝoj.

Notu al vi tamen, ke la karaktero de la intelekto tre valoras, sed ne povas malbezoni la valorojn de la sento en ties subluma esenco, kaj oni fine komprenas, ke la “senvalora homo” ne estas la surtera laboristo, amanta siajn hejmajn realigojn kaj la sanktan plenumadon de siaj devoj, sur kies abnegacio konstruiĝis la mirinda organizaĵo de la monda havaĵo.

213. – *Ĉu ni lulu la deziron akiri la elementojn de la tiel nomata persona magnetismo?*

– Tiu deziro estas tre nobla, sed neniŭ pretendu efektiviĝi ĝin sole nur per la sperto el la legado de libroj pri tiu temo.

Ne malmultaj estas tiuj, kiuj serĉas tian legaĵon, dezirante trovi magiajn formulojn sur la vojo de malpli granda peno.

Sed estas nepre necese reliefigi, ke neniŭ studemulo povas konkeri simpation, se li ne estas aliiginta sian koron en fonton de spontanea, sincera boneco. En la vivo ne sufiĉas scii. Estas nepre necese kompreni. La libroj instruas, sed sole nur la propra klopodo perfektigas nian animon por la granda, benata kompreno. Forgesu la facilan konkeron, la meĥanikan operacion, nepravigeblajn ĉe la spiritaj edifadoj, kaj turnu viajn atenton kaj penson al via propra interna mondo. Tie multo estas farenda, kaj, ĉe tiu bona laboro, la animo memkompreneble prilumiĝas heligante la vojon de siaj fratoj.

214. – *Kiel ni komprenu la impulsojn de tiuj, kiuj kredas la influon de la tiel nomataj talismanoj de la persona feliĉo?*

– Ekzistas homoj, kiuj, por teni ĉiam aktiva sian spiritan energion, bezonas koncentri sian atenton sur tuŝeblan objekton, celante la sugestiajn statojn nepre necesajn por siaj realigoj, kiel tiuj kredantoj nepre bezonantaj materiajn bildojn kaj simbolojn por akcepti la efikon de siaj preĝoj.

Estu certaj tamen, ke la talismano por la definitiva persona feliĉo konsistas el la bona koro ĉiam kutimiĝinta al harmonio, humileco kaj amo, ĉe la efektiva plenumado de la projektoj de Dio.

215. – *Ĉu la tiel nomataj “bonŝancaj homoj” estas gvidataj de la amikaj Spiritoj?*

– Kion vi konsentis nomi “bonŝanco”, tio estas natura situacio en la pleno de la laboroj de la enkarna Spirito, kaj ne estas necese, ke vi akceptu la intervenon de la nevidebla sfero en la plenumado de la personaj spertoj.

La “bonŝanco” estas ankaŭ priresponda provo en la meĥanismo de la vivo, kaj ĝi postulas de la persono ĝin ricevinta multe da kompreno rilate la dian favorkorecon, por ke li ne misuzu la havon de sanktaj kapabloj al li donitan.

216. – “*Memamo*”, “*digno*”, “*karaktero*”, “*honoro*”, *estas atributoj, kiujn la homa socio postulas de la persono; kiel ni kondutu tiuokaze, kiam la faktoj kolizios kun niaj evangeliaj scioj?*

– La socio postulas tiajn atributojn de la persono, kaj tamen tiu sama socio ankoraŭ ne scias kompreni ilin, se ne konforme al siaj konvencioj, dum memamo, digno, karaktero kaj honoro devus esti trajtoj de spirita perfekteco kaj neniam elmontroj de egoismo, vantemo kaj fiero, kiaj ili ordinare manifestiĝas sur la Tero.

Kiam la homo kristaniĝos, komprenante tiujn moralajn poziciojn en ties reala aspekto, tiam ne plu okazos iu ajn kolizio de la eventoj de la ordinara ekzistado kun liaj evangeliaj scioj, ĉar lia penado estos ĉiam tiu de la sincera kunlaboro por la restarigo kaj spirita altigo de siaj similuloj.

217 – *Kia estas la plej facila maniero efektiviĝi la personan viklecon, por eviti la falon pro tentoj?*

– La plej simpla maniero estas tiu, ke ĉiu starigu tribunalon de memkritiko en sia propra konscienco, kondukante al alia tiel honeste, kiel oni deziras, ke aliaj kondutu al oni.

IV

PRILUMO

NECESECO

218. – *Ĉu la doktrina propagando, celanta la multobligon de prozelitoj estas ja la tuja neceseco de Spiritismo?*

– Neniel. La direktado de Spiritismo, en ĝia karaktero de reviviĝinta Evangelio, apartenas la la Kristo kaj ties komisiitoj, antaŭ ĉia homa diligenteco, fragila kaj pereema. La tuja neceseco de la spiritistaj rondoj estas tiu de scio kaj aŭtentika apliko de la Evangelio fare de ĉiuj, kiuj batalas en ĝiaj vicoj, avidaj je siaj prilumo kaj evoluo. La unuopa laboro pro la prilumo de si mem devas esti konstanta kaj metoda. La fenomenoj vekas la spiriton dormantan en la karno sed ili ne

liveras la internajn lumojn atingeblajn sole nur per grandaj individuaj peno kaj laboro. La parolo de la gvidantoj kaj mentoroj el Transmondo instruas, sed ĝi ne povas esti definitivaj elementoj de elaĉetoj, kies efektivigo postulas de ĉiu homo sanktigajn oferojn kaj rezignojn, ĉe la peniga lernado de la vivo.

219. – *Ĉe la spiritistaj laboroj, kie ni trovu la ĉefan fonton de instruo, kiu nin orientu al la prilumado? Ĉu ni povos atingi ĝin per la mesaĝoj de niaj karaj estuloj, aŭ nur per la fakto, ke ni konservas en la koro la valoron de la kredo?*

– Sennombraj filozofoj resumis la tezojn kaj konkludojn de Spiritismo en ties filozofia, scienca kaj religia aspektoj. Por la interna prilumo tamen vi nur havas en la mondo la Evangelion de la Sinjoro, kiun nenia doktrina gvidlibro povos superi.

Cetere, en siaj kristanaj valoroj Spiritismo ne havas pli grandan celon ol tiun restarigi la evangelian veron por la senesperaj, nekredemaj koroj.

Neesksplikeblaj teorioj kaj fenomenoj ekzistis ĉiam en la mondo. La doktrinaj verkistoj kaj scienculoj povos utiligi siajn sciojn ĉe la konstruado de novaj formuloj por la surteraj filozofioj, sed la definitiva verko de Spiritismo estas tiu de la edifado de la profunda konscienco laŭ la Evangelio de Jesuo Kristo.

La nevidebla sfero povos alporti al vi la kortuŝajn kaj konvinkajn mesaĝojn de viaj karuloj; vi povos gardi en via impresa mondo la plej altajn kredprincipojn. Tiu tamen estas la penado, la realigo de la doktrina meĥanismo, aganta ĉe via personeco. Sole nur la laboro de memevangelizo estas tamen firma kaj nepereema. Sole nur la individua diligenteco en la Evangelio de Jesuo povas prilumi, nobligi kaj elaĉeti la spiriton, ĉar, post via edifado per la ekzemploj de la Majstro, vi atingos tiun veron, kiu faros vin libera.

220. – *Ĉu estas ia diferenco inter kredo kaj prilumado?*

– Ĉiuj homoj sur la Tero, eĉ la materialistoj mem, kredas ion. Sed estas tre malmultaj tiuj, kiuj prilumiĝas. Kiu kredas,

tiu nur akceptas; sed kiu prilumiĝas, tiu vibras kaj sentas. La unua dependas de la eksteraj elementoj, en kiuj li metas la objekton de sia kredo; la dua estas libera de la eksteraj influoj, ĉar estas multe da lumo en lia propra interno, tiamaniere ke li kuraĝe triumfos ĉe la provoj, al kiuj li estis kondukita en la mondo.

Tial la sinceraj spiritistoj devas kompreni, ke ne estas sufiĉe kredi la fenomenon aŭ la aŭtentikecon de la komunikado kun la Transmondo, por ke iliaj sanktaj devoj estu perfekte plenumitaj, ĉar la ĉefa kondiĉo estas la diligento, la laboremo, la sereneco ĉe la provoj de la vivo, la sinofero, tiel ke ili plene komprenu la ekzempladon de Jesuo Kristo, serĉante la Dian Lumon por la plenumado de ĉiuj siaj laboroj en la mondo.

221. – *Ĉu la racia analizo povas definitive helpi ĉe la laboro de nia spirita prilumado?*

– Estas certe, ke la homo ne povas flanken meti la racion por venki en la tasko konfidita al lia diligenteco, dum la vivo; estas necese tamen konsideri, ke jam de longaj jarcentoj tiu racio estas prilaborata de ĉiaspecaj malvirtoj, sur la Tero.

Plenan konfirmon pri tiu aserto ni havas en la eŭropa ultraracionalismo, kies progrese evolupozicio ankoraŭ nun ne hezitis inter la paco kaj la milito, inter la rajto kaj la forto, inter la ordo kaj la agreso.

Pli ol ĉie ajn en la terglobo, la homa racio tie sin altigis al la plej altaj kulminoj de efektivigo, kaj tamen, malekvilibrata pro manko de sento, ĝi revivigas la sovaĝecon kaj la krimon, malgraŭ la pompo de la civilizacio.

Ni do konfesas, ke en ĉi tiu momento de la terglobo ĉia prilumado de la homo nepre naskiĝos prefere el la sento. Por zorgi pri la aŭtentikaj valoroj de la koro, la senespera saĝulo el la mondo devas sin turni al Dio kiel humila infano, ĉar nur per la reeduko de sento, per propra klopodo, oni povos atendi la sopiratan pliboniĝon de la homoj.

222. – *Kion signifas la tiel nomata “anima inspiro”, kiu tiel ofte aludas la amikaj Spiritoj?*

– Kiam sincereco kaj bonvolo kunfratiĝas interne de unu koro, en tiu interna sanktejo estiĝas la spirita lumo por la sublima kompreno de la vero.

Tiu estas la tiel nomata “anima inspiro”, neebla por ĉiuj, kiuj persistas en la konvencia logiko de la mondo, aŭ en la negativaj esprimoj de nedaŭraj situacioj de la materio, en ĉiuj sencoj.

223. – *Ĉu en la vivo de la surtera homo estas difinita tempo, kiam li povu sin doni al la laboro de prilumiĝo, kun plimulte da suksebleco?*

– La ekzistado sur la Tero estas bonega, konstanta lernado. Ne estas aĝoj por la laboro por spirita prilumiĝo. La gepatroj devas orienti la infanon, ekde liaj unuaj paŝoj, rilate la evangeliajn instruojn, kaj la maljunulo ne rajtas preteksti la organan lacecon antaŭ tiuj studoj necesaj al li.

Estas certe, ke la akiroj de maljunulo, rilate al novaj scioj, ne povas esti tiel facilaj kiel tiuj de junulo, pro ties sana organizaĵo, por nur paroli pri la fizika kondiĉo de ĉi tiu. La pliaĝaj homoj havas tamen, favore al si, la vivspertojn, kiuj faciligas la komprenon kaj nobligas la penon de la prilumado de si mem, konsiderante, ke, se la maljunaĝo estas nokto, la animo havos en la morgaŭo de la estonteco la brilan aŭronon de nova vivo.

224. – *Ĉu la elkarniĝintaj animoj ankaŭ daŭrigas la laboron de prilumado de si mem?*

– En la nevideblaj sferoj, la Spirito daŭrigas plu la benatan taskon de akirado de la propraj valoroj, kaj en la mondo la reenkarniĝo ĉefe celas la plenumon de tiu klopodo.

LABORO

225. – *Kiel kompreni la saviĝon de la animo, kaj kiel ni atingu ĝin?*

– En la limon de la spirita heleco, kiun la Konsolanto disĵetas sur la religiajn kaj filozofiajn kulisojn el la mondo,

ni devas konsideri la koncepton pri saviĝo kiel prilumadon de si mem, sur vojo al la plej altaj konkeroj kaj realigoj en la Senlimo.

Konsiderante tiun realan aspekton de la problemo pri “saviĝo de la animo”, ni estas devigitaj konfesi, ke, se la Dia Providenco uzis ĉiujn rimedojn nepre necesajn por la materia progreso de la fizika homo sur la Tero, la Evangelio de Jesuo estas ja la superega donaco de la Ĉielo por la elaĉeto de la spirita homo, marŝanta al la universaj amo kaj saĝo.

Jesuo estas la Superega Modelo.

La Evangelio estas la gvidlibro por la altiĝo de ĉiuj luktantaj spiritoj, la surtera lernaĵo por la superaj sferoj de la Senlimo. De ĝia apliko venas la lumo de la Spirito.

En la tumultego de la ĉiutagaj taskoj, memoru la aserton de la Sinjoro: – “Mi estas la Vojo kaj la Vero kaj la Vivo”⁽¹⁾. Se sieĝas vin la aŭtoritato kaj la povo, la riĉaĵo kaj la inteligento, memoru ankoraŭ plu liajn vortojn: “Neniu venas al la Patro krom per mi”⁽²⁾. Kaj se vi sentos vin tuŝitaj de la malvarma vento de malfeliĉo kaj doloro, se vi estos superŝarĝitaj de la mondaj laboroj, penu aŭskulti ĉiam Lin en la plejprofundo de via animo: “Kiu deziras trovi la Dian Regnon, tiu prenu sian krucon kaj sekvu miajn paŝojn”.⁽³⁾

226. – *Ĉu la spiritaj gvidantoj havas aktivan partoprenon ĉe nia tasko de persona prilumiĝo?*

– Tiu kunlaboro efektiviĝas nur tiel, kiel en la okazo de la malpli junaj fratoj, aŭ de la amikoj pliaĝaj en la surteraj spertoj.

La mentoroj de la Transmondo povos ja montri al vi la rezultojn de siaj propraj penoj sur la Tero, aŭ, tiam, klarigi la instruojn, kiujn la homo jam ricevis per la mizerikordo de la Kristo kaj per la bonvolemo de ties senditoj. Sed ili neniel povos forigi la enkarnan animon for de la laboro plenumota de li en la nedaŭraj lecionoj en la mondo.

⁽¹⁾ Johano, 14:6. – **La Trad.**

⁽²⁾ Johano, 14:6. – **La Trad.**

⁽³⁾ Kp. Mateon, 16:24. – **La Trad.**

Kion diri pri instruisto, kiu solvus la ordinarajn problemojn de siaj gelernantoj?

Krome, la spiritaj amikoj ne troviĝas en beateco. Iliaj aktivecoj kaj devoj estas pli grandaj ol la viaj. Iliaj novaj problemoj estas multenombraj, kaj ĉiu spirito devas serĉi en si mem la lumon necesan por la klara vido de la vojo.

Laboru ĉiam. Tiu estas la leĝo por vi kaj por ni, kiuj jam foriris de la malvastaj limoj de la karna korpo. Ni klopodu konstante.

La parolo de la gvidanto estas agrabla kaj amika, sed la laboro de prilumiĝo apartenas al ĉiu. Ĉe la solvado de niaj problemoj ni neniam atendu helpon de la aliaj, ĉar, kun la penso turnita al la fonto de saĝo kaj mizerikordo, kiu estas Dio, neniam mankos al ni la dia inspiro de Lia senlima boneco.

227. – Ĉu Dio donas ja la favoron, kiun ni nomas graco?

– Estas tiel granda la dia favorkoreco, ĉirkaŭanta nian spiriton, en ĉiu ajn vivosfero, ke sufiĉas unu rigardo al la fizika aŭ nevidebla naturo, por ke ni sentu ĉirkaŭ ni ian inundon de gracoj.

Sed la difavoro, kian la homo deziras ricevi en sia antropomorfismo, ne okazas sur la vivovojo, ĉar Dio ne povas simili al ia homa monarĥo, plena de personaj preferoj aŭ subaĉetita pro malnoblaj kialoj.

Tie ĉi aŭ aliloke, la homo ĉiam ricevos de la laboro de edifado de si mem. Estas ja la homo mem, kiu inventas sian inferon aŭ kreas la belaĵojn de sia ĉielo. Kaj kia ajn estas lia konduto, ekcelanta la evoluproceson per propra klopodo, Dio povos favori lin, laŭ la leĝo, ĉar la Leĝo estas unu sola kaj Dio estas lia Superega, Eterna Juĝisto.

228. – Ĉu la memprilumado povas esti atingita nur per la laboro farita dum unu ekzistado sur la Tero?

– Unu enkarniĝo estas same kiel unu labortago. Kaj por ke la spertoj estu sekvataj de pozitivaj, profitaj rezultoj en la vivo, estas nepre necese, ke la tagoj da observo kaj diligento sekvu unu la alian.

En la komplekso de la pluraj vivoj, la studo preparas, sed nur la sincera apliko de la instruoj de la Kristo povas doni pacon kaj saĝon proprajn al la stato de plena prilumiĝo de la savitoj.

229. – *Kiel ni komprenu la laboron de purigado en la sferoj de la mondo?*

– Sur la Tero, la purigado ankoraŭ similas al la blankega lilio naskiĝanta el la ŝlimo, el amaraĵoj kaj pasioj.

Ĉiuj enkarniĝintaj Spiritoj tamen konsideru, ke ili troviĝas sur la Tero kvazaŭ en potenca krisolo por purigado kaj regenero, kaj al ili estas nepre necese kulturi la floron de la interna prilumiĝo en la angoro de la homa vivo, en la rondo de la familio aŭ de la socio, per la plej granda severeco al si mem kaj plej granda tolero al aliaj, ke ĉiu faru el sia ekzistado ian edukan apostoladon, en kiu la plej favorata estas lia propra spirito.

230. – *Kiel ni komencu la laboron de prilumado de nia propra animo?*

– Tiu individua laboro komenciĝu per la memregado, per la disciplinado de la egoismaj, malsuperaj sentoj, per la silenta laboro de la homo, por ekstermado de la propraj pasioj.

Pri tio ni ne povas malbezoni la scion akiritan de aliaj animoj nin antaŭintaj ĉe la surteraj luktoj per siaj sanktigaj spertoj – pura akvo de konsolo kaj espero, kiun ni povas trinki el la paĝoj de iliaj memoraĵoj aŭ el la atestoj pri ofero, kiujn ili postlasis en la mondo.

Sed la scio estas la amika pordo, nin kondukantan al la plej puraj rezonadoj, ĉar en la definitiva reformo de nia spirito, estas ja nepre necesa la bato de nia propra agado, ke ni modlunian internan sanktejon, ĉe la sankta prilumado de la vivo.

231. – *Konsiderante, ke multenombraj spiritistaj grupoj estiĝas nur por la instruado de la konsternitaj Spiritoj el la nevidebla sfero, kiuj ja plej bezonas lumon: ĉu la enkarniĝintoj, aŭ la elkarniĝintoj?*

– Tia bezono estas komuna al unuj kaj aliaj. Estas juste, ke oni donu fratecan helpon al la konsternitaj suferantaj estuloj el la sferoj plej proksimaj al la Tero. Sed estas necese akcepti, ke la enkarniĝintaj spiritoj bezonas pli multe da evangelia prilumado ol la nevideblaj, des pli, ĉar, sen ĝi, kian helpon ili povos oferi al sia malklera, malfeliĉa frato? Ĉu la leciono de la Sinjoro ne parolas ja pri la absurdo de blindulo, kondukanta aliajn blindulojn?

Tial ĉia kunsido por sincera studo, en la Doktrino, estas grandvalora klopodo por starigi spiritan projekton al tiuj, kiuj deziras trafi la bonan vojon.

La misio de la lumo estas revelacii kun serena vereco. Prilumita koro ne bezonas multajn parolrimedojn, ĉar en la laborejo de la frateco sufiĉas ĝia sento klarigita de la Evangelio. La granda mirindaĵo de la amo estas ĝia profunda, dia kontaĝo. Tial, por regeneri siajn fratojn el la ombro, la enkarniĝinta Spirito bezonas unue prilumi sin mem.

REALIGO

232. – *Rilate al la scio, kie ni povas loki la plej grandan bezonon de la homo?*

– Same kiel en la plej foraj tempoj de la mortintaj civilizacioj, ni devas reaserti, ke la plej granda bezono de la homo ankoraŭ estas tiu, de la konado de si mem.

233. – *Kial la surtera homo estas tiel malrapida je solvado de la problemo de sia memkonado?*

– Tio estas eksplikebla. Nur nun la homa animo povas sufiĉe enpeniĝi por kompreni la bezonojn kaj la anguletojn de sia spirita personeco.

Iam la homa ekzistado limiĝis al lukto kontraŭ la eksteraj fortoj, por krei unu harmonian leĝon inter li kaj la surtera naturo. Multaj jarcentoj fluis, ĝis li duonvidis la konvenon de solidareco por alfronti la komunajn danĝerojn. La organizado de tribo, familio, tradicioj, kolektivaj provoj postulis multajn

jarcentojn da lukto kaj doloraj malfeliĉaĵoj. La scienco de interrilatoj, la utiligo de materiaj fortoj, lin ĉirkaŭantaj, postulis ne malpli da tempo.

Nun tamen, ĉe la kulmino de sia fizika evoluo, la homo ne bezonas tiel profunde priokupiĝi pri la eksteraĵo, lin ĉirkaŭanta, pro tio, ke ĉiuj spiritaj energioj nuntempe sin mobilizas ĉirkaŭ la homoj, ilin kunvokante al la sanktaj konado de si mem, meze en la senlimaj valoroj de la vivo.

234. – *Kion ni diru pri tiuj, luktantaj pro leĝoj, celantaj la socian bonstaton, per meĥanikaj procesoj de aplikado, ne atentante la spiritan prilumadon de la individuo?*

– La ŝtatuloj aŭ kondukantoj de homamasoj, kiuj penas agi tiucele, baldaŭ falos en la seniluziigon pri siaj politikaj kaj sociaj utopioj.

La monda harmonio ne venas el dekretoj nek el parlamentoj, karakterizantaj sian agadon per ia tro pasema forto. Ĉu vi ne vidas, ke la meĥanismo de la homaj leĝoj ĉiutage ŝanĝiĝas? Ĉu la sistemoj de regado ne malaperas por doni lokon al aliaj, kiuj, siavice, nepre renoviĝos tra la tempo? Nuntempe, sur la Tero, vi rimarkas la elreviĝon de multaj tiaspecaj utopiistoj, kiuj revis pri senkondiĉa egaleco de la homoj, ne komprenante, ke, ricevante la samajn rajtojn de laboro kaj akirado antaŭ Dio, la homoj, per siaj propraj faroj, estas profunde malsamaj inter si, je intelekto, virto, komprenemo kaj moralo.

La homo kiu luminiĝas konkeras al si mem la ordon kaj la harmonion. Kaj por ke la kolektivo efektivigu tian konkeron por la socia organismo, estas ja nepre necese, ke ĉiuj ĝiaj elementoj komprenu la sanktajn devojn de memprilumado.

235. – *Ĉu estas aliaj scifontoj por la prilumado de la homoj, krom tiu, konsistanta el la diaj instruoj de la Evangelio?*

– La mondo estas plena de edukaj elementoj, ĉefe koncerne la teoriojn nobligantajn la vivon kaj la homon, per la laboro kaj edifado de liaj kapabloj kaj karaktero.

Sed, temante pri spirita prilumado, ekzistas nenio alia ol la ekzemploj de Jesuo en ties Evangelio de Vero kaj Vivo.

La filozofoj mem, kiuj predikis antaŭ ol Li sur la Tero, estis nenio alia ol senditoj de liaj boneco kaj saĝo, venintaj en la karnon, por prepari lian luman restadon en la mondo de ombroj, kaj tial la modelo de Jesuo estas definitiva kaj unika por la estigo de lumo kaj vero en ĉiu homo.

236. – Kiel ni komprenu la deziregon fari spiritistojn per fenomenismo, antaŭ tiu bezono de prilumado?

– La sinceraj spiritistoj komprenu, ke la fenomenoj vekas la animon, same kiel la bato de eksteraj fortoj, kiuj vekas dormanton; sed nur la klopodo realigas la moralan edifon, aŭtentikan kaj definitivan.

Estas ia ekstravaganco kun malagrablaj sekvoj la fakto, ke iu sin ĵetu al la propagando de unu ideo, ne firmiginte sin mem per la suko de ĝiaj nobligaj principoj. Spiritismo ne estas lernejo de frivoleco. Identiginte kun ĝia konsola, dia esenco, la homo ne povas senkuraĝiĝi antaŭ la intensaj provoj kaj spertoj. La altrangaj spiritistoj farus grandan eraron, se ili promesus al siaj surteraj amikoj ian facilan, senzorgan vivon, solvante ĉiujn iliajn problemojn kaj donante al ili la ŝlosilon de ĉiuj studoj.

Elvoki la nevideblan sferon pro malnoblaj personaj kapricoj estas ja egoismo kaj malsaĝo.

Ĉiu studemulo elvolvu sian kapablon de laboro kaj prilumiĝo, kaj li ne lasu alian fari tion, kion li devas fari profite por si mem.

Spiritismo sen Evangelio povas atingi plej noblan rezulton, sed ĝi estos nenio alia ol aktiveco destinita ŝanĝiĝi aŭ malaperi, same kiel ĉiuj nedaŭraj surteraj aferoj. Kaj la spiritisto, kiu ne zorgis pri sia prilumiĝo kun Jesuo Kristo, povas esti scienculo kaj filozofo kun la plej altaj intelektaj akiraĵoj, sed li ĉiam estos sen direktilo kaj vojira plano ĉe la momento de la neevitebla tempesto de la provo kaj sperto, ĉar sole nur la dia fidosento povas deturni la homon de la malsuperaj surteraj zorgoj al la superegaj vojoj al la spirita firmamento.

237. – *Ĉu ekzistas diferenco inter instrui doktrinon kaj evangelizi?*

– Estas granda diferenco inter ambaŭ taskoj. Por instrui doktrinon, sufiĉas la intelekta scio de la spiritismaj principoj; por evangelizi estas necesa la amolumo en la interno. En la unua, sufiĉos la legado kaj la scio; por la dua estas necese vibri kaj senti kun la Kristo. Tial, la instruanto de doktrino multfoje estas nenio alia ol kanalo de la scioj, sed la sincera evangelizanto estos ĉiam la ujo de la vero, estante kapabla servi la aliulajn bezonojn, ne senigante sin mem je la propra spirita riĉaĵo.

238. – *Por akceli la prilumiĝon, ĉu la Homaro bezonas iajn religiajn ennovaĵojn?*

– Ĉia ennovaĵo estas nepre necesa, des pli, ĉar la leciono de la Sinjoro ankoraŭ ne estis komprenata. La kristaniĝo de la homaj animoj ankoraŭ ne transiris la unuan stadion.

Kelkajn jarcentojn antaŭ Jesuo, la spirita sfero, per la buŝo de la profetoj kaj filozofoj, admonis la surteran homon al sia memkonado. La Evangelio estas la interna lumo de tiu edifado. Nu, nur nun la surtera homo prepariĝas por la memkonado per la doloro. Sekve, la evangelizado de la kolektiva animo por la nova erao de konkordo kaj frateco povos efektiviĝi, entute, nur en la tria jarmilo.

Estas fakte, ke la Tero jam posedas siajn apartajn esprimantojn de aŭtentika evangeliismo, vere maloftajn, sed konsolantajn kaj lumajn. Tiuj esprimantoj tamen estas devigitaj al la plej altvaloraj ekzemploj de rezigno antaŭ la malklereco kaj maljusteco de la mondo. Tiuj nekonataj apostoloj estas tiu “salo de la tero” ⁽¹⁾ kaj ilia dia klopodo estos respektata de la estontaj generacioj, same kiel la vivantaj simboloj de la spirita prilumado kun Jesuo Kristo, tre amataj en lia Regno, kie ili scipovis persisti ĝis la fino.

⁽¹⁾ Mateo, 5:13. – **La Trad.**

V

EVOLUADO**DOLORO**

239. – *Rilate la fizika kaj morala doloroj, kiu el ili plej profunde vibrigas la homan spiriton?*

– Ni povas konsideri la spiritan suferon kiel realodoloron, kaj la ĉiaspecan fizikan turmenton kiel iluziodoloron.

Vere, ĉia fizika doloro celas la vekigon de la animo al ĝiaj noblaj devoj, ĉu kiel kulpelpago pro la homaj eksceso, ĉu kiel admono de la naturo al la mastro de unu organismo.

Sed ĉia fizika doloro estas fenomeno, dum la morala doloro estas esenco. De tio la kaŭzo, kial la unua venas kaj forpasas, eĉ kiam ĝi fariĝas sekvata de la morto de la materiaj organoj, kaj nur la spirita doloro estas sufiĉe intensa kaj profunda por efektiviĝi la brilan laboron de perfektigo kaj elaĉeto.

240. – *Ĉu oni povas iel koncepti la feliĉon sur la Tero?*

– Se ĉiu spirito havas en si mem la nocion pri feliĉo, tio signifas, ke ĝi ekzistas kaj ke ĝi ie atendas la animojn.

Sed sur la Tero ĝis nun ne povas ekzisti la feliĉo tia, kia la homo ĝin revas, ĉar la homoj ĝenerale estas venenitaj kaj ne scias kontempli la grandecon de la eksteraj pejzaĝoj, ilin ĉirkaŭantaj en la mondo. Estas necese tamen observi, ke la homo konstruas ja sur la terglobo la bazojn de sia reala feliĉo, per la laboro kaj ofero, en la direkto al la plej sublimaj akiraĵoj por la dia mondo de sia konscienco.

241. – *Kie troviĝas la plej granda helpo por nia spirita elaĉeto?*

– Ĉe la laboro por nia individua aŭ kolektiva elaĉeto, la doloro ĉiam estas la amika, nepre necesa elemento. Kaj la elaĉeto de Spirito enkarniĝinta sur la Tero estas ja la elpago de ĉiuj liaj ŝuldoj, kun la sekva akiro de moralaj valoroj

konkoreblaj ĉe la surteraj luktoj, situacio, altiganta la spiritan personecon al novaj, plej sublimaj horizontoj de la vivo en la Senlimo.

242. – *Kial la Evangelio ne parolas al ni pri la ĝojoj de la homa vivo?*

– La Evangelio ne povus prezenti la spektaklon de la monda maskita rido, sed estas ja vero, ke ĉiaj lecionoj de la Dia Majstro efektiviĝis en la medioj de la plej perfekta spirita ĝojo.

Lia unua revelacio okazis ĉe la geedziĝo en Kana, ĉe la sankta ĝojo de la familio. Liaj instruoj, sur la bordoj de Tiberias, elvolviĝis ĉe simplaj, ĝojaj homoj firmigitaj de la fido kaj utila laboro.

En Jerusalemo tamen, ĉe la hipokriteco de la Templo aŭ antaŭ siaj duraj ekzekutistoj, la Dia Majstro ne povus rideti, nutrante la mensogon aŭ uzante la metodojn de sendankemo kaj perforto.

Jen kial, en sia natura etoso, la tuta evangelia historio estas ĉiam poemo el lumo, amo, ravo kaj ĝojo.

243. – *Rilate la problemon de doloro, ĉu ĉiuj spiritoj pasintaj sur la Tero havis samajn evoluajn karakterizaĵojn?*

– Ĉiuj spiritaj estaĵoj enkarniĝintaj sur la tergloblo estas Spiritoj, kiuj sin elaĉetas aŭ lernas el la homaj spertoj, post la pasintempaj faloj, escepte de Jesuo Kristo, fundamento de la tuta vero en tiu ĉi mondo, kies evoluo efektiviĝis laŭ rekta linio al Dio, kaj en kies puregaj manoj sidas la spirita regado de la Tero, ekde ties komenco.

244. – *Ĉu ekzistas pentolokoj en la spirita sfero? Kaj ĉu povas esti eterna sufero por la Spiritoj enradikiĝintaj en eraro kaj ribelo?*

– Konsiderante la penton laŭ ĝia elaĉeta formo, ekzistas multenombraj lokoj de provoj en la por vi nevidebla sfero, lokoj

destinitaj por regenero kaj preparo de Spiritoj malicaj aŭ obstinaj en la krimo, por ke tiuj ĉi konu la unuajn manifestiĝojn de konscienciproĉo kaj pento, komencaj stadioj de la elaĉeto.

Rilate la ideon de eterna sufero, se ekzistus Spiritoj poreterne enradikiĝintaj en la krimo, por ili estus ja kontinua sufero, tia kiel ilia eraro mem. La Paŝtisto tamen ne volas, ke unu sola el liaj ŝafinoj perdiĝu. Venos tago, kiam la plej nigra konscienco spertos en sia interno la helegan lumon de la aŭroro de Lia amo.

245. – *Se estas prave, ke, dum la surtera provado, ni estu pretaj por difinitaj suferoj, ĉu ni devas ĉiam preĝi?*

– La leĝo de la provoj estas unu el la plej gravaj universaj sistemoj por la distribuado de la diaj helpoj.

Vi bezonas kompreni tion, akceptante ĉiujn dolorojn kun nobla sento.

La preĝo ne povos forigi la malplezurojn kaj profitajn lecionojn de ĉagreno, troviĝantaj sur la plano de servoj, kiujn ĉiu Spirito devas plenumi dum sia surtera misio, sed ĝi devas esti kulturata en la interno, kiel la lumo, estiĝanta por heligi la malluman vojon, aŭ esti tenata en la koro, kvazaŭ nepre necesa nutraĵo preparata por kontentigi la proprajn bezonojn dum la longa, malfacila vojaĝo, ĉar la sincera preĝo estigas la viklecon kaj estas mem la plej granda faktoro de morala forto en la kerno de la plej malfacilaj kaj plej severaj provoj.

PROVO

246. – *Kiu estas la diferenco inter provo kaj elaĉeto?*

– Provo estas lukto instruanta al la ribela, maldiligenta disĉiplo la vojon al la laboro kaj spirita edifo. Elaĉeto estas puno trudita al la kriminta maliculo.

247. – *Ĉu estas neflekseblecaj la leĝoj de provo kaj elaĉeto?*

– Ĉu la tribunaloj de la homa justeco, kvankam neperfektaj, iafoje ne malpligravigas la punojn kaj ne favoras la krimulojn per “sursis”?⁽¹⁾

La nefleksebleco kaj rigoro ne ekzistas por la dia mizerikordo, kiu, konforme al la konduto de la enkarniĝinta Spirito, povas per la leĝo favori la homon, kiam lia ekzistado iel jam esprimas la amon, kovrantan la amason da pekoj.

248. – *Kiel okazas la falo de la Spirito?*

– Konkerinte konsciencan kaj la raciajn valorojn, ĉiuj Spiritoj havas respondecon, en la limoj de siaj agokapabloj; sed estas malmultaj tiuj, kiuj plenumas siajn vere moralajn devojn, pliigante siajn diajn rajtojn en la universa havaĵo.

Metita de Dio sur la vivovojo, tiel same kiel lernanto finanta la bazajn studojn, la animo ne ĉiam scias agi reciproke al la favoroj ricevitaj el la Kreinto, falante pro fiero kaj vantemo, pro ambicio aŭ egoismo, rompante la dian harmonion je la unua fojo, kaj penetrante en penigajn spertojn, por restarigi la ekvilibron de sia ekzistado.

249. – *Ĉu la falo de la Spirito okazas nur sur la Tero?*

– La Tero estas sfero de vivo kaj evoluo, simila al iu alia, kaj en la plej diversaj sferoj la animo povas fali sur sia evolua vojo, ĉar ni devas kompreni, ke la sidejo de ĉiuj bonaj aŭ malbonaj, superaj aŭ malnoblaj sentoj kuŝas en la interno de la nepereema Spirito, kaj ne en la karno, kiu putriĝos kun la tempo.

250. – *Kiel okazas la kolektiva provo?*

– Ĉe la kolektiva provo okazas kunvoko de la enkarniĝintaj Spiritoj, havantaj la saman ŝuldon rilate al la delikta, malnobla pasinteco.

Tiam, en la leĝo de la kompensoj, la meĥanismo de la justeco funkcias spontanee, per la komisiitoj de la Kristo,

⁽¹⁾ Punĉesigo.

kiuj kunvokas por la komuna elpago la pasintatempajn kunŝuldantojn, kaj tial vi plurfoje nomos “dolora hazardo” la cirkonstancojn, kunigantajn la plej malsamajn personojn en saman akcidenton, kiu kaŭzas al ili la morton de la fizika korpo aŭ la plej diversajn mutilojn, en la kadro de iliaj individuaj kompromisoj.

251. – *Ĉu nekredemo estas provo?*

– Ateismo aŭ absoluta nekredemo ne ekzistas, krom en vortludoj el la malesperaj cerboj, en la mondaj teorioj, ĉar interne, ĉiuj Spiritoj identiĝas kun la ideo pri Dio kaj de la postvivo de la homo, ideo denaska al ili. Tiu supera ideo ŝvebos super ĉiuj negativismoj kaj fine triumfos super ĉiuj perfortaj dekretoj kreitaj de la homaj ŝtatoj, ĉar ĝi estas la vivolumo kaj la plej kara espero de la animoj.

252. – *Ĉu oni ricevas nur la ofendon, kiun oni meritis ĉe la plenumo de la provoj? Kaj, konsiderante la intensecon de tiu aŭ alia provo, ĉu iu Spirito povos reenkarniĝi antaŭdestinita por memmortigo kaj la krimo?*

– Ni ricevos la doloron laŭ niaj propraj bezonoj, cele al la elaĉeto de niaj iamaj eraroj kaj al nia estonta spirita situacio.

Rilate al ofendo, kiam ni ĝin ricevas de iu troviĝanta sur nia nivelo de komprenado kaj evolua sfero, estas vere, ke temas pri tre amara provo nepre necesa por nia propra regenerproceso.

En la mondo ekzistas tamen la ŝtonĵetoj de malklereco kaj malsincereco, naskitaj de la malsuperaj sentoj. Kaj estas bone, ke la kristano estu preta kaj trankvila, por ne ricevi ilin kun malsaneca sentemo, sed kun la intenco diligente labori, konsciante, ke tiuj ŝtonĵetoj estas parto de lia plano de kelkatempa vivo, kien li venis por edukiĝi, samtempe kunhelpante en la edukado de liaj similuloj.

Koncerne la memmortigon, estas oportune rediri, ke la verko de Dio estas tiu de la amo kaj bono, de ĉiuj vivoplanoj, kaj ni devas konfesi, ke, se multaj Spiritoj reenkarniĝas kun la provo de la tentoj al la memmortigo kaj krimo, tio okazas ja tial, ke ili konduku kiel lernantoj, kiuj, preterlasinte ekza-

menon en sia kurso, revenas al la studado de tiu lernobjekto en la venonta jaro, ĝis li havigos al si scion kaj pli altan gradon en ĝi. Multaj animoj refaras saman penadon kaj plurfoje malvenkas ĉe la luktoj, ne komprenante la bezonon de vigleco. Kaj al ni estas neniel eble imputi al Dio la malsukceson de iliaj esperoj, ĉar la Dia Providenco donas al ĉiuj estuloj la samajn okazojn de laboro kaj prepariĝo.

VIRTO

253. – *Ĉu la virto estas donajo de Dio aŭ akiraĵo de la homo?*

– La doloro, la lukto kaj la sperto estas ia sankta okazo donita de Dio al siaj kreitaĵoj, en ĉiuj tempoj. Sed la virto ĉiam estas sublimes, senmorta akiraĵo de la spirito sur la vivovojo, akiraĵo poreterne kuniĝinta al liaj valoroj, konkeritaj per lia propra diligenta laboro.

254. – *Kio estas la pacienco, kaj kiel ni akiru ĝin?*

– La vera pacienco estas ĉiam ia eksteriĝo de la animo, realiginta multe da amo en si mem, por ĝin doni al aliulo, per ekzemplo.

Tiu amo estas la esprimo de frateco, konsideranta ĉiujn homojn kiel siajn fratojn en ĉia cirkonstanco, ne flankmetante la energion por ĵeti lumon sur la nekomprenon, kiam tio fariĝos nepre necesa.

Per la spirita prilumo de nia interno ni akiras tiujn sanktajn valorojn de nobla toleremo. Kaj, por ke ni edifu nin ĉe tiu dia heleco, estas ja necese eduki la volon, forigante centjarajn psikajn malsanojn, nin akompanantajn tra la sinsekvaj vivoj, malsanojn konsistantajn en tio, ke ni forlasas nian diligenton mem, ke ni estas indiferentaj, kaj ke ni plendas pri la eksteraj fortoj, kvankam la malbono loĝas en ni mem.

Por efektiviĝi tiel subliman edifon, estas necese ke ni komencu per la disciplinado de ni mem kaj per la deteno de niaj impulsoj, konsiderante la liberecon de la interna mondo, de kie la homo devas superregi sian vivofluon.

Populara proverbo konsideras, ke “la kutimo estas dua naturo”, kaj ni lernu, ke la disciplino antaŭas la spontaneecon, per kiu la animo povas plej facile atingi sian deziratan elaĉeton.

255. – *Ĉu ni, la spiritistoj, devas praktiki nur la spiritan karitaton, aŭ ankaŭ la materian?*

– La fundamenta devizo de la kardeka kodigo, nome “ekster karitato, nenia savo”, estas sufiĉe signifa, por ke ni ne perdiĝu en detalaj konsideroj.

Ĉiu tasko de la neprofitema karitato estas dia helpo en la verko de la homa frateco kaj universa elaĉeto.

Sed urĝas al la sinceraj spiritistoj, instruitaj pri la Evangelio, peni tuj kompreni la edukajn aspekton de la doktrinaj principoj, rekonante, ke la tuja laboro de la modernaj tempoj estas tiu de la interna prilumado de la homo, por plibonigi liajn korajn kaj konsciencajn valorojn.

Laŭ tiuj imperativoj, estas juste laŭdegi la bonegecon de la edukaj planoj de la evangelia instruado, por formi spirita-kristanan penson por la estonteco.

Ni ne povas malestimi la materian karitaton, kiu faras la evangelian Spiritismon ia konsola ripozejo por ĉiuj malfeliĉuloj. Sed ni ne povas forgesi, ke ankaŭ la sektaj religiaj anoj organizas la materiajn konstruaĵojn por la karitato en la mondo, kaj ni ne forgesu la templojn, azilojn, orfejojn kaj monumentojn. Preskaŭ ĉiuj iliaj konstruaĵoj tamen senkreditiĝis pro manko de prilumo de la enkarniĝintaj Spiritoj.

La Roma eklezio estas tipa ekzemplo.

Sinjoro de konsiderinda riĉaĵo kaj fondinte sennombrajn, realajn organizaĵojn de socia helpo, hodiaŭ ĝi sentas, ke ĝiaj konstruaĵoj estas nur el ŝtono, ĉar, en siaj pompaj konstruaĵoj, la nuntempa homo spertas la plej dolorajn elreviĝojn.

La materia karitato nur atingas sian dian trajton kiam ĝi celas la spiritigon de la homo, renovigante liajn intimajn valorojn, ĉar, post la reformo de la homo en Jesuo Kristo, ni havos sur la Tero transformitan socion, kie la aŭtentike kristana hejmo estos memkompreneble la azilo de ĉiuj suferantoj.

Oni konkludas do, ke la laboro de sincera kristanigo de la sciencoj estas ja definitiva edifo, al kiu la spiritistoj devas

turni la rigardon, antaŭ ĉio komprenante la vastecon kaj kompleksecon de la eduka tasko, kiun ili devas plenumi ĉe ĉia homa realigo, ĉe la ĉiutaga lukto, ĉe la tasko de amo kaj vero.

256. – *Kiel ni komprenu la materian almozon?*

– En la meĥanismo de la ordinaraĵ interrilatoj, la peto je materia helpo havas siajn signifon kaj oportunan utilon, kiel sekvon de la ekvilibroleĝo, reganta la interŝanĝomovojn en la vivorganismo.

La materia almozo estas tamen montrado de manko de spiriteco en la sociaj karakterizaĵoj, ĝin progresigantaj.

Certe, neniu povos malaprobi la agon peti kaj eĉ ne povos ne laŭdi la iniciaton de tiu, kiu donas la materian almozon; sed estas oportune konsideri, ke, laŭmezure kiel la homo kristaniĝas, prilumante siajn internajn energiojn, li pli kaj pli foriĝas de la kondiĉo de petanto por atingi la altan kondiĉon de indeco, per la noblaj signoj de sia laboro.

Kiu klopodas en la kuliso de la rektlinia konscienco, tiu nobliĝas kaj riĉiĝas la kadron de siaj individuaj valoroj.

Kaj, post kiam li konkeris la elementojn de la evangelia eduko, la sincera kristano ne bezonas materiigi la ideon de la materia almozpeto, komprenante ke esperante aŭ suferante, agante aŭ luktante, ĉe la klopodo por agado kaj bono, li ĉiam ricevos laŭ siaj faroj kaj konforme al la promeso de la Kristo.

257. – *Ĉu la Espero kaj la fido devas esti rigardataj kiel unu sola virto?*

– La Espero estas la preferata filino de la Fido. Ili ambaŭ estas unu al la alia tiel same kiel la reflektita lumo de la planedoj estas por la centra, pozitiva lumo de la Suno.

La Espero estas simila al la lunlumo, konsistanta el la balzamo de la kredo. La Fido estas la dia heleco de la certeco.

258. – *Sur la vojo de la virto, ĉu la surteraj malriĉulo kaj riĉulo povas identiĝi kiel disĉiploj de Jesuo?*

– La titolo disĉiplo estas donata de la Dia Majstro al ĉiuj bonvolaj homoj, sen distingo pri situacioj, klasoj aŭ iu ajn sekta karaktero.

Kun respondeco pri la materiaj riĉaĵoj aŭ sen ĝi, la homo estas ĉiam riĉa, pro sia kondiĉo de ĝuanto de la diaj gracoj kaj, krom tio, ni konsideru, ke ĉe ĉia situacio la homo trovas respondecon en la ekzistado; tial, la sinceraj disĉiploj de la Sinjoro estas egalaj antaŭ liaj okuloj, sen iu ajn prefero.

259. – *Koncerne la praktikadon de karitato, kiel ni komprenu la jenan lecionon de Jesuo: “Al tiu, kiu havas, estos donita abunde, kaj for de tiu, kiu ne havas, eĉ tio, kion li havas, estos prenita”?* ⁽¹⁾

– Ĉe ĉiuj cirkonstancoj, la parolo de Jesuo estis plena de ia kaŝita lumo prezentanta prismajn rebrilojn, en ĉiuj tempoj, por la homa animo, dum ties supreniro al la saĝeco kaj al la amo.

Antaŭ ĉio, ni penu alĝustigi la lecionon al ni mem.

Se ni havas la veran spiritan karitaton, se ni laboras por nia interna prilumado, memvole disradiante lumon sur la vojon de niaj fratoj en lukto kaj lernado, ni ricevos plimulton el la puraj fontoj de la pli altaj spiritaj sferoj, ĉar, profitinte la oportunan okazon al ni donitan, senfinaj horizontoj etendiĝos al niaj animoj sur la senlima kampo de la universo. Tio ne povos okazi al tiuj, kiuj ricevis la sanktan okazon de memilumino, sur la vivojoj, kun la plej evidenta malzorgo pri siaj aŭtentikaj devoj, forgesante la pli bonan vojon, tiam anstataŭitan de la efemeraj plezuroj de la surtera ekzistado, prenante sur sin novajn ŝuldojn kaj forigante de si mem la okazojn por la estonteco, tiam pli malfacilajn kaj dolorajn.

⁽¹⁾ Kp. Mateo, 25:29. – **La Trad.**

TRIA PARTO

RELIGIO

260. – *Antaŭ la Scienco kaj la Filozofio, kiel ni komprenu la Religion en la aktivecoj de la vivo?*

– Religio estas la Dia sento, kies eksteraj signoj estas ĉiam la Amo, ĉe la plej sublimaj aspektoj. Dum la Scienco kaj la Filozofio agas sur la kampo de eksperimento kaj rezonado, la Religio edifas kaj lumigas la sentojn.

La unuaj kunfratiĝas en la Saĝo, la dua personigas la Amon, la du diaj flugiloj per kiuj iam la homa animo traflugos la sanktajn portikojn de la spiriteco.

I

MALNOVA TESTAMENTO

REVELACIO

261. – *“En la komenco estis la Vorto ...”* ⁽¹⁾ – *Kiel ni komprenu tiun aserton de la sankta teksto?*

– La apostolo Johano ankoraŭ admonas nin, ke “la Vorto estis Dio kaj la Vorto estis kun Dio”. ⁽²⁾

⁽¹⁾ Johano, 1:1. – **La Trad.**

⁽²⁾ Johano, 1:1. – **La Trad.**

Dio estas amo kaj vivo; kaj la plej perfekta esprimo de la Vorto, por la tergloba, estis kaj estas Jesuo, identigita kun liaj favorkoreco kaj saĝo, ekde la komenca organizado de nia planedo.

Videbla aŭ kaŝita, la Vorto estas la signo de la dia lumo en ĉiuj aĵoj kaj en ĉiuj estuloj, en la plej diversaj kondiĉoj de la proceso de perfektigo.

262. – *Kial laŭŝajne la vorto de la profetaĵoj estas konstante direktita al la popolo de Izraelo?*

– En ĉiuj tekstoj de la profetaĵoj Izraelo devas esti konsiderata kiel la simbolo de la tuta surtera homaro, sub la sankta egido de la Kristo.

263. – *Ĉu oni atribuu al la judismo mision specialan, kompare kun la ceteraj religiaj ideoj de la antikvaj tempoj?*

– Malgraŭ la altaj religiaj konceptoj, florintaj en Hindujo kaj Egiptujo, kaj malgraŭ ĉiuj grandaj idealoj de scio pri la diideo, ĉiam ekzistintaj en la antikva Azio, oni devas rekonii, ke apartenis al la judismo la granda misio de la revelacio de la unika Dio.

Dum la religiaj kultoj perdiĝis ĉe dividiĝo kaj multobliĝo, nur la judismo estis sufiĉe forta laŭ energio kaj unueco por kulturi la monoteismon kaj starigi la bazojn de la universala leĝo, sub la lumo de la dia inspiro.

Tial, malgraŭ la penigaj kompromisoj kaj ŝuldoj, kiuj laŭŝajne eternigas ĝiajn suferojn tra la generacioj kaj la homaj patrujoj dum la dolora fluado de la jarcentoj, la popolo de Izraelo devas meriti la respekton kaj amon de ĉiuj surteraj societoj, ĉar nur ĝi estis sufiĉe granda kaj unuigita por gardi la veran ideon pri Dio, tra la turmentoj de la sklaveco kaj de la dezerto.

264. – *Kiel devas esti konsiderata, en Spiritismo, la tiel nomata “Sanktega Triunuo” de la katolika teologio?*

– La primitivaj tekstoj de la kristana organizaĵo ne parolas pri la koncepto de la Roma Eklezio, rilate al la tiel nomata “Sanktega Triunuo”.

Ni ankoraŭ klarigu, ke la katolika vidpunkto venas de teologiaj subtilaĵoj sen serioza bazo en la instruoj de Jesuo.

Dum longaj jaroj, antaŭ ol la Bona Novaĵo, la bramanismo gardis la koncepton de Dio dividita en tri esencajn principojn, kiujn ĝiaj pastroj nomis Bramo, Viŝnuo kaj Ŝivao. ⁽¹⁾

Sed la Teologio, kiu sin organizis sur la antikvaj principoj de la roma politeismo, bezonis prezenti komplekson de religiaj formuloj, por konfuzi la pli simplajn spiritojn, des pli ĉar ni scias, ke, se en la komenco la Eklezio estis gardanto de la kristanaj tradicioj, ne tre malfrue la pastraro forigis la plej belajn karakterojn de la profetismo, enterigante la Evangelion en amason da religiaj konvencioj, kaj senigante la primitivajn revelaciojn je ilia aspekto de simpleco kaj amo.

Por atingi tion, la fortoj venintaj pridisputi la regadon de la ŝtato, pro la invado de la popoloj konsiderataj kiel barbaroj, rapidis, jam ĉe la regado, aliformigi la instruojn de Jesuo en instrumenton de la administra politiko, falsante la evangeliajn principojn en ties primitivaj tekstoj kaj asimilante malnovajn doktrinojn, kiaj tiuj de la legenda Hindujo, kaj organizante teologiajn novaĵojn, per kiuj Katolikismo reduktiĝis al respektinda, sed pure homa forto, malproksima de la Regno de Jesuo, kiu, laŭ la simpla kaj profunda aserto de la Majstro, ankoraŭ ne havas diajn fundamentojn sur la Tero.

265. – *Kiel ni interpretu la antikvan sentencon: “Dio faris la mondon el nenio”?*

– Por la Spiritoj de mia sfero, la unua momento de la materio estas tiel nekonata, kiel la unua momento de la spirita energio en la rondoj de la universa vivo.

⁽¹⁾ Pastro Alta, en “La Kristanismo de la Kristo kaj tiu de ĝiaj pastroj”, diras al ni, ke la katekisma formulo – 3 personoj en Dio – estis vera en la latina lingvo, kie la vorto “persona” signifas formon, aspekton, ŝajnon. Ĝi tamen estas falsa en la franca aŭ en la portugala, en kiuj ĝi havas la sencon de individuo. – **Noto de la Eldonistoj.**

Ni tamen komprenas, ke, se Dio estas ja la Vorto de la Kreado, la “nenio” neniam ekzistis por nia koncepto de observado, ĉar la Vorto estas por ni la lumo de la tuta Eterneco.

266. – *Ĉu en la antikvaj asertoj de la Malnova Testamento la tagoj de la Kreado respondas al plenaj periodoj de la geologia evoluo?*

– La tagoj de la aktiveco de la Kreinto, ekzakte kiel rakontas al ni la sankta testo, respondas al la longaj periodoj de la geologia evoluo, en la daŭro de la jarmiloj nepre necesaj por la planeda genezo. Ni ankaŭ atentigu, ke, kune kun tiuj, la Biblio enhavas aliajn grandajn simbolojn proprajn al la nememoreblaj tempoj, el la originoj de la planedo.

267. – *Kiu estas la pozicio de la Malnova Testamento, en la kadro de valoroj de la religia eduko de la homo?*

– En la kadro de valoroj de la religia eduko, en la kristana civilizacio, malgraŭ siaj alte simbolaj aspektoj, malofte kompreneblaj por la ordinara intelekto, la Malnova Testamento devas esti konsiderata kiel fundamento aŭ ĉefa fonto de la dia revelacio.

LEĜO

268. – *Ĉu la dek ordonoj ricevitaj de Moseo sur la monto Sinajo, ĝis hodiaŭ bazo de ĉia justeco en la mondo, estis aliigitaj de la religiaj sektoj?*

– En ĉiuj tempoj, la religiaj sektoj penas modifi, per la influo de siaj pastroj, la sanktajn tekstojn. Sed malgraŭ la nedaŭraj ŝanĝoj, la dek ordonoj senditaj al la Tero pere de Moseo ĉiam reaperas en sia primitiva pureco, kiel bazo de la tuta juro en la mondo, subteno de ĉiuj kodoj de la surtera justeco.

269. – *Kiel ni komprenu la parolon de la Malnova Testamento, kiam ĝi diras, ke Dio parolis al Moseo sur la monto Sinajo?*

– Nuntempe vi kapablas kompreni, ke Moseo havis la plej altan mediuman kapablon, malgraŭ sia kondiĉo de homa leĝodonanto.

Estas neimageble, ke la granda misiulo de la judoj kaj de la Homaro povis aŭdi la Spiriton de Dio. Vi tamen estas kapablaj kompreni nun, ke la Leĝo aŭ la bazo de la Leĝo, en la dek ordonoj, al li estis diktita de la senditoj de Jesuo, ĉar ĉiuj movadoj de materia kaj spirita evoluo sur la terglobo efektiviĝis, kiel ili ĝis hodiaŭ efektiviĝas, sub lia altega kaj favorkora protekto.

270. – *Malgraŭ siaj tiel homaj esprimoj, ĉu Moseo venis en la mondon kiel dia misiulo?*

– Ekzamenante liajn energiajn homajn farojn, oni devas konsideri la karakterizaĵojn de la epoko, kiam plenumiĝis la eminenta tasko de la hebrea misiulo, aŭtentika sendito de la supera sfero, por transdoni al la Tero la grandan kaj subliman mesaĝon de la unua revelacio.

Per aliaj esprimoj la granda sendito ne povus ĝuste plenumi siajn altvalorajn taskojn, pro la malklereco kaj materialismo de la Homaro.

270. – *Ĉu Moseo transdonis al la mondo la definitivan leĝon?*

– La profeto de Izraelo donis al la Tero la bazojn de la dia, neŝanĝebla Leĝo, sed ne la tutan Leĝon, kompletan kaj definitivan.

Cetere, ni estas devigitaj konfesi, ke la homoj ĉiam ricevis la diajn revelaciojn konforme al sia evolua pozicio.

Ĝis nun la Homaro de la kristana erao ricevis la grandan Revelacion en tri esencaj aspektoj: Moseo alportis la mision de la Justeco; la Evangelio, la nesupereblan revelacion de la Amo, kaj Spiritismo, siavice, en sia aspekto de reviviĝinta Kristanismo, alportas la subliman taskon de Vero. En la centro de la tri revelacioj troviĝas Jesuo Kristo, kiel fundamento de la tuta lumo kaj de la tuta saĝo. Kun la Amo, la Leĝo manifestiĝis ja sur la Tero en sia plej intensa brilego; la Justeco kaj la Vero estas nenio alia ol la diaj instrumentoj de ĝia eksteriĝo,

kun tiu Ŝafido de Dio, animo de la elaĉeto de la tuta Homaro. La Justeco do ebenigis al li la vojon, kaj la Vero, sekve, klarigas liajn diajn instruojn. Jen kial, kun Spiritismo, simbolanta la Trian Revelacion de la Leĝo, la surtera homo prepariĝas, atendente la sublimajn realigojn de sia spirita estonteco, en la venontaj jarmiloj.

272. – *Kia estas la signifo de la egala repuno “okulon pro okulo, denton pro dento”⁽¹⁾ antaŭ la bezono de la elaĉeto de ĉiuj spiritoj per la sinsekvaj reenkarniĝoj?*

– La leĝo de egala repuno superregas por ĉiuj spiritoj, kiuj ankoraŭ ne estigis la amosanktejon en la koroj, kaj kiuj reprezentas preskaŭ la tutan homaron.

Ankoraŭ katenitaj al la pasintaj jarmiloj, ili ne ekpensis akcepti kaj apliki la Evangelion al si mem, restante plu enkarcerigitaj en malvirtaj rondoj en penigaj reenkarniĝoj, elpagaj kaj purigaj.

Multajn jarcentojn antaŭ la Sinjoro, Moseo proklamis la antikvan Leĝon. Kiel jam dirite, la hebrea profeto prezentis la Revelacion kun la dia mieno de justeco; sed, kun Jesuo, la homo de la mondo ricevis la perfektan kodon de Amo. Se Moseo instruis la “okulon pro okulo, denton pro dento”, Jesuo klarigadis, ke la “amo kovras amason da pekoj”.⁽²⁾

De tio la fakto, ke la homoj saviĝos per la amo kaj per ĝi altiĝos al Dio, nuligante per bonfaro ĉiujn fortojn, kiuj povus enfermi ilian koron en la mondaj suferoj.

273. – *Kiu vere estas la dua ordono: – “Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre, kip.”⁽³⁾, laŭ kelkaj tekstoj, aŭ “Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo”⁽⁴⁾, konforme al la instruo de la romkatolika eklezio?*

– La unua formulo estis provo reversi la primitivajn tekstojn, provo, kiun la Roma Eklezio efektivigis, por ke ĝia

⁽¹⁾ Eliro, 21:24. – **La Trad.**

⁽²⁾ I Petro, 4:8. – **La Trad.**

⁽³⁾ Eliro, 20:4. – **La Trad.**

⁽⁴⁾ Eliro, 20:7. – **La Trad.**

pastraro trovi liberan kampon por kreskigi la heredaĵojn de la paganismo, koncerne la pompajn elmontrojn de la ekstera kulto.

274. – *Kia estis la intenco de Moseo, kiam, en la Readmono, li rekomendas, “ke neniu demandu la mortintojn por ekscii la veron”?*⁽¹⁾

– Antaŭ ĉio, estas necese konsideri, ke la temo estas celpunkto de longa maljusta diskutado de la kontraŭuloj de la nova revelacio, kiun Spiritismo alportis al la homoj, en sia rolo de Konsolanto.

La sektoj tamen konsideru, ke la epoko de Moseo ne ebligis la esplorojn de la Nevideblo, tial ke la komuniĝo kun la elkarniĝintoj fariĝus kun homa materialo tro kruda kaj malbonkvalita.

PROFETOJ

275. – *Ĉu la kvin plej gravaj libroj de la Biblio enhavas specialajn simbolojn por la religia eduko de la homo?*

– Ĉiuj religiaj dokumentoj de la Biblio identiĝas inter si en la tutaĵo, ekde la unua revelacio kun Moseo, vekante en la homo la verajn nocojn pri lia devo al liaj proksimuloj kaj al Dio.

276. – *Ĉu la antaŭvido kaj la antaŭdiro, en la sanktaj libroj, komprenigas, ke la profetoj estis rekte inspiritaj de la Kristo?*

– En la sanktaj tekstoj de la diaj fontoj de Kristanismo la antaŭvido kaj la antaŭdiroj efektiviĝis sub la rekta agado de la Sinjoro, ĉar nur Li povus sufiĉe koni la korojn, la malfortajojn kaj la bezonojn de siaj ribelemaj protektatoj, por precize sondi la vojojn de la estonteco, sub la favorkoreco kaj saĝo de Dio.

⁽¹⁾ Kp. Readmono, 18:11. – **La Trad.**

277. – *Ĉu la altrangaj Spiritoj, same kiel la antikvaj profetoj, devas esti konsiderataj kiel anĝeloj aŭ kiel elektitaj Spiritoj?*

– Kiaj la misiuloj de la Sinjoro en la sfero de aktiveco ĝustedire materia, ankaŭ la antikvaj profetoj apartenis al la nombro de tiuj “vokitaj” al la luma semado.

Por montri komprenkapablo, la vorto “anĝelo”, en tiu uzado, devas montri nur la Spiritojn, kiuj, jam plene elaĉetitaj, supreniris al la supera sfero, kie ili estas “elektitoj” ĉe la sankta tasko de Tiu, kies vortoj ne forpasos. La Elektito tamen estas tiu, kiu supreniris al Dio laŭ la rekta linio, sen niaj ordinaraj faloj, kaj estas juste aserti, ke la terglobo vidis nur unu elektiton, kiu estas ja Jesuo Kristo.

Sed temante pri anĝeleco, la homa komprenkapablo ĝeneraligis la difinon, ĝin etendante al ĉiuj virtaj, bonaj animoj, post la kulisoj de la literaturo, kio praviĝas, se oni prenas la vorton “anĝelo” kiel “kuriero”.

278. – *Ĉu ni devas konsideri kiel profetojn nur tiujn, kiujn aludas la paĝoj de la Malnova Testamento?*

– Krom la instruoj postlasitaj de iu Elija, aŭ de iu Jeremia, ni devas konsenti, ke multaj misiuloj el la supera sfero antaŭis la venon de la Kristo, distribuante en la mondo la spiritan panon de liaj eternaj veraĵoj.

Ankaŭ iu Ŝakjamunio, iu Konfuceo, iu Sokrato, estis profetoj de la Sinjoro ĉe la glora preparado de liaj vojoj. Se ili agadis malproksime de la izraelaj medioj kaj kutimoj, ili tamen direktis la mision laŭ la sama universalisma plano, al kiu la triboj de Izraelo estis vokitaj labori pli preferinde por la religia progreso de la mondo.

279. – *Ĉu la hebreaj profetoj ludis la rolon de pastroj de la kredantoj de la Leĝo?*

– En ĉiuj tempoj ekzistis la plej profunda diferenco inter la pastreco kaj la profeteco.

La antikvaj profetoj de Izraelo neniam karakteriziĝis per iu ajn signo de sklaveco al la sociaj konvencioj kaj al la

ekonomiaj interesoj, tiel plaĉa al la organizita pastraro, ĉiam kaj ĉie.

Ekstreme diligentaj, ili ne enspezis al si el la altaro de sia religio, sed el la edifa laboro, ĉu en la vesto de la subpremataj sklavoj, ĉu en la izoliteco en la dezerto, kiun iliaj religiaj aspiroj sciis pleniĝi per ia sankta konstrua dinamismo.

280. – *Ĉu la profetoj de la Kristo jam revenis en la materialan sferon por porti al la homoj novan lumon por la estonteco de la Homaro?*

– La homaj kolektivoj ĉiam ricevis la subliman kunhelpon de la senditoj de la Sinjoro, por la solvo de la grandaj problemoj de la estonteco.

Ne ĉiam la profeta parolo povos esti prezentata de la samaj Spiritoj el la pasinteco; sed la profetoj de Jesuo, nome la potencaj spirita organizadoj el la superaj sferoj senĉese estas ĉe vi, vin pelante al la evoluado en ĉiuj direktoj, multobligante viajn sukceskapablojn ĉe la malfacilaj, doloraj spertoj. Estas vero, ke la novaj senditoj ne bezonas diri tion, kio jam estas skribita pri religiaj revelacioj; sed ili agas en la sektoroj de la Scienco kaj de la Filozofio, de la Beletro kaj de la Arto, altigante vian malviglan penson al la mirindaj spirita konstruoj de la estonteco. Estas certe ankaŭ, ke la novaj misiuloj ne trovis la dezerton de sovaĝaj figarboj, kie iliaj antaŭuloj sin nutris nur per akridoj kaj sovaĝa mielo, sed kiuj ankoraŭ estas devigitaj vivi en la dezerto de la tumultaj urboj, ĉe indiferentaj, nekompreneblaj koroj, ĉirkaŭataj de la sendankemo kaj moko de siaj samtempuloj, ofte trudantaj al ili la pelorion kaj la oferon.

La amo de Jesuo estas tamen la dia suko, nutranta al ili la fibron de laboro kaj realigo, kaj, sub Liaj abundaj benoj, la grandaj solecaj animoj trairas la mondon, disdonante la lumon de la Sinjoro laŭlonge de la ombraj vojoj.

281. – *Ĉu la legado de la Malnova Testamento kaj de la Evangelio en la familiaj rondoj, laŭ kutimo de multe da eŭropaj popoloj, favoras la renovigon de la bonefikaj pacfludaĵoj en la koro kaj en la hejma medio?*

– Tiu legado ĉiam estas utila, kaj se ĝi ne naskas la tujan pacon, pro la heterogenaj spiritaĵoj de tiuj, kune ĝin aŭdantaj, ĝi estas ĉiam profita evangelia semado, ankaŭ atinganta la Spiritojn en la nevidebla sfero, kiuj ĝin ĉeestas, kaj estas juste atendi ĝian floradon kaj fruktodonadon pli malfrue.

II

EVANGELIO

JESUO

282. – *Se ni devas konsideri la Malnovan Testamenton, kiel la fundamenton de la Dia Revelacio, kia estas la pozicio de la Evangelio de Jesuo en la religia eduko de la homoj?*

– La Malnova Testamento estas la bazo de la Dia Revelacio. La Evangelio estas la konstruaĵo de la elaçeto de la animoj. Tial la leciono de Jesuo devas esti serĉata ne plu por iu ajn teoria elmonro, sed pro tio, ke ĉiu disĉiplo celu la plibonigon de si mem, elvolvante la edifaĵojn de la Dia Majstro sur la definitiva tereno de la Spirito.

283. – *Rilate al Jesuo, kiel ni interpretu la vortojn de Johano: – “Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, plena de graco kaj vero”?* ⁽¹⁾

– Antaŭ ĉio, ni devas kompreni, ke Jesuo ne estis iu filozofo, nek povos esti klasigita inter la valoroj ĝustasence homaj, konsiderante la diajn valorojn de lia spirita hierarkio, ĉe la direktado de surteraj kolektivoj.

Sendita de Dio, Li estis la reprezento de la Patro ĉe la amaso da filoj deturniĝintaj de lia amo kaj de lia saĝo, filoj, kies protekto estis konfidita al Li ĉe la sanktaj ordonoj de la vivo en la Senlimo.

⁽¹⁾ Johano, 1:14. – **La Trad.**

Anĝela direktanto de la terĝlobo, lia koro ne malestimis lian rektan restadon ĉe la mizeraj, malkleraj protektatoj, kio okazigis la ĉi-supre menciitajn vortojn de la apostolo.

284. – *Ĉu la apostolo Johano ricevis malsaman mision, ĉe la organizado de la Evangelio, se oni konsideras la diversecon de liaj rakontoj, kompare kun tiuj de liaj kunuloj?*

– Ankaŭ en tiu okazo ni konsideru la specialecon de la taskon, koncerne la laborojn donitajn al ĉiu. La pecoj de la evangeliaj rakontoj memkompreneble identiĝas inter si, kiel nepre necesaj partoj de tutaĵo, sed ni estas devigitaj rimarki, ke, se Mateo, Marko kaj Luko ricevis la taskon prezenti en la sanktaj testoj la Paŝtiston de Izraelo en ties sublima aspekto, al Johano apartenis la tasko malkaŝi la Dian Kriston ĉe ties sankta universala misio.

285. – *“Jesuo Kristo estas sen patro, sen patrino, sen genealogio”⁽¹⁾. – Kiel ni interpretu tiun aserton, laŭ la parolo de Mateo?*

– Estas necese, ke ni komprenu la universalisman mision de la Evangelio de Jesuo, laŭ la rakonto de Johano, por asimili tiun aserton, koncerne la genealogion de la Dia Majstro, kies sanktaj radikoj kuŝas en la senfinaj amo kaj saĝo de Dio.

286. – *Ĉu la ofero de Jesuo devas esti taksata sole nur per la dolora sceno de la Kalvario?*

– La Kalvario prezentis la kroniĝon de la agado de la Sinjoro, sed la ofero per ekzemplo okazis en ĉiuj tagoj, kiujn Li pasigis sur la Tero. Kaj, antaŭ ĉio, la kristano devas serĉi sian modelon en la ekzemploj de la Majstro, ĉar la Kristo ame kaj humile instruis la sekreton de la spirita feliĉo, kaj estas nepre necese, ke ĉiuj disĉiploj estigu interne de si tiujn virtojn, per kiuj ili scios supreniri altege super la Kalvario de siaj doloroj, en la ĝusta momento.

⁽¹⁾ Laŭ Mateo, 1:18-25, oni efektive konkludas, ke Jesuo ne havis genealogion, nek patron, nek patrino. – **La Trad.**

287. – *Sennombraj disĉiploj de la Evangelio opinias, ke la ofero sur la Golgota ne estus kompleta sen la maksimuma materia doloro por la Dia Majstro. Kiel ni ekspliku tiun supozon antaŭ la intensecon de la morala sufero, kiun la kruco kaŭzis al Li?*

– La materia doloro estas fenomeno simila al tiu de artfajraĵoj, rilate al la aŭtentikaj spiritaĵoj valoroj.

Surteraj homoj, kiuj mortis pro unu ideo, plurfoje eĉ ne spertis la fizikan doloron, kaj sentis nur la ĉagrenon pro tio, ke lia idealo ne estis komprenita.

Prezentu do al vi la Kriston, kiu sin oferis pro la tuta Homaro, kaj vi sukcesos vidi Lin en lia senmezura spirita doloro, altega kaj nedifinebla por nia malvasta, simpla taksapablo.

Ni neniel povus fari ian psikologian studon de Jesuo, starigante komparajn elementojn inter la Sinjoro kaj la homo.

Ĉe lia dia ekzempla konduto estas necese konsideri, antaŭ ĉio, lian amon, lian humilecon, lian rezignon pro la tuta Homaro.

Ekzameninte tiujn faktorojn, ĉu la materia doloro havus specialan signifon, por ke la kristana laboro estus konsekrita? Ĉu la spirita doloro, tro granda por esti komprenata, ne estis la esenca punkto de lia perfekta rezignacio pro la homoj?

Pri tiu detalo tamen la homoj diskutos plu, same kiel la infanoj, kiuj akceptas la realaĵojn de la vivo de plenaĝulo nur tiam, kiam oni liveras al ili la scion, prenante por modeloj lian tuj disponeblan ludilaron.

288. – *“Mi kaj la Patro estas Unu” ⁽¹⁾. Ĉu ni povos ricevi plian sciigon pri tiu aserto de la Kristo?*

– Tiu aserto vidigis lian perfektan identecon kun Dio, ĉe la direktado de ĉiuj procesoj, rilate la evoluan marŝon de la Tero.

⁽¹⁾ Johano, 10:30. – **La Trad.**

289. – *Sur la Tero aŭ en la pli proksimaj sferoj, ĉu estas multenombraj la evoluantaj Spiritoj, kiuj jam vidis la Kriston, spertante la gloron de Lia dia ĉeesto?*

– La tuta kolektivo de la Spiritoj enkarniĝintaj sur la Tero, aŭ troviĝantaj en siaj sferoj de spirita laboro, pli ligitaj al nia planedo, sentas ja la sanktan influon de la Kristo, per helpo de liaj komisiitoj. Sed tre malmultaj atingis la purecon nepre necesan por vidi la Majstron en Lia dia sfero.

290. – *Ĉu oni povos rekonii en la paraboloj de Jesuo la fenomenan karakteron de la vortoj, gardantaj la eternan vibron de lia sento, ĉe la instruoj?*

– Jes. La paraboloj de la Evangelio similas la diajn semojn, poste aliĝontajn en arbojn de favorkoreco kaj saĝo por la Homaro.

291. – *Kiel ni komprenu la Antikriston?*

– Ni povas simboligi per Antikristo la tuton de fortoj agantaj kontraŭ la Evangelio, sur la Tero kaj en la sferoj proksimaj al la homo, sed ni ne devas figuri en tiu Antikristo ian absolutan, definitivan povon, kiu nuligus la agadon de Jesuo, ĉar, per tia supozo, ni malkonfesus la senlimajn antaŭzorgon kaj bonecon de Dio.

RELIGIOJ

292. – *En kiu senco ni devos preni la koncepton pri religio?*

– Por ĉiuj homoj, religio devus esti komprenata kiel dia sento, kiu prilumas la vojon de la animoj, kaj kiun ĉiu spirito lernos konforme al sia evolua nivelo.

En tiu senco, la Religio ĉiam estas la altega, suverena vizaĝo de la Vero, sed, ĉe la maltrankvileco, karakterizanta ilian surteran ekzistadon, la homoj dividiĝis en plurajn religiojn,

kvazaŭ ankaŭ la fido povus havi limojn, simile al la materiaj patrujoj, multfoje dronintaj en la egoismo kaj ambicio de siaj idoj.

El tiu falsa interpreto estiĝas en la mondo la kontraŭfrataj luktoj kaj la religiaj skismoj en ĉiuj tempoj.

293. – *Ĉu ankaŭ la religioj, aperintaj en la mondo antaŭ ol la Kristo havis kiel ĉefan mision la preparadon de la homa menso por lia alveno?*

– Ĉiuj religiaj ideoj, kiujn la homoj portis kun si el la jarmila pasinteco, estis destinitaj prepari la homon por ricevi kaj akcepti la ŝafidon de Dio, kun ties mesaĝo pri eterna amo kaj definitiva spirita pliboniĝo.

Kristanismo estas la simpla, luma sintezo de ĉiuj plej antikvaj religiajn sistemoj, fragmenta monro de la sublimaj veraĵoj prezentitaj al la mondo per la senmorta parolo de Jesuo.

Sed la homoj, malgraŭ ĉiaj preparoj, restis plu dividitaj, kaj, ĉe siaj karakterizaĵoj de ribelemo, prokrastis sian edifon, kiun ili atingos per la renovigaj lecionoj de la Evangelio.

294. – *Konfesante, ke diversaj sektoj naskiĝis ankaŭ el Kristanismo, ĉu ni devas konsideri ilin kiel kristanajn, aŭ kiel simplajn izolajn religiajn manifestaĵojn de la vero de Jesuo?*

– Ĉiuj religiaj karakteroj, naskiĝintaj de Kristanismo, identiĝas inter si per la suko de amo de la trunko, ilin kuntenanta, malgraŭ la homaj eraroj de iliaj disvastigantoj.

La pastroj de la plej diversaj kastoj elpensis la teologiajn kompendiojn, la dogmajn principojn kaj la pokitikajn formulojn; sed nenia homa peno sukcesis paligi la dian helecon de la maksimumo “amu unu la alian”, ⁽¹⁾ senmorta bazo de ĉiuj instruoj de Jesuo, kies brilega esenco identigas la kastojn inter si, ĉe ĉiuj specialaj pozicioj kaj taskoj al ili destinitaj.

295. – *Se la religiaj sektoj, naskiĝintaj el Kristanismo, havas specialan taskon, kia estas tiu de la protestantaj eklezioj, devenintaj de la Reformacio?*

⁽¹⁾ Johano, 15:17. – **La Trad.**

– La Reformacio kaj la postaj movadoj venis en la mondon kun la speciala misio elterigi la “literon” de la Evangelio, ĝis tiam enfermitan en la arĥivoj de la pastra netoleremo, en la seminarioj kaj monaĥinejoj, por ke, post sia tasko, la promesita Konsolanto povu instrui al la homoj, per la voĉo de la kristana Spiritismo, la “dian spiriton” de ĉiuj lecionoj de Jesuo.

296. – *Antaŭ ol reenkarniĝi, ĉu la Spirito elektas ankaŭ la kredojn aŭ kultojn, al kiuj li devas submetiĝi dum la vivospertoj?*

– Reenkarniĝante sur la Tero, ĉiuj Spiritoj portas en si la ideon pri Dio, ĝenerale identiĝante per tiu sankta principo.

La surteraj kultoj estas tamen la eksterigo de tiu dia principo en la konvencia mondo. El tio oni konkludas, ke la Vero estas unu sola, kaj ke la surteraj sektoj estas materialo por sperto kaj evoluo. La prefero de ĉiu homo dependas ja de la evolua lernogrado en kiu li troviĝas en la homa ekzistado, kaj ni atentigu, ke la elekto estas ĉiam konforma al lia interna stato, ĉu ĉe la malbona inklino ripozi en la iluzioj de la eksteraj kultoj, ĉu ĉe la senĉesa serĉado de la dia edifo, per la sincera penado evolui.

297. – *Konsiderante, ke la socia konvencio donas al la pastroj de la kristanaj sektoj certajn prerogativojn, ĉe iuj viveventoj, kiel ni komprenu la vortojn de Mateo: – “Ĉio, kion vi ligos sur la tero, estos ligita en la Ĉielo”⁽¹⁾, – se multfoje la pastroj ne estas indaj paroli, en la mondo, en la nomo de Dio?*

– Estas nepre neceso rimarki, ke la vortoj de la Kristo estis direktitaj al la apostoloj, kaj ke la misio de iliaj kunuloj ne estis limigita al la medio de la triboj de Izraelo kaj havis sian dian daŭrigon post la surteraj aktivecoj mem. Ĝis hodiaŭ, la plej proksimaj disĉiploj de la Sinjoro havas sian sanktan taskon, en kunlaboro kun la Dia Majstro, ĉe la Homaro – la mistika Izraelo de liaj instruoj.

⁽¹⁾ Mateo, 18:18. – **La Trad.**

La meritoj de la apostoloj neniel povus aŭtomate transdoniĝi al la pastroj malbonigitaj de la politikaj kaj monaj interesoj de certaj surteraj grupoj. El tio oni konkludas, ke la Roma Eklezio, kiu plej multe trouzas tiujn konceptojn, ankoraŭfoje deviis la sanktan sencion de la leciono de la Kristo.

Estas necese tamen, ke, pri tiu afero, ni memoru la promeson de Jesuo, ke li ĉiam estos inter tiuj, kiuj sincere kolektiĝos en lia nomo.

En tiuj cirkonstancoj, la lojalaj disĉiploj devas teni sin en sfero supera al tiu de la surtera konvencio, agante ĉie en la mondo kun la propra konscienco kaj kun la plej bona nocio de respondeco, ĉar tiel, se nur ili agadas laŭ la bono, pro la bono kaj por la bono, en la nomo de la Sinjoro, iliaj evangeliaj faroj estos tuŝitaj per la sankta lumo de la diaj sankcioj.

298. – Konsiderante, ke la religioj alvokas la Evangelion de Mateo por pravigi la neceson de la bapto laŭ ties ceremoniaj karakterizaĵoj, kiel konduki la spiritisto rilate al tiu afero?

– Ĉe sia sankta misio de patreco, la sinceraj spiritistoj komprenu, ke la bapto menciita en la Evangelio estas tiu de la alvoko de la diaj benoj al ĉiuj, kiuj al ili kolektiĝas ĉe la sankta sistemo de la familio.

La spiritisto tute ne rigardu la bapton, kiel iun ajn ceremonion de religia naturo, kiu estus ia daŭrigo de la fetiĉismoj de la Roma Eklezio, profitinta la evangelian simbolon por la tiel nomata vendo de sakramentoj, sed li prenu ĝin kiel la alvokon de sia koro al la Kompatema Patro, por ke liaj klopodoj estu sanktigitaj ĉe la gvidado de la animoj al li konfiditaj ĉe la familia sistemo. Kaj li komprenu, krome, ke tiu ago de amo kaj dia kompromiso devas esti daŭrigata tra la tuta vivo per rezignacio kaj ofero, je profito de la perfekta kristanigo de siaj infanoj, ĉe apostolado de laboro kaj sindonemo.

299. – Kiel la spiritistoj konduki ĉe la konfirmado de la geedziĝo, por ne vundi la sociajn konvenciojn de la religiaj kultoj?

– Laŭ sia dogma karaktero, ankaŭ la religiaj kultoj estas nedaŭraj, simile al ĉiuj formuloj de la homa konvencio.

Prenante sur sin la geedzajn kompromisojn antaŭ la homaj leĝoj, la sincera kaj kristana spiritisto penu honori siajn promeson kaj decidon, sanktigante la geedzecon per la rigora plenumo de ĉiuj siaj evangeliaj devoj antaŭ la surteraj normoj kaj antaŭ la neŝanĝebla dia leĝo vibranta en lia kristanigita konscienco.

300. – *Kiel ni komprenu la meson de la ekstera kulto de la Katolika Eklezio?*

– Antaŭ la sincera, frateca koro de la kredantoj, la meso elpensita de la Roma Eklezio devas esti ia ekstera ago respektinda por ni, kiel iu ajn konvencia monda ceremonio, postulanta la reciprokan socian konsideron ĉe la meĥanismo de la supraĵaj rilatoj sur la Tero.

La Eklezio de Romo pretendas memori per ĝi la sinoferon de la Majstro pro la Homaro. Sed la ceremonio efektiviĝas konforme al la socia kaj mona pozicio de la kredanto.

Tiamaniere, ekzistas la plej diversaj mesoj, nome la “noktomeza”, la “nova”, la “privata”, la “pontifika”, la “por la animoj”, la “seka”, la “kun kanto”, la “simpla”, la “subĉiela”, ktp., ĉiuj obeantaj al indiklibro tiel konvencia, tiel supraĵa, ke estas mirige, ke pastro inteligenta kaj sincera adaptiĝu al ties konfuzaĵo.

301. – *Ĉu fantomoj kaj la tiel nomataj mirakloj ligitaj al la historio de la origino de la eklezioj estas mediumaj faktoj?*

– Ĉiuj tiuj okazintaĵoj, konsiderataj kiel supernaturaj, estis psikaj fenomenoj, sur kiuj konstruiĝis la konataj eklezioj, faktoj, kiujn Spiritismo registris kaj klarigis ĉe sia dia misio de Konsolanto.

INSTRUOJ

302. – *Kiel ni komprenu la aserton de Jesuo al la judoj: – “Vi estas dioj”?*⁽¹⁾

⁽¹⁾ Johano, 10:34. – **La Trad.**

– En ĉiu homo kuŝas la dia ero de la Kreinto, per kiu la surtera homo povas partopreni en la sanktaj povoj de la Kreado.

La enkarniĝinta Spirito ankoraŭ ne ĝuste taksis la amason da diaj eblecoj gardataj en siaj manoj, sanktaj dotoj plurfoje transformitaj en elementoj de ruino kaj detruado.

Sed tiuj malmultaj, kiuj scias kreski ĉe sia dieco, per la ekzemploj kaj instruoj, estas alnomataj sanktuloj kaj herooj, sur la Tero, ĉar ili konfesis sian spiritan kondiĉon, kaj estas juste, ke ĉiuj homoj penu atingi tiujn valorojn, disvolvante sian dian naturon en la direkto al la bono kaj al la lumo.

303. – *Kion signifas la jena evangelia instruo: – “Ĉiuj pekoj estos pardonitaj al vi; sed ne tiuj, kiujn vi faros kontraŭ la Sankta Spirito”?* ⁽¹⁾

– La akiro de la spirita scio kun la perfekta konscio de niaj devoj vekas en nia interno la fajron de la dia spirito, troviĝantan en la sino de ĉiuj homoj.

Ĉe tiu momento, malfermiĝas antaŭ nia profunda rigardo la sanktejo de la lumo de Dio interne de ni mem, firmigante kaj gvidante niajn plej aŭtentikajn nociojn pri respondeco en la vivo.

Dum la homo deturniĝas aŭ malfortiĝas, for de tiu prilumo, lia eraro iel praviĝas pro liaj malklereco aŭ blindeco. Sed la eraro farita kun plena konscio de devo, post la beno de la interna scio gardata en la koro kaj en la intelekto, signifas ja la ‘pekon kontraŭ la Sankta Spirito’, ĉar tiam la homa animo estos kontraŭ si mem, forpelante siajn diajn kapablojn.

Estas tamen logike, ke tiuj eraroj estas la plej gravaj el la vivo, ĉar ili konsistas el la malestimo de la homoj por la karaktero de Dio, kiu loĝas en ili.

304. – *Kiu estas la spirito de tiu ĉi frazo “Ne supozu, ke mi venis, por enkonduki pacon sur la teron; mi venis, por enkonduki ne pacon, sed glavon”?* ⁽²⁾

⁽¹⁾ Mateo, 12:31. – **La Trad.**

⁽²⁾ Mateo, 10:34. – **La Trad.**

– Konforme al la medio, kie ili formiĝis, ĉiuj evangeliuj simboloj preskaŭ ĉiam estas energiaj kaj konvinkigaj.

Jesuo ne venis por alporti en la mondon la vorton de tratolerado al la homa malforteco, sed la fajron de lumo, por ke la homo sin prilumu por la diaj projektoj.

Kaj ankoraŭ kaj ĉiam la sublima leciono de la Kristo povas esti konata kiel la renoviga “glavo”, per kiu la homo luku kun si mem, elradikante el sia koro la malnovajn malamikojn ĉiam komandatajn de la malklereco kaj vantemo, de la egoismo kaj fiero.

305. – *Kiel devas esti komprenata, laŭ spirito kaj vero, la jena aserto de la Majstro: – “Ĉar mi venis, por kontraŭmeti viron kontraŭ lian patron, kaj filinon kontraŭ ŝian patrinon, kaj bofilinon kontraŭ ŝian bopatrinon”?* ⁽¹⁾

– Ankaŭ rilate tion ni devas konsideri la antikvan karakteron de la hebrea lingvo, kun ĝia energia esprimmaniero.

Estus absurde akcepti, ke la Sinjoro venis, por estigi malordon en la sankta sistemo de la homa familio, ĉe ĝiaj noblaj amaj esprimoj, sed oni devas kompreni, ke liaj konsolaj instruoj estos la dia fermento de la opinioj, fermento estiganta la naturajn movadojn de la renovigaj ideoj, prilumantaj la interno de ĉiu homo, per la propra diligento, por la feliĉo de ĉiuj koroj.

306 – *“Kaj ĉion, kion vi petos per preĝado, kredante, vi ricevos”* ⁽²⁾. – *Ĉu tiu ĉi instruo de la Majstro ankaŭ aplikigas al tio, koncerne la materiajn havaĵojn?*

– La frazo “fariĝu volo via” ⁽³⁾ de la komuna preĝo estas nia ĝenerala peto al Dio, kies Providenco, per liaj kurieroj, havigos al nia spirito aŭ vivokondiĉo tion plej utilan, konvenan kaj necesan por nia spirita progreso, por la scio kaj por la amo.

Kion la homo ne devas forgesi, en ĉiuj aferoj kaj cirkonstancoj de la vivo, tio estas la preĝo de laboro kaj sindonemo,

⁽¹⁾ Mateo, 10:35. – **La Trad.**

⁽²⁾ Mateo, 21:22. – **La Trad.**

⁽³⁾ Mateo, 6:9- 15. – **La Trad.**

en la sanktejo de la purigaj luktoj, ĉar Jesuo benos liajn sincerajn, diligentajn farojn.

307. – *Kial Jesuo diris, ke “estas necese, ke venu faliloj, sed ve al tiu homo, per kiu la falilo venas”?* ⁽¹⁾

– En vivosfero, kie preskaŭ ĉiuj troviĝas pro la falilo, kiun ili kreis en la pasinteco, estas juste, ke tiu sama “falilo” estu necesa kiel elemento de elaĉeto, de provo aŭ lernado, ĉar ankoraŭ mankas al la homoj tiu “amo, kiu kovras amason da pekoj”. ⁽²⁾

La vortoj de la instruo de la Majstro tamen perfekte alĝustiĝas al la situacio de la enkarniĝintoj en la mondo, kaj estas bedaŭrindaj tiuj, kiuj ne viglas, ĉar tiel ili fariĝas instrumentoj de tento ĉe siaj konstantaj faloj sur la longaj vojoj.

308. – *Ĉu la vortoj de Johano: – “Kaj la lumo brilas en la mallumo, kaj la mallumo ĝin ne komprenis”* ⁽³⁾ *aplikiĝis nur en la tempo de la instruo de la Kristo, antaŭ du mil jaroj, aŭ tiu apliko etendiĝas al nia erao?*

– La vortoj de la apostolo rilatis al lia epoko. Sed la evangelia simboleco de lia eldiro etendiĝas al la nunaj tempoj, kiam la leciono de la Sinjoro restas nekomprenata por la plimulto de la koroj, kiuj obstine ne vidas la lumon, evitante la veron.

309. – *Kiel ni komprenu la sentencojn de Johano, la Baptisto: – “Kiu havas la fianĉinon, tiu estas la fianĉo; sed la amiko de la fianĉo, kiu staras kaj lin aŭdas, tre ĝojas pro la voĉo de la fianĉo; ĉi tiu mia ĝojo do plenumiĝis. Li devas altiĝi, sed mi devas malaltiĝi”?* ⁽⁴⁾

⁽¹⁾ Mateo, 18; 7. – **La Trad.**

⁽²⁾ I Petro, 4:8. – **La Trad.**

⁽³⁾ Kp. Johano, 1:15. – **La Trad.**

⁽⁴⁾ Johano, 3:29-30. – **La Trad.**

– La fianĉo de la surtera Homaro estas Jesuo Kristo, la sama Ŝafido de Dio, kiu elŝiras la homajn animojn de sur la mallumaj vojoj de la senpento.

La amiko de la fianĉo estas lia antaŭulo, kies homa karaktero devus malaperi, por ke Jesuo brilegu por la tuta mondo, per sia Evangelio de Vero kaj Vivo.

310. – *Ĉu ankaŭ la transfiguriĝo de la Sinjoro estas ia simbolo por la Homaro?*

– Ĉiuj evangeliuj esprimoj havas ian dian signifon, kaj, sur Tabor, ni vidas la grandan lecionon, ke la homo devas travivi sian ekzistadon en la mondo, sciante, ke, pro sia sankta origino, li apartenas al la ĉielo, kaj tial estas nepre necese, ke li ĉiumomente senmateriigu, por ke li progresu en amo kaj saĝo, ĉe la sankta eksterigo de la ĉiela virto, kies ĝermoj dormetas en lia koro.

311. – *Kion dignifas la aserto de la jena sankta teksto pri Jesuo: “Ĉar Dio ne volis oferon nek donacon, jen Li formis por li korpon”?* ⁽¹⁾

– Por Dio, la mondo ne plu devus persisti en la malnova kutimo oferi en lia nomo sur la materiaj altaroj; tial Li sendis al la homoj la parolon de la Kristo, por ke la Homaro lernu oferi sur la altaro de sia koro, ĉe la dia altiĝo de la sentoj al lia amo.

312. – *Kiel ni komprenu la jenan aserton de Johano: “Tri estas la atestantoj en la ĉielo: la Patro, la Vorto kaj la Sankta Spirito”?* ⁽²⁾

– Johano aludis la Kreinton, Jesuon, kiu estis sur la Tero Lia plej perfekta personiĝo, kaj la legion de la Spiritoj liberiĝintaj kaj sanktigataj, kunlaborantaj kun la Dia Majstro sub la kompatado de Dio, ekde la unuaj tagoj de la organizado de la Tero.

⁽¹⁾ Kp. Hebreoj, 10:5. – **La Trad.**

⁽²⁾ Kp. I Johano, 5:7. – **La Trad.**

313. – *Kiel ni komprenu la feliĉecon donitan de Jesuo al la “malriĉaj en spirito”?* ⁽¹⁾

– Tiu instruo de la Dia Majstro aludis la simplajn animojn, senigitajn je la “spirito de ambicio kaj egoismo”, kutime triumfantaj ĉe la mondaj luktoj.

Ĉu vi ne emis, ĝis hodiaŭ, nome “homoj de spiritoj” tiujn venkantajn ĉe la tute materiaj aferoj? Jen kial, parolante al la popolamaso, la Sinjoro aludis la sempretendajn kaj humilajn korojn, pretajn sekvi liajn instruojn, sen certaj malnoblaj priokupoj el la materia ekzistado.

314. – *Kia estas la plej granda leciono, kiun la Homaro ricevis de la Majstro, kiam Li lavis la piedojn de siaj disĉiploj?*

– Tion farante, la Dia Majstro volis atesti al la homoj la subliman lecionon de humileco, ankoraŭfoje montrante, ke, en la kristana kolektivo, la plej granda por Dio ĉiam estas tiu, kiu fariĝas la plej malgranda el ĉiuj.

315. – *Kial Jesuo sin zonis per viŝtuko, kiam li lavis la piedojn de siaj disĉiploj?*

– La Kristo, kiu ne flankemetis la fratecan energion ĉe la forigo de la eraroj de la homo, certigante sin kiel la Filon de Dio sur la diaj fundamentoj de la Vero, volis fari tion por montriĝi kiel sklavo pro amo al la Homaro, al kiu li portis la vivolumon per abnegacio kaj superega ofero.

316. – *Akceptante la helpon de Simono, kirenano, ĉu Jesuo volis postlasi novan lecionon al la homoj?*

– Tiu evangelia pasaĝo enhavas la instruon de la Kristo, koncernantan la bezonon de frateca kunhelpo inter la homoj, sur ĉiuj vojoj de la vivo.

⁽¹⁾ Mateo, 5:3. – **La Trad.**

317. – *Ĉu la reviviĝo de Lazaro, farita de la Majstro, havas ian kaŝitan sencon, kiel lecionon por la Homaro?*

– Tiu epizodo de Lazaro estis dia sigelo identiganta la restadon de la Sinjoro en la mondo, sed ĝi ankaŭ estis la sankta simbolo de la agado de la Kristo sur la homon, atestante, ke lia amo elŝiris la Homaron el ĝia tombo de mizeroj, Homaron, por kiu la Sinjoro oferas siajn larmojn, ĝin revivigante por la suno de la eterna vivo, per la sanktaj lecionoj de sia Evangelio de amo kaj elaĉeto.

318. – *Konsiderante la tradician kutimon de la Roma Eklezio, kiu memorigas la verpermanĝon de la disĉiploj per la vino kaj la hostio, ĉu ni povas ricevi ian lecionon pri la eŭkaristio?*

– La vera evangelia eŭkaristio ne estas tiu de la materiaj pano kaj vivo, kiel volas la Eklezio de Romo, sed la aŭtentika kaj plena identiĝo de la disĉiplo kun Jesuo, de kies ama kaj saĝa instruo li devas elĉerpi la profundan esencon por la prilumo de siaj sentoj kaj intelekto, sur ĉiuj vojoj de la vivo.

319. – *Kiu estus ricevinta pli grandan kvanton da favorkoreco de la dia justeco: ĉu Judaso, la malfidela, sed trompita kaj pentinta disĉiplo, aŭ la malica, indifereanta pastro, kiu lin kondukis en ribelon?*

– Kiu ricevis pli da favorkoreco, tiu estas la malbona pastro el ĉiuj tempoj, ĉar li estas pli bezona kaj kompatinda. Tute ne konfuzante eĉ por unu fojo la lecionon de la Kristo, li faradas la spiritan ribelon kontraŭ la Dia Majstro, jam de longaj jarcentoj.

320. – *Kiujn instruojn donas al ni la malkonfeso de Petro?*

– La malkonfeso de Petro signifas la malfortecon de la homaj animoj perdiĝintaj pro malvigleco kaj malzorgo pri la spirita realo, kaj indiferente lasantaj sin konduki en la plej

mallumajn kirlojn da sufero, tute ne pensante pri ia aŭtentika, sincera peno, ĉe la definitiva edifo de si mem.

321. – *Kiu eldono de la Evangelioj pli fidele prezentas la originalan fonton?*

– La originala skribaĵo de la Evangelioj jam prezentas per si mem la propran instruon de Jesuo, kiam ni konsideras, ke tiu tasko estis komisiita al liaj apostoloj.

Ĉar estas juste taksii, en ĉiuj cirkonstancoj, la sincerajn penojn, kia aĵo estas la medio, kie ili disvolviĝis, ni nur konsideras, ke en ĉiuj tradukoj de la instruoj de la Dia Majstro estas nepre necese apartigi la literon de la spirito.

Vi povos kontraŭdiri, ke la litero devus esti simpla kaj klara.

Ni konsentu, sed estas necese konsideri, ke la Evangelioj estas la gvidilo de la animoj, kaj ili devas esti legataj per la spiritaj okuloj, ĉar, starigante la katedron de Jesuo, la disĉiplo, proksimiĝanta al ili kun la sincera intenco lerni, trovos, sub ĉiuj simboloj de la litero, la konvinkan, dolĉan kaj energian kaj inspiran parolon de sia senmorta Majstro.

III

AMO

KUNIĜO

322. – *Ĉu ekzistas ia ama gradiĝo en la sino de la manifestiĝoj de la videbla kaj nevidebla naturoj?*

– Sendube, tiu gradiĝo ekzistis en ĉiuj tempoj, same kiel laŭgrada estas la pozicio de ĉiuj estaĵoj en la senfina skalo de la progreso.

La amo estas la leĝo mem de la vivo, kaj, sub ĝia sankta regado, ĉiuj homoj kaj ĉiuj aĵoj kuniĝas al la Kreinto, en la limoj de la grandioza plano de la universa unuo.

Ekde la plej simplaj manifestiĝoj de la malsuperaj regnoj de la Naturo, ni observas la eksterigon de la amo en ĝia dia

aspekto. En la kosma polvo, sintezo de la vivo, ni havas la profundajn magnetajn altirojn; en la simplaj korpoj ni vidas la tiel nomatajn “precipitaĵojn” de la kemio; en la minerala kaj vegetala regnoj ni observas la problemojn de la necesaj kombinoj. Ĉe la esprimoj de la animala vivo ni observas la amon en ĉio, en senfinaj gradiĝoj, ekde la perforto ĝis la karesemo, ĉe la manifestiĝoj de la neraciulo.

Sur la vojo de la homoj ankaŭ la amo regas ĉiujn aktivecojn de la ekzistado en la familio kaj socio.

Konstatinte la dian lumon de amo en ĉiuj medioj, ni konsideros la kuniĝon de la estaĵoj kiel sanktan celon de tiu unika leĝo, gvidanta la Universon.

De la seksaj karakteroj, la amo iras al la transseksismo, marŝante al la sublimaj emocioj de la pura spiriteco, per la sanktigaj rezigno kaj laboro, ĝis atingo de la dia amo, atributo de la anĝelaj estuloj, kiuj sin edifis por la kuniĝo kun Dio, ĉe la plenumado de liaj sanktaj projektoj en la Universo.

323. – *Ĉu estas vera la teorio pri la ĝemelaj animoj?*

– En la sankta mistero de la vivo, ĉiu koro havas en la senfino sian ĝemelan animon, dian kunulinon por la vojaĝo al la glora senmorteco.

Kreitaj unuj por la duaj, la ĝemelaj animoj serĉas sin reciproke, ĉiufoje kiam ili estas apartigitaj. La eterna kuniĝo estas ilia superega, nedifinebla aspiro. Se ili deturniĝis al la krimo kaj senkonscienco, miloj da animoj spertas la disiĝon de la animoj ilin subtenantaj, kiel plej krudan kaj doloran provon, kaj, en la dramo de la plej obskuraj ekzistadoj, ni ĉiam vidas la eternan altiriĝon de la animoj, kiuj eble profunde sin amas, elvolviĝante unu al la dua en kirlo da angoraj afliktoj, altiriĝon superan al ĉiaj konvencioj de la surtera vivo. Kiam ili renkontas unu la duan ĉe la amaso de la mondaj laboroj, ili sentas kvazaŭ ili posedus la realan feliĉon por siaj koroj – la feliĉon de sia kuniĝo, kiun ili ne ŝanĝus por ĉiuj imperioj de la mondo. La sola ĉagreno, ombranta al ili la ĝojon, estas ja la perspektivo de nova disiĝo per la morto, perspektivo, kiun la lumo de la Nova Revelacio venis forigi, malfermante la eternajn vivohorizontojn al ĉiuj spiritoj, amantaj la bonon kaj la veron.

324. – *Ĉu en la sanktaj tekstoj ekzistas iu elemento, pruvanta la teorion pri la ĝemelaj animoj?*

– Ni estas el la unuaj, kiuj konfesas, ke en ĉiuj tekstoj ni devas apartigi la spiriton disde la litero. Sed estas juste memori, ke en la unuaj paĝoj de la Malnova Testamento, bazo de la Dia Revelacio, estas skribita: “Kaj Dio vidis, ke la homo ne devas esti sola.”⁽¹⁾

325. – *Ĉu la altiriĝo de la ĝemelaj animoj estas karakteriza trajto de ĉiuj sferoj de luktoj sur la Tero?*

– La Universo estas la senfina sfero, kiun la dia penso plenigis per senlimaj, neesprimeblaj belaĵoj.

Por ni, la unua momento de la kreado de la estaĵo estas droninta en milda mistero, same kiel la profunda, neklarigebla altiro, tiranta unu animon al alia en la sistemo de laboroj, spertoj kaj provoj, sur la senfina vojo de la Tempo.

Por nia relativa scio, la ligiĝo de la ĝemelaj animoj baziĝas sur la diaj projektoj nesondeblaj en ilia sankta origino, kaj ĝi estas la vitala fonto de la homaj interesoj por la edifoj de la vivo.

Apartigitaj aŭ kunigitaj ĉe la spertoj de la mondo, la frataj animoj marŝas avidaj je la superegaj kuniĝo kaj harmonio, ĝis ili eniros en la spiritan sferon, kie ili kuniĝos por ĉiam en la plej sublima monro de dia amo, profunda celo de ĉiuj aspiroj de la estaĵo, en la labirinto de la destino.

326. – *Ĉu la kuniĝo de la ĝemelaj animoj povas esti limigo al la universa amo?*

– La amo de la ĝemelaj animoj ne povas fari tian limigon, ĉar, atingite la evolua kulmino, ĉiuj karakteroj de amemo samniveleliĝas ĉe la konkero de la dia amo. Resume, la amo de la ĝemelaj animoj estas tiu, kiun la Spirito iam sentos por la tuta Homaro.

⁽¹⁾ Kp. Genezo, 2:18. – **La Trad.**

Vidu noton en la fino de ĉi tiu volumo. – **La Eldonistoj.**

327. – *Se ĉiuj estuloj posedas sian ĝemelan animon, kiu estas la ĝemela animo de Jesuo Kristo?*

– Ni ne opinias juste kondiĉigi la figuron de la Kristo al la homaj rimedoj, ĉe nepravigebla komparo, ĉar en Jesuo ni devas observi la sanktan celon de la gloraj destinoj de la spirito.

En Li ĉesis la procesoj, kaj estas nepre necese rekoni en lia lumo la laborojn, kiujn ni devas plenumi.

Ĉar Li reprezentas por ni la sintezon de la dia amo, ni estas devigitaj konsideri, ke, post kiam Li efektiviĝis la superegan amon, de sur sia spirita kulmino, Li kaptis en sia nobla koro, kun la sama sindonemo, la tutan Homaron.

328. – *Antaŭ la teorio pri la ĝemelaj animoj, kiel ni klarigu la situacion de la vidvoj, kiuj serĉas novajn geedziĝojn, aludante la feliĉon trovitan en la unua hejmo?*

– Ni ne forgesu, ke la Tero ankoraŭ estas lernejo de regeneraj kaj elaĉetaj luktoj, kie la homo povas regeedziĝi plurajn fojojn, sen ke efektiviĝu lia edziĝo kun lia ĝemela animo, plurfoje troviĝanta malproksime de la materia sfero.

Dum li ne senmateriigoŝ por kompreni tiujn sublimajn ligilojn, la degenerinta homo estas submetita al tiaj spertoj, ofte pezaj kaj doloraj, laŭ la plano de siaj provoj.

La situacio de maltrankvileco kaj renversado de valoroj en la homa animo pravigas ja tiun surteran provon, karakterizitan de la malproksimeco de la amataj Spiritoj, troviĝantaj en sfero de supera komprenemo. Tiuj spiritoj, tute ne malestimante la bonajn spertojn de siaj amemaj kunuloj, penas ebligi al ili tiajn spertojn per maksimuma sindonemo, tiel ke fariĝu facila ilia marŝo rekte al la plej altaj spiritaj konkeroj.

329. – *Pro tio, ke ili postlasis amatan estulon sur la Tero, ĉu la progresintaj Spiritoj restas plu ligitaj al la planedo por la ligiloj de la sopiro?*

– La superaj Spiritoj ne restas ĝustedire ligitaj al la Tero, sed ili ne perdas ja la amikan intereson por siaj amatoj postlasitaj en la mondo, por kiuj ili fervore laboras, ilin pelante

sur la vojo de la savantaj luktoj, serĉe de la kulminoj de perfekteco.

En tiuj sanktigitaj, puraj animoj, la sopiro estas multe pli sublimes kaj forta, ĉar ĝi naskiĝas el supera sentemo, kaj ni reliefigu, ke, ŝanĝite en dian intereson, ĝi naskas la grandajn ĉielajn abnegaciojn, kiuj sekvas la hezitajn paŝojn de la enkar-niĝinta Spirito, dum ties elaçeta kaj liberiga vojaĝo sur la Tero.

330. – *Ĉu nur per la preĝo la enkar-niĝinta animo povos helpi amatan Spiriton, kiu lin antaŭiris al la tomba vojaĝo?*

– La preĝo efike helpas al tiu, kiu plurfoje foriris kun la spirito katenita en la reto de iluzioj el la materia ekzistado. Sed la amika koro, restinta tie en la mondo, per silenta vibrado kaj per la persista deziro esti utila al la kunulo, lin antaŭirinta en la tombo, por la vivomovoj, ĉe la ripozmomentoj de la korpo, kiam la progresinta animo povas ĝui relativan liberecon, povas renkonti la suferantan aŭ vagantan Spiriton de la elkarniĝinta amiko, veki lian volon por la plenumado de la devo, same kiel gvidi lin en lia nova vivo, sen ke lia korpa memoro registru la okazintaĵojn ĉe la ordinara maldormo.

El tio naskiĝas la aserto, ke nur la amo povas trairi la abismon de la morto.

331. – *Kiel ni interpretu la sentencon: – “Estas eŭnukoj, kiuj eŭnukigis sin pro la regno de la ĉielo”?* ⁽¹⁾

– Ekzistas animoj, kiuj, por havigi al si mem la sanktajn fruktojn de Dio, sin donas al sankta abnegacio dum la vivo.

Ĉe tiu afero, ili ordinare rezignas por kelka tempo la homajn ligiĝojn por elpurigi siajn korinklinojn kaj sentojn per ekzistado je asketismo kaj longaj materiaj disciplinoj.

Preskaŭ ĉiam, tiuj, kiuj sur la Tero fariĝas eŭnukoj pro la regnoj de la ĉielo, agas konforme al la sanktaj preceptoj de liberigaj misioj, ĉe kiuj per ofero kaj sindono sin elaçetas amataj estuloj aŭ ilia ĝemela animo, ekzilitaj sur la vojoj de pentofaro. Multaj Spiritoj ricevas de Jesuo permeson por tiu

⁽¹⁾ Mateo, 19:12. – **La Trad.**

speco de sanktigaj penoj, ĉar, ĉe tiu tasko, tiuj, kiuj fariĝas eĉnukoj pro la regnoj de la ĉielo, akcelas la procesojn de elaçeto de la estulo aŭ estuloj amataj, dronintaj en la provoj, kaj ili samtempe povas, pro sia progreso, esti pli facile transformitaj sur la Tero en instrumentojn de la vero kaj bono, kaj ilia laboro rezultigas netakseblajn bonfarojn por la amataj estuloj, por la kolektivo kaj por ili mem.

PARDONO

332. – *Ĉu pardoni kaj ne pardoni signifas absolvi kaj kondamni?*

– En la plej signifplenaj lecionoj de Jesuo ne ekzistas, ĝustedire, la kondamnoj al la eterna sufero, kiel volis la elpensintoj de ia mitologia infero.

La evangeliiaj instruoj aludas la pardonon aŭ ĝian foreston.

Kion oni faru al la malbona ŝuldanto, kiun oni jam plurfoje indulgis? Se ne ekzistas plu solvo por la ŝuldoj, kiuj multobliĝas, tiu homo estas devigita ilin pagi.

Tio okazas ja al la homaj animoj, kies ŝuldoj, ĉe la tribunalo de la dia justeco, estas solvitaj dum la reenkarniĝoj, el kies sinsekvo ili eliros, frue aŭ malfrue, per sia diligento ĉe la laboro kaj per bonvolo ĉe la pago.

333. – *Ĉu estas pardono sen pento, en la dia leĝo?*

– La dia leĝo estas unu sola, nome tiu de la amo, ampleksanta ĉiujn aĵojn kaj ĉiujn homojn de la senlima Universo.

La patra donajo de Dio, koncerne la reenkarniĝon kiel sanktan okazon por nova sperto jam signifas per si mem la pardonon aŭ la grandanimecon de la Leĝo. Sed tiu okazo estas donita nur kiam la Spirito deziras regeneriĝi kaj renovigi siajn internajn valorojn per la diligento ĉe la sanktigaj laboroj.

Jen kial ĉies bonvolo estas ĉiam la pento, kiun la Dia Providenco utiligas favore por la individua kaj kolektiva pliboniĝo, dum la marŝo de la estuloj al la kulminoj de la spirita evoluo.

334. – *Antaŭ ol pardoni iun, ĉu estas konvene klarigi la eraron?*

– Kiu sincere pardonas, tiu ĝin faras senkondiĉe kaj forgesas la kulpon en la plejprofundo de sia koro; sed la bona parolo estas ĉiam utila kaj la frateca modereco ĉiam estas elemento de lumo, heliganta la vojon de la animoj.

335. – *Kiam iu pardonas, ĉu li devos montri la superecon de siaj sentoj, por ke la kulpinto pentu pri sia peko?*

– La sincera pardono estas spontanea frukto de la amo, kaj tia pardono postulas nenian rekompencan.

336. – *Ĉu la pentanta kulpinto povas ricevi de la dia justeco la rajton ne sperti certajn provojn?*

– La okazo elaĉeti la kulpon jam estas, per si mem, ia ago de la dia kompatemo, kaj, de tio venas la motivo, kial ni konsideras la laboron kaj la individuan klopodon, kiel la mirindan lumon de la vivo.

Sed, etendante la demandon al ĉiuj provoj, ni ankoraŭ konkludu, per la instruo de Jesuo, ke “la amo kovras amason da pekoj” ⁽¹⁾, strekas por la homoj la rektan vivolinion kaj estas la unika forto, nuliganta la postulojn de la leĝo de egala repuno en la senfina Universo.

337. – *“Konsentu rapide kun via kontraŭulo” ⁽²⁾. – Tiu estas la parolo de la Evangelio, sed, se la kontraŭulo ne estos kun bona deziro je frateco, kiel ni efektivigu tiun reamikiĝon?*

– Ĉiu plenumu sian evangelian devon, serĉante la kontraŭulon por la necesa reamikiĝo, kun forgeso pri la ricevita ofendo. Se persistos lia venĝemo, la afero estu forgesita per la sincera frateco, ĉar la revengemo jam estas, per si mem, ia viva ulcero al ĉiuj, kiuj ĝin konservas en sia koro.

⁽¹⁾ I Petro, 4:8. – **La Trad.**

⁽²⁾ Mateo, 5:25. – **La Trad.**

338. – *Kial Jesuo konsilis pardoni “sepdekoble sep fojoj”?* ⁽¹⁾

– La Tero estas sfero de spertoj kaj elpagoj kelkfoje tre penigaj, kaj, kiu sin sentas ofendita de iu, tiu ne forgesu, ke ankaŭ li mem povas erari sepdekoble sep fojojn.

339. – *Parolante pri pardono, ĉu ni povos esti instruitaj pri la naturo de malamo?*

– Malamo povas signifi la tiel nomatajn instinktajn antipatiojn, en kiuj estas multe da animaleco, kiun ĉiu homo forigos de si per la valoroj de la memedukado, por ke lia komprenkapablo estu altigita al supera nivelo.

Sed pli ofte, la malamo estas la ĝermo de la amo, kiu estis sufokita kaj kripligita de koro sen Evangelio. La grandaj korinklinoj, transformitaj en malordajn pasiojn, sen aŭtentika kompreno de la sublima amo, kelkafoje brulegas en la interno, ĉe la momento de la moralaj tempestoj de la vivo, lasante post si la amarajn postsignojn de malamo, kvazaŭ karbojn, kiuj nigrigas la animon.

Nur la evangelizo de la spirita homo povos konduki lin en superan sferon de kompreno, tiel ke la korinklinaj energioj neniam fariĝu fortoj, detruantaj la koron.

340. – *Ĉu pardono kaj forgeso devas signifi la samon?*

– Por la surtera konvencio, la pardono signifas rezignon al venĝo, tiel ke la ofendito ne bezonu tute forgesi la eraron de dia frato; por la evangelizita spirito tamen pardono kaj forgeso devas iri kune, kvankam en ĉiuj momentoj de la ekzistado superstaras la bezono de preĝo kaj vigleco.

Cetere, la leĝo mem de reenkarniĝo instruas al ni, ke sole nur la forgeso pri la pasinteco povas prepari la aŭronon de la elaĉeto.

⁽¹⁾ Mateo, 18:22. – **La Trad.**

341. – *Ĉu la Spiritoj, kiuj kunvivis kun ni sur la Tero kaj kiuj foriras al la Spaco, ne ĝuinte la ĝojon de nia pardono, povos suferi pro niaj akuzoj, rilate al siaj dumvivaj faroj?*

– La elkarniĝinta Spirito multe suferas pro la nejustaj aŭ senpripensaj opinioj pri si formulitaj en la mondo.

Prezentu al vi, ke vi ricevas la juĝon de surtera frato kaj taksu, kiom multe vi dezirus lian rememoron pri tio bona, kion vi posedas, por ke malbono ne superstaru sur via vojo, sufokante viajn plej bonajn esperojn pri regenero.

Memorante tiun, kiu antaŭiris vin en la tombo, kompatu tiujn, kiuj eraris, kaj estu fratamaj.

Rememori la bonon estas vivigi la feliĉon. Forgesi la eraron estas ekstermi la malbonon. Krom ĉio, ni ne forgesu, ke ni estos juĝataj per la sama mezurilo, per kiu ni juĝos.

FRATECO

342. – *Ĉu la respondo de Jesuo al liaj disĉiploj: “Kiu estas mia patrino? kaj kiuj estas miaj fratoj?” ⁽¹⁾ estas ja ia instigo al la tutmonda frateco?*

– La Sinjoro aludis la malfirmecon de la sangaj ligiloj, starigante la amoformulon, kiu ne devas esti limigita al la intima medio, sed ligita al la tutmonda medio, sur kies vojoj ni nepre devos frate priatenti kaj helpi ĉiujn bezonantojn, ekde la ŝajne plej feliĉaj ĝis la plej mizeraj.

343. – *Kiel ni rekonu en la surteraj leĝoj de frateco la misian spiriton?*

– Ni konsideru, ke ankaŭ la misia Spirito spertas siajn provojn ĉe realigota laboro, restante tamen atingebla por la surteraj suferoj, pro sia spirita supereco.

Sed vi povos identigi la mision de la animo per ĝiaj faroj kaj paroloj, ĉe ĝiaj ekzemploj kaj instruo de la tasko, kiun ĝi

⁽¹⁾ Mateo, 12:48. – **La Trad.**

estis vokita plenumi, ĉar sendito de amo postlasas ja ĉe ĉiuj siajn paŝoj la luman sigelon de la bono.

344. – Ĉu la “*amo al la proksimulo*” ⁽¹⁾ *devas esti observata eĉ ĝis submetiĝo, malrespekto kaj kruelaĵoj fare de homoj malpli instruitaj pri la evangeliaj lecionoj, tiel ke la ofendito ilin humile toleru, sen la rajto ilin klarigi rilate al iliaj eraroj?*

– La amo al la proksimulo entenas la fratan klarigon, ĉiam, kiam ĝi montriĝas utila kaj necesa. La pasiva submetiĝo al malrespekto aŭ la krudeco povas plilongigi la procedojn de la forto kaj agresemo; sed, ricevante iliajn manifestiĝojn, la kredanto sciu polvigi ilin per maksimumo da sereneco kaj saĝo, por ke ili estu ekstermitaj ĉe sia origino mem, sen povo de renoviĝo.

Klarigi ankaŭ estas ami.

La tuta afero kuŝas en tio, ke ni bone sciu ekspliki, sen monro de malutilaj personaj esprimoj, eĉ per la plej granda kontribuo de energio, por ke la eraro aŭ la devio de la bono ne superstaru.

Rilate al la procedoj de klarigado, tiuj ĉi nepre malhavu, ĉe ĉiuj ajn tempo kaj situacio, la helpon de la fizika forto, kaj estas juste, ke ili elmontru la nuancojn de energio, postulatajn de la cirkonstancoj, tiamaniere variajn, laŭ la okazaĵoj kaj la neŝanĝebla bazo de la ĝenerala bono.

345. – Ĉu la *evangelia instruo*: “*Sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian*” ⁽²⁾ *devas esti observata de la kristano, eĉ kiam li estas viktimo de ne provokita korpa agreso?*

– Kun siaj centjaraj malvirtoj, la surtera homo jam de longe elpensas sennombrajn rimedojn por pravigi la tiel nomatan “necesan sindefendon”, sed, efektive, ĉia defendo de la homo kuŝas en Dio.

⁽¹⁾ Mateo, 5:43. – **La Trad.**

⁽²⁾ Mateo, 5:39. – **La Trad.**

Miaopinie, agante per la ŝlosilo de la kristana frateco, la homo povas neniiĝi la fermenton de la agreso per la lumo de la bono kaj de la morala sereneco.

Kredante tamen al la fiasko de ĉiuj pacaj provoj, la sincera kristano, en sia individua konduto, neniam devas samniveleĝi al sia agresanto, kaj li sciu estigi, ĉe ĉiaj cirkonstancoj, la diferencon inter siaj moralaj valoroj kaj la brutecaj instinktoj de la fizika perforto.

346. – *Ĉe la vivoluktoj, kiel ni instruu la evangelian fratecon al tiuj, kiujn ni plej estimas, se iafoje nia peno povos esti miskomprenata, kio nin kondukos al pli penigaj situacioj?*

– Konforme al la evangeliaj planoj, koncernas nin, ĉe ĉiuj malagrablaj cirkonstancoj de la ekzistado, instrui niajn proksimulojn kun frata amo, tiel same kiel ni ĉe indenta situacio dezirus esti helpataj de tiuj, kiuj troviĝas maltrankvilaj; sed superstarante la konflikto de la bestecaj instinktoj en tiuj, al kiuj ni plej deziras serenecon kaj pacon, estas ja bone lasi al ili la energion, post niaj superegaj penoj por purigado, ĉe la perforto, kiun ili elektis, ĝis kiam ili povos sperti la mensan serenecon nepre necesan, por ke ili profitu la korinklinajn manifestiĝojn de amo kaj vero.

347. – *Ĉu la Tero estas lernejo de frateco, aŭ pundomo por regenero?*

– La Tero devas esti rigardata kiel lernejo de frateco por la plibonigo kaj regenero de la enkarniĝintaj Spiritoj.

Plurfoje, la animoj, tie troviĝantaj en purigaj taskoj, celas la solvon de tro pezaj ŝuldoj. De tio la motivo, kial la plejmulto trovas amaraj la laborojn en la mondo, kiu al ili aspektas kiel kruda pundomo plena de veoj kaj afliktoj.

La nekontestebla vero estas, ke la diaj aspektoj de la Naturo estos ĉiam majestaj kaj lumplenaj; sed ĉiu spirito ilin rigardos tra la prismo de sia koro. En la doloro, kiel en la ĝojo; en la feliĉa laboro, kiel ankaŭ ĉe la malfacilega sperto tamen ĉiuj homoj rigardu la reenkarniĝon, kiel ian rimedon de subluma frata lernado, de Dio donitan al siaj infanoj, sur la vojo al progreso kaj elaĉeto.

348. – *Ĉar oni observas, ke ordinare en ĉiuj homoj estas granda entuziasmo por la materia hegemonio de iliaj grupoj, iliaj urboj, kluboj kaj societoj, kie elstare evidentiĝas la persono, kiu estas la kaŭzo de la homa indiferento por la sincera frateco?*

– Ordinare, la homoj ankoraŭ konservas multon de la tria karaktero, kaj troviĝas enkarcerigitaj en la ĝustedire homaj instinktoj, ĉe la luktoj por pozicioj kaj akiroj, en preskaŭ sovaĝa egoismo, kvazaŭ ili senfine konservus en si mem la heredaĵoj de la besta vivo. Estas necese rememori tamen, ke, post eksplodo de tiuj entuziasmoj, ĉiam restas la amara gusto de la neutileco en la interno de la spiritoj seniluziigintaj pri la nefirma hegemonio en la mondo, momento, en kiu la animo spertas la plivastiĝon de siaj profundaj emoj al io “pli supera”. Je tiu horo, la frateco konkeras ian novan esprimon en la interno de la homo, por ke la Spirito povu altigi sian flugon al siaj plej gloraj destinoj.

349. – *Ĉu frateco kaj egaleco povas meriti unu solan difinon?*

– Ni jam rimarkigis, ke absoluta egaleca koncepto estas neebla en la mondo, pro la heterogeneco de la inklinoj, sentoj kaj evoluaj pozicioj en la rondo de la individueco. Sed la frateco estas la leĝo de la reciproka helpo kaj de la komuna solidareco, sen kiu ĉiu progreso, en la mondo, estus praktike neebla.

350. – *Ĉu frateco povas manifestiĝi sen abnegacio?*

– Frateco povas signifi sinceran kaj efektivan kunlaboron ĉe ĉiuj taskoj de la vivo, kaj, ĉe ĉiu vera kunlaboro, la egocentrismo ne povas ekzistadi. Ni atentigu, ke, kiu kunlaboras, tiu ĉiam donas ion de si mem, atestante sian abnegacion, sen kiu la frateco neniel manifestiĝus en la mondo.

351. – *Kiel ni komprenu la “amon al ni mem”⁽¹⁾, laŭ la evangelia formulo?*

⁽¹⁾ Kp. Mateo, 22:39. – **La Trad.**

– La amo al ni mem estu interpretita kiel la bezono de preĝo kaj vigleco, kiujn ĉiuj homoj estas devigitaj observi.

Ami nin mem ne estos la vulgarigo de ia nova teorio de memadorado. Por ni, la memadorado jam finiĝis, ĉar nia problemo estas tiu de interna prilumado, ĉe marŝo al Dio. Tiu amo tamen devas transformiĝi en individuan klopodon, memedukadon, plenumon de devo, obeon al la leĝoj de realigo kaj laboro, persiston en la fido, sinceran deziron lerni kun la unika Majstro, kiu estas Jesuo Kristo.

Kiu sin prilumas, tiu plenumas la lumomision sur la Tero. Kaj la lumo ne bezonas aliajn rimedojn por montri la veron, krom tiu de spontanea disradiado de sia propra trezoro.

Ni bezonas alrigardi tiun novan formulon de amo al ni mem, konsciaj pri tio, ke ĉiu bono akirita de ni favore por la proksimulo estas nenio alia ol la bono de nia animo mem, pro la realeco de unu sola leĝo, kiu estas la leĝo de amo, kaj de unu disdonanto de bonoj, kiu estas Dio.

IV

SPIRITISMO

FIDO

352. – *Ĉu ni devas rekoni en Spiritismo la reviviĝintan Kristanisman?*

– La evangelia Spiritismo estas la Konsolanto promesita de Jesuo, kiu, per la voĉo de la elaĉetitaj estuloj, disvastigas la diajn lumojn sur la tuta Tero, restarigante la veron kaj forigante la vualon, kiu kovras la instruojn en ties aspekto de reviviĝinta Kristanismo, por ke la homoj vekiĝu por la grandioza erao de la spirita kompreno kun la Kristo.

353. – *Ĉu Spiritismo venis en la mondon por anstataŭi la aliajn kredojn?*

– Kiel Jesuo, ankaŭ la Konsolanto nepre asertos: – “Mi venis, ne por detrui la Leĝon”.⁽¹⁾

Spiritismo ne povas pretendi ekstermi la aliajn kredojn, erojn de la vero, kiun ilia doktrino prezentas, sed labori por ilin transformi, altigante iliajn antikvajn konceptojn al la lumo de la senmorta vero.

La misio de la Konsolanto nepre plenumiĝos ĉe la animoj kaj ne apud nedaŭraj vantaĵoj de la materiaj triumfoj. Klarigante la religian eraron, kie ajn ĝi troviĝas, kaj montrante la veran lumon per faroj kaj instruoj, la sincera spiritisto, pliriĉigante la valorojn de sia fido, reprezentas ja la laboriston de la regenero el la Templo de la Sinjoro, kie la homoj kuniĝas en diversajn apartaĵojn, antaŭ diversaj altaroj, sed kie ekzistas unu sola Majstro, kiu estas Jesuo Kristo.

354. – *Ĉu oni povas difini kio estas fidi?*

– Fidi estas teni en la koro la luman certecon pri Dio, certecon, kiu transpasis la limon de la religia kredo, igantan la koron ripozi en ia konstanta energio de dia realigo de la personeco.

Akiri fidon estas atingi la eblecon ne plu diri: “mi kredas”, sed aserti: “Mi scias”, kun ĉiuj valoroj de la racio tuŝitaj de la sentolumo. Tiu fido ne povas stagni en iu ajn cirkonstanco de la vivo, kaj ĝi scias ĉiam labori, intensigante la amplekson de sia lumo per la doloro aŭ per respondeco, per klopodo aŭ per la plenumita devo.

Signifante la certecon pri la helpo de Dio, ĝi esprimas la konfidon, kiu scias alfronti ĉiujn luktojn kaj problemojn, kun la dia lumo en la koro, kaj ĝi esprimas la elaĉetan humilecon, kiu konstruas en la interno de la spirito la sinceran emon de la disĉiplo, rilate al la deziro: “Plenumiĝu en la sklavo la volo de la Sinjoro”.⁽²⁾

355. – *Ĉu estus fido la senrezona kredo?*

⁽¹⁾ Mateo, 5:17. – **La trad.**

⁽²⁾ Kp. Lukon, 1:38. – **La Trad.**

– Kredi estas ia esprimo de kredo, en kiu troviĝas la embrioj de la aŭtentikaj valoroj de la fido.

La ago kredi al io postulas la neceson de la sento kaj rezonado, por ke la animo konstruu la fidon en si mem. Akcepti la plej strangajn asertojn, sen detala ekzameno, estas ja kvazaŭ marŝi al la interkrutejo de la absurdo, kie la dogmaj fantomoj kondukas la homojn al ĉiuj sensencaĵoj. Sed ankaŭ la enmiksiĝo en la esencajn problemojn de la vivo, kun la racio ne prilumita de la sento, estas iri al la sama deklivo, per kiu la kruelaj fantomoj de la neado kondukas la animojn al multe da krimoj.

356. – *Ĉu la rezona dubo, en la sincera koro, estas ia bazo por la fido?*

– Ĉia dubo, kiu manifestiĝas en la animo plena de bonvolo, kiu ne trorapidas en aprioraj difinoj en sia sincereco, aŭ kiu ne serĉas la ruzon por helpi siajn pensojn, estas ja bonefika elemento por la animo, ĉe la marŝo de la intelekto kaj de la koro, direkte al la subluma lumo de la fido.

357. – *Ĉu estas justa la priokupiĝo, superreganta en multe da studemuloj de Spiritismo, pri la revelacioj el la supera sfero, je preteksto de pliriĉigo de la fido?*

– Ĉia bonintenca scivolemo estas ja natura. Sed la homo komprenu, ke la solvo de tiuj problemoj venos al li tute nature, post la reguligo de lia situacio de ŝuldanto antaŭ liaj similuloj, kiam li fariĝos inda je la diaj revelacioj.

358. – *Kia estas la plej bona posedaĵo de la homa vivo, por la elkarniĝintaj Spiritoj, jam akirintaj multajn valorojn rilate al la fido?*

– En siaj karakteroj de laboro por la spirita elaĉeto, la homa vivo prezentas al niaj okuloj multajn karegajn posedaĵojn, ĉe la sinsekvo de luktoj, penadoj kaj oferoj de ĉiu spirito. Sed por ni, la plej granda trezoro de la surtera ekzistado kuŝas ja en la solida, pura konscienco prilumita de la fido kaj konstruita ĉe la plenumado de ĉiuj plej noblaj devoj.

359. – *Ĉe la meditado pri la fido, ĉu la enkarniĝinta Spirito devas limigi siajn pensojn al tio necesa por siaj spertoj sur la Tero?*

– Estas juste, almenaŭ, ke li meditu nur pri la transcendantaj valoroj de sia medio, post kiam li efektivigis ĉiun penon por sia prilumo, kiun la mondo povas disponigi al li laŭ siaj procesoj de purigo kaj plibonigo.

360. – *Kia devas esti la ago de la spiritisto, rilate al la religiaj dogmoj?*

– La novaj disĉiploj de la Evangelio komprenu, ke la dogmoj forpasis. Kaj la laŭliteraj religioj, kiuj ilin konstruis, ĉiam faris tion nur en obeo al la politikaj postuloj, ĉe la regado sur la popolamasoj.

Laŭ la novaj evoluaj valoroj tamen la spiritistoj evitu la dogmajn esprimojn, kaj komprenu, ke la Doktrino estas progresema, malakceptante ĉian pretendon de neeraremo, antaŭ la netransirebla majesto de la Evangelio.

361. – *Ĉe la propagando de la fido, ĉu estas juste, ke la spiritistoj aŭ medioj priokupiĝu konverti al la principoj de la Doktrino la homojn de elstara pozicio en la mondo, nome juĝistojn, kuracistojn, profesorojn, beletristojn, politikistojn, ktp?*

– La kristanaj spiritistoj multe devas pensi pri la prilumado de si mem, antaŭ ĉiu ajn deziro por konverti la aliajn.

Kaj, rilate al la altrangaj homoj de la surtera mondumo, tiu zorgo estu ankoraŭ pli granda, ĉar en la mondo ekzistas ia suverena koncepto pri “forto” por ĉiuj homoj, troviĝantaj en la spiritaj ekbatoj por la havigo de la progresistoloj. Tiu “forto” ekzistos plu ĉe la homoj ĝis la homaj animoj plene ekkonscios la bezonon de la regno de Jesuo en sia koro, kaj laboros por sia plena realigo. Escepte de tre malmultaj, la homoj de la surtera regado ofte akceptas nur la ordonojn, kiujn la “forto” sankcias, aŭ la principojn, pri kiuj ĝi konsentas. Kelkatempe blindigitaj de la vualoj de la vantemo kaj fantazio, kiujn la “forto” havigas al ili, estas necese lasi, ke ili estu liberaj ĉe

siaj spertoj. Venos unu tago, kiam brilos sur la Tero la eternaj rajtoj de la vero kaj bono, neniigante tiun paseman “forton”. Vi havas ja la ekzemplon de la Dia Majstro, kiu, transdonante al la mondo la plej grandan mesaĝon pri amo kaj vivo por ĉiuj tempoj, ne havis la priokupiĝon konverti al la Evangelio la siatempajn Pilatojn kaj Antipasojn.

PROZELITOJ

362. – *Ĉu ni povas ricevi novan instruon pri la devoj koncernantaj la spiritistojn?*

– Ni ne detaligu la devojn de la kristana spiritisto, ĉar nenia vorto povos superi la ekzempladon de la Kristo, kiun ĉiu disĉiplo devas preni kiel modelon por sia vivo.

Konsilinde estas, ke, en siaj ordinaraĵoj aktivecoj la spiritisto estu ekstreme indulĝa al siaj similuloj, kaj tute ne indulĝa al si mem, ĉar, antaŭ ol pensi pri la prilumado de la aliaj, li devos peni prilumi sin mem per la plenumo de siaj devoj.

363. – *Kiel oni pravigas la ekziston de certaj kontraŭfrataj luktoj en la sino de la spiritistaj grupoj?*

– La spiritistaj grupoj bezonas kompreni, ke ilia organizo ne povas simili tiujn de la ĝustedire homaj societoj.

Spirita-kristana societo havu, pli ol ĉion alian, la familian karakteron, kie la amo kaj la simpleco vidiĝu en la manifestiĝo de ĉiuj sentoj.

Kiam, en spiritisma organizaĵo, aperas malkonsentoj kaj internaj luktoj, montrante partianecojn kaj malamikecojn, tio signifas foreston de la Evangelio en la koroj, manifestiĝantan per la eksceso de homa materialo kaj aŭgurantan la pereon de la plej bonkoraj intencoj.

En tiuj studnukleoj nenia laboro efektiviĝos sen aŭtentikaj frateco kaj humileco, kaj estas nepre necese, ke ĉiuj kunuloj,

inter si, viglu kun bonvolo kaj sincereco, por ke ili ne transformu sian bonegan spiritan posedaĵon en imitaĵon de la katolikaj sekretaj kunvenoj, difektitaj de la intrigo kaj hipokriteco.

364. – *Por progresi en la Doktrino, ĉu la spiritisto bezonas studi kaj mediti per si mem, aŭ sufiĉas vizitadi la doktrinajn organizaĵojn, atendante la parolojn de la gvidantojn?*

– Al ĉiu estas nepre necesa la diligenteco ĉe la studado, meditado, kulturado kaj aplikado de la Doktrino, ĉe ĉiu momento de lia intima vivo.

La vizitado al seancoj aŭ la fakto ĉeesti tiun aŭ alian fenomenon, akceptante ĝian aŭtentikecon, tio ne signifas sciakiron.

Spirita gvidanto povas ja esti bona amiko, sed li neniam povos plenumi viajn proprajn devojn nek deturni vin de la provoj kaj spertoj nepre necesaj por via prilumado.

El tio naskiĝas la bezono, ke vi individue sin preparu ĉe la Doktrino por travivi tiajn spertojn kun spirita digne, ĉe oportuna momento.

365. – *Kiel ni ricevu la kritikajn atakojn?*

– La spiritistoj ricevu la kritikon de la kampoj de kontraŭa opinio kun maksimumo da morala sereneco, rekonante ĝian esencan utilecon.

Preskaŭ ĉiam tiuj kritikoj prezentiĝas kun netaksebla celo, tia, nature elekti la kontribuojn de la doktrina propagando, forigante la malordigajn, konfuzajn elementojn, kaj valorigante la aŭtentikan, sinceran kunlaboron, ĉar ĉiu atako kontraŭ la pura vero servas nur por elstarigi kaj altigi tiun saman veron.

366. – *Kiel devos aĝi la sincera spiritisto, kiam li troviĝos antaŭ certaj doktrinaj strangaĵoj?*

– Ĉe la lumo de la pura frateco ni ne rifuzu la helpon de la saĝa parolo kaj de la rekta kontribuo, ĉiam, kiam ĝi estos konvena al la klarigado de ĉiuj, sed zorgante neniam malobei la verajn evangeliajn principojn, ne ofendante tamen la sentojn de aliaj personoj. Kaj se tiuj personoj persistos en la nekom-

prenemo, ĉiu laboristo zorgu pri sia tasko, ĉar Jesuo asertis, ke la tritiko kreskas flanke de la lolo, en lia sankta kultivejo, sed Li, la Kulturanto de la Dia Vero, scios elekti la bonan grenon en la tempo de la rikolto.

367. – *Ĉu estas juste, ke, pri ĉiuj aferoj, la spiritisto penu tuŝi spiritismajn temojn en siaj ordinaraj konversacioj?*

– La sincera kredanto devas konsciiĝi pri la oportuneco, en la tempo kaj medio, rilate al la doktrinaj temoj, ĉar, ĉia nesingardemo, en tiu afero, povas konduki al abomeninda fanatikeco, sen iu ajn edifa karaktero.

368. – *Ĉu ni devas iamaniere okazigi, en la spiritismaj grupoj, tiun aŭ alian manifestiĝon el la Transmondo?*

– En tiuj doktrinaj kunsidoj, super ĉiaj fenomenaj faktoj regu la individuaj sincereco kaj sindonemo, ĉe la studado de la moralaj leĝoj, regantaj la interŝanĝon inter la Tero kaj la nevideblaj sferoj.

Neniel oni okazigu la mediumajn manifestiĝojn, kies aŭtentikeco kuŝas en ilia spontaneeco, des pli, ĉar la spirita programo de la seancoj estas plenumataj de mentoroj, ilin gvidantaj el la nevidebla sfero. Tiam, oni postulas de ĉiu studemulo plej multe da individua klopodo por akirado de scio, ĉar la spirita sfero ĉiam disdonas laŭ la bezonoj kaj meritoj de ĉiu. Trudi la mediuman fenomenon estas makuli fonton de pura akvo per la ŝlimo de la surteraj egoismaj pasioj, aŭ per ĝiaj nepravigeblaj maltrankviloj.

369. – *Ĉu estas konsilinda la rekta elvoko de iaj Spiritoj?*

– Ni ne estas el tiuj, kiuj konsilas la rektan, personan elvokon, en ĉia ajn okazo.

Se tia elvoko prosperas, ĝia plenumo povas esti ekzamenata nur en la spirita sfero. De tio la neceso, ke ni estu spontaneaj, ĉar, en la tutaĵo de la spirita fenomenoj, la solvado de pluraj problemoj atendas la moralan progreson de la sinceraj lernantoj de la Doktrino. La bonintenca studemulo tamen petu, ne

postulante, preĝu, ne plendante, observu ne rapidante, ĉar la spirita sfero konas liajn meritojn kaj rekompencos liajn klopodojn konforme al la bezono de lia evolua pozicio kaj laŭ la merito de lia koro.

Vi povos kontraŭdiri, ke Allan Kardec interesiĝis pri la rekta elvoko, efektivigante tiajn laborojn, sed ni devas konsideri, en lia penado, la esceptan taskon de la Kodiginto, ligitan al bezonoj kaj meritoj ankoraŭ malproksimaj de la sfero de aktiveco de la ordinaraĵ lernantoj.

370. – *Ĉu estus pravigebla esplori, per la amikaj spiritoj, niajn antaŭajn vivojn? Efektivigante tiaj revelacioj, ĉu ili alportas respondecon al tiuj, kiuj ilin ricevas?*

– Se vi estas dronintaj en kelkatempa forgeso, tiu forgeso estas nepre necesa por la valorigo de viaj iniciatoj. Vi ne devas okazigi tiajn revelaciojn, ĉar la spiritaj amikoj pli bone konas viajn bezonojn, kaj ili povos provizi vin je necesajoj en oportuna tempo, ne rompante la regulon de spontaneeco postulata por tiu celo.

La kono pri la pasinteco, per revelacioj aŭ rememoroj, alvenas ĉiam, kiam la homo fariĝas inda je favoro, kia tiu, kiu estas akompanata, siavice, de tre grandaj respondecoj en la sfero de la scio; kaj tio estas des pli vera al multaj homoj, ĉar tiuj rememoroj kutime fariĝas ia dolora privilegio, en la medio de maltrakvilecoj kaj iluzioj sur la Tero.

371. – *Ĉu devas esti plimultigitaj, en Spiritismo, la seancoj de mediumaj fenomenoj?*

– Ankoraŭ estas tre malmultaj la spiritismaj nukleoj kapablaj sin doni al la mediuma praktiko kun plena konscio pri la tasko, kiun ili havas en la manoj; tial estas konsilinda la plimultigo de kunsidoj por legado, meditado kaj ĝenerala komentario, por la nepre necesaj moralaj konkludoj por la doktrina preparado, por ke sennombraj bonintencaj societoj ne falu en senkuraĝecon aŭ en malkomprenon, pro ia antaŭtempa interrilato kun la energioj de la nevidebla sfero.

PRAKTIKO

372. – *Kiel ni komprenu la seancon?*

– La seanco ĉie devus esti ia fidela kopio de la frateca, simpla, humila kunvenejo en Tiberias, kie la Evangelio de la Sinjoro respuguliĝus en spirito kaj vero, sen iu jan konvencio de la mondo, tiamaniere ke, interplektitaj ĉiuj pensoj por la sama ama kaj sincera celo, la kunvenantaro povus esti tiun kuniĝon de du aŭ pli da koroj, en la nomo de la Kristo, kie la klopodoj de la disĉiploj ĉiam estos sanktigitaj de la ĉeesto de lia amo.

373. – *Kiel devas esti direktita unu spiritisma kunsido, ekde sia malfermiĝo ĝis sia fermiĝo?*

– En tiu rilato, oni devas konsideri la bonegecon de la Kodo de Kardec; sed estos ĉiam utile memori, ke la doktrinaj kunsidoj devos observi maksimumo da simpleco, kiel la humilaj, sinceraj kunvenoj de la primitiva Kristanismo, kaj ili sin detenu de ĉia ajn esprimo, pli alvokanta la materiajn sencojn ol la profundan animon, la grandan forgesiton de ĉiuj tempoj de la Homaro.

374. – *Ĉe la seancoj, ĉu la direktantoj kaj la mediumoj havas ian difinitan kaj malsaman taskon inter si?*

– Ĉe la doktrinaj kunsidoj, la rolo de la orientanto kaj tiu de la mediumo devas esti ĉiam identigitaj per la sama karaktero de frateco kaj amo super ĉio. Sed oni atentigu, ke la spiritaj laboroj produktu la plej altajn efikojn, reliefigante, ke la direktantoj de la seancoj estu la racio kaj la logiko, dum la mediumo devas reprezenti la fonton de pura akvo de la sento. Tial, en la kunsidoj, kie la orientantoj ne atentis pri la logiko kaj kie la mediumoj ne havas fidon kaj abnegacion, la bona tasko estas neebbla, ĉar la natura malordo estigos la sterilecon sur la kampo de la koroj.

375. – *Ĉu la spiritistaj societoj povas esti organizitaj sen la kontribuo de la mediumoj?*

– En la doktrinaj kunsidoj, la medioj estas utilaj, sed ne nepre necesaj, ĉar ni estas devigitaj konsideri, ke ĉiuj homoj estas medioj, kvankam sen difinitaj taskoj en tiu rilato, kaj ĉiu, en la intuicia sfero, povas senti kaj interpreti la aman, saĝan vorton de siaj spiritaĵoj, en la plejprofundo de la konscienco.

376. – *Ĉu estas konsilinda la difino de iu semajntago por la normala okazigo de seancoj?*

– Ĉiu ajn tago kaj horo povas esti dediĉitaj al la bona laboro de frateco kaj bonfaro, ĉiam, kiam ĝi estas necesa. Sed en la kunsidoj dediĉitaj al la doktrina klopodo, fariĝas nepre necesa la metodigo de ĉiuj laboroj en antaŭdifinitaj tagoj kaj horoj.

377. – *Estas studemuloj de la Doktrino, kiuj foriĝas de la kunsidoj, kiam tiuj ĉi ne prezentas fenomenojn. Kiel oni agu rilate al ili?*

– Tiuj, kiuj tiel agas, atestas, per si mem, plenan nekapablecon por la vera laboro de la sincera Spiritismo. Se ili preferas la pasemajn emociojn de la nervoj anstataŭ servon de sia prilumado, estas ja pli bone, ke ili kelkatempe foriĝu de la seriozaj studoj de la Doktrino, antaŭ ol preni sur sin iun ajn kompromison. La kompreno de Spiritismo ankoraŭ ne estas sufiĉe elvolviĝinta en ilia interna mondo, kaj estas juste, ke la spiritistoj daŭrigu plu siajn eksperimentojn por ĝin atingi.

La sukceso de la klopodo de la spirita sfero, profite al la reviviĝinta Kristanismo, ne dependas de la kvanto da homoj, ĝin serĉantaj, sed de la kvalito de la laboristoj, batalantaj en ĝiaj vicoj.

378. – *Kial la evangelizado, ĉe la spiritistaj kunsidoj, favoras ankaŭ la elkarniĝintojn, se estus pli juste, ke ĉi tiuj profitu la lecionojn ricevitajn en la spirita sfero mem?*

– Granda nombro da animoj elkarniĝintaj sub la iluzioj de la fizika vivo, iluzioj preskaŭ tute konservataj en la interno, restas kelkatempe nekapablaj kapti la vibroj el la supera sfero, kaj tiuj animoj estas kondukataj de siaj gvidantoj kaj elacetitaj

amikoj al la frataj kunvenoj de la evangelia Spiritismo, kie, en la amemaj okuloj de tiuj samaj mentoroj el la nevidebla sfero, plenumiĝas la ordonoj de la leĝo de reciproka helpo kaj bonfaroj, reganta la vivofenomenojn en la du sferoj.

379. – *Kiel devos agi la studemulo, por identigi la spiritojn komunikiĝantajn?*

– La spiritoj, kiuj manifestiĝas pere de la mediumoj, devas esti identigitaj per siaj ideoj kaj per la spirita esenco de siaj vortoj.

Iuj mediumoj, kun specialaj taskoj, povas esti multvalora helpilo ĉe la persona identigado, ĉu ĉe literatura fenomeno, ĉe la sciencaj ekvacioj, ĉu plenumante certajn postulojn de la kontrolo, sed tiu ne estas la ĝenerala regulo. Oni elstarigu, ke la spiritoj ofte trovas nenion alian ol neperfektan materialon, ilin devigantan al tio nepre necesa, rilate al la komunikiĝo.

Ni tamen komprenu, ke la lingvaĵo de la Spirito estas universala, estiĝanta per la nevideblaj fadenoj de la penso, kio, cetere, ne nuligas la neceson de ia atenta studado de ĉiuj ideoj entenataj en la mediumaj mesaĝoj, kaj ni estu tre zorgemaj rilate al la famaj nomoj, kiuj eventuale ilin subskribas.

Ĉe ĉiaspecaj manifestiĝoj tamen la kredanto aŭ studemulo de la problemo de identigo ne povas meti flanken tiun spiritan observemon, kiu ĉiam parolos al li en la plejprofundo de lia konscienco.

380. – *Suferinte la apartiĝon de kara estulo, pro lia morto, ĉu estas juste, ke spiritisto okazigu lian manifestiĝon en mediumaj seancoj?*

– Ĉe tiaj okazoj, la sincera spiritisto serĉu la moralan komforton en la propra fido, kiu devas edifi al li la koron.

Ne estas juste okazigi aŭ trudi komunikiĝon al tiu aŭ alia elkarniĝinto. Krom tio, ke vi ne konas la eblecojn de lia nova kondiĉo en la spirita sfero, vi atentu la problemon de viaj meritoj mem.

La homo povas ja deziri tion aŭ alion, sed ekzistas ia Providenco, kiu planas la aferon, ekzamenante la meriton de la petanto kaj la utilecon de la dono.

Ĉiu komunikiĝo kun la Nevideblo devas esti spontanea, kaj la kristana spiritisto serĉu en sia fido la plej altan rimedon por la ĉesigo de la homa egoismo, konsiderante la neceson de ripozo por tiuj, kiujn li amis, kaj atendante lian rektan parolon, kiu ja venos kiam kaj kiel la spiritaj mentoroj opinios konvene kaj oportune.

381. – *Multaj serĉas Spiritismon, plendante pri persekutoj el la Nevideblo. Ĉu tiuj, kiuj protestas kontraŭ tiaj maltrankvilingoj, estas iel forlasitaj de siaj spiritaj gvidantoj?*

– La protekto de la Dia Providenco etendiĝas al ĉiuj kreitaĵoj.

La agado de persekutantaj kaj konfuzitaj Spiritoj praviĝas en la kadro de elaĉetaj provoj, sed tiuj, kiuj plendas kontraŭ la sieĝado de malsuperaj fortoj el la sferoj ligitaj al la terglobo, devas konsulti sian propran koron, antaŭ ol formuli siajn plendojn, tiel ke ili observu, ĉu la perturbanta Spirito ne troviĝas en ili mem.

Ekzistas ja teruraj obsedantoj de homoj, nomataj “fiero”, “vantemo”, “mallaboremo”, “avareco”, “malklereco” aŭ “malbonvolo”, kaj estas grave esplori, ĉu ni ne estas viktimoj de tiuj malvirtigaj energioj multfoje loĝantaj en la koro de la homo, ĝin blindigante je la kompreno de la lumo de Dio. Kontraŭ tiuj detruaj elementoj estas necesa ia nova speco de preĝoj, konsistanta el laboro, fido, klopodo kaj bonvolo.

V

MEDIUMECO

ELVOLVIĜO

382. – *Kia estas la vera difino de mediumeco?*

– Mediumeco estas tiu lumo, kiu estas disjetata sur ĉiun karnon, kaj kiu estas promesita de la Dia Majstro al la tempo de la Konsolanto, nuntempe floranta sur al Tero.

Se ĝi havas siajn ĝenojn kaj dolorajn luktojn, la mediuma misio estas tamen unu el la plej belaj okazoj de progreso kaj elaĉeto donitaj de Dio al siaj mizeregaj filoj.

Estante lumo brilanta en la karno, la mediumeco estas ja atributo de la Spirito, posedaĵo de la senmorta animo, elemento renoviganta la moralan pozicion de la surtera homo, pliriĉigante ĉiujn siajn valorojn sur la kampo de la virto kaj intelekto, ĉiufoje kiam ĝi troviĝas ligita al la evangeliaj principoj, ĉe sia irado sur la Tero.

383. – *Ĉu estas juste, ke ni rigardu ĉiujn homojn kiel mediumojn?*

– Ĉiuj homoj havas sian gradon de mediumeco laŭ siaj plej variaj evoluaj pozicioj, kaj tiu spirita atributo ankoraŭ reprezentas la aŭronon de novaj perceptoj por la homo de la estonteco, kiam, pro la progreso de la monda intelekto, la homoj vidos plilarĝigi la malvastan fenestron de iliaj kvin sentumoj.

Sed nuntempe ni devas konfesi, ke sur la vasta kampo de la psikaj potencoj de la homo ekzistas ja mediumoj kun difinita tasko, pioniroj de la novaj homaj akiraĵoj. Estas vere, ke tiuj taskoj postulas oferecon kaj multfoje konsistas el krudaj provoj; se tamen la laboristo serĉas la evangelian substancon por la plenumo de siaj devoj, li efektive estas la laboristo, rajtanta aldonon da favorkoreco, promesitan de la Majstro al tiuj bonvolaj disĉiploj.

384. – *Ĉu oni trudi la elvolviĝon de la mediumeco?*

– La mediumeco ne estu frukto de trorapido en tiu aŭ alia sektoro de la doktrina aktiveco, ĉar, tiurilate, ĉia spontaneeco estas nepre necesa, pro tio, ke la mediumaj taskoj estas direktataj de la mentoroj de la spirita sfero.

385. – *Ĉu la virino aŭ la viro, aparte, posedas specialajn disponojn por la mediuma elvolviĝo?*

– Koncerne la mediumecon ne ekzistas, ĝustasence, privilegioj por tiuj, kiuj troviĝas en difinita situacio; sed, en siaj laboroj, venkas nur tiuj, kiuj entenos la plej grandan kvanton

da sento. Kaj la virino, pro la evoluo de sia sentemo en ĉiuj klimatoj kaj situacioj tra la tempoj, troviĝas nun en sfero supera al tiu de la viro, por interpreti, kun plimulte da precizo kaj beleco, la mesaĝojn de la nevideblaj sferoj.

386. – *Kia mediumeco estas plej kara por la bona servado al la Doktrino?*

– Neniu devos trudi la elvolviĝon de tiu aŭ alia kapablo, ĉar, sur tiu kampo, ĉia spontaneeco estas necesa, sed, observante la floradon de la spontanea mediumeco, ĉe ĝiaj plej simplaj aspektoj, oni devas akcepti la okazaĵojn kun la plej bonaj intencoj de laboro kaj bonvolo, eĉ en la okazoj, se tiu psika kapablo estas la plej humila ol ĉiuj.

Ne ekzistas ja mediumeco pli kara ol alia.

Ĉia ajn estas kampo malfermita al la plej belaj spiritaĵoj realigoj, kaj estas juste, ke la mediumo, kun difinita tasko, pleniĝu de la misia spirito, kun sincera sindonemo kaj pura frateco, por ke lia komiso ne estu objekto de perfida senfrukteco.

387. – *Kia estas la plej granda bezono de la mediumo?*

– La unua bezono de la mediumo estas evangelizi sin mem antaŭ ol sin doni al aliaj grandaj doktrinaj taskoj, ĉar alie li ĉiam povos renkonti la fantomon de memadorado, malprofite de sia misio.

388. – *Ĉe la mediumaj laboroj, ĉu ni ĉiam konsideru ankaŭ la imperativojn de la specialigo?*

– En la sferoj de siaj individuaj eblecoj, la monda homo, sur la kampo de devoj, lin koncernantaj en la vivo, devos foriĝi de la ĝeneraleco por produkti tion utilan kaj agrablan.

Pri mediumeco, ni submetiĝu al la samaj principoj. Laŭ kapableco, la enciklopedia homo ankoraŭ ne ekaperis, krom en ĝermo, en la geniaj estuloj malofte aperantaj sur la Tero, kaj ni devas konsideri, ke la mediumeco nur nun ekaperas en la tutaĵo de atributoj de la transcenda homo.

La specialiĝo en la mediuma tasko estas do pli ol necesa, kaj nur el ĝia komprenado povos naskiĝi la harmonio de la granda realigota laboro vulgariĝi la veron.

389. – *Ĉu la mediumeco povas esti forprenita en certaj cirkonstancoj de la vivo?*

– La mediumaj atributoj estas kiel la talantoj de la Evangelio. Se la dia posedaĵo estas deturnita de siaj celoj, la malbona servisto fariĝas neinda je la konfido de la Sinjoro de la kultivejo de vero kaj amo. Multobligitaj per la bono, la mediumaj talantoj plumultiĝos por Jesuo, sub la diaj benoj; sed, se ili estos makulitaj de la egoismo, de la fiero, de la vantemo aŭ de la malnobla ekspluato, ili povas forlasi la peranton de la nevideblo en la densaj ombroj de neniofarado, kun la plej doloraj perspektivoj de pentofaro, pro la pliigo de liaj senpripensaj ŝuldoj.

390. – *Ĉu estas juste, ke mediumo fidu je si mem por la okazigo de fenomenoj, organizante specialajn laborojn, kun la celo konverti nekredantojn?*

– Kie troviĝas la mediumo en tiel alta kondiĉo de pureco kaj indeco por kalkuli je siaj propraj kapabloj por produkti tiun aŭ alian fenomenon? Sur la Tero, neniu utilas, krom pro la dia favorkoreco, lin akompananta, kaj la saĝo de la supera sfero detale konas la bezonojn kaj la meritojn de ĉiu homo. La provo de tiaj laboroj estas grava eraro. Unu fenomeno ne konstruas la sinceran fidon, kiu estas atingita nur per la personaj klopodo kaj bonvolo ĉe la meditado kaj interna laboro. Unu tagon la nekredantoj alvenos al la Vero, kaj la Vero estas Jesuo. Ĉu antaŭveni al la agado de la Majstro ne estus ia atesto pri malordo? Organizati mediumajn seancojn kun la celo varbi prozelitojn estas agi kun troa ventanimeco. Kio estas sankta kaj dia, tio estus elmetita al la trrapidaj juĝoj de la plej malkleraj kaj al la detrua atako de la plej kruelaj, kvazaŭ la Vero de Jesuo estus objekto de spektakloj en la arenoj de ia cirko.

391. – *Ĉu la bestoj posedas mediuemecon?*

– La bestoj ne posedas ĝustasence mediumajn kapablojn. Sed ili havas embriajn psikajn perceptojn, respondajn al ilia evolua stato, per kiuj ili povas montri la sendube konfuzantajn Spiritojn, kun malnoblaj celoj, por starigi hezitemon en tiuj, ilin akompanantaj, en difinitaj cirkonstancoj.

PREPARIĜO392. – *Ĉu mediuemo povas absolute fidi je siaj spiritaj gvidantoj, formetante la studojn?*

– Kiom ajn sindonemaj kaj evoluaj estas la mentoroj de mediuemo, ili ne povos bari lian volon nek deturni lian koron de la nepre necesaj luktoj de la vivo, per kies bonfaroj ĉiuj homoj elpagas sian kriman, malluman pasintecon, konkerante novajn meritojn.

La mediuemo estas devigita multe studi, intense observi kaj labori, ĉiumomente, por sia prilumado. Nur tiamaniere li povos pretiĝi por la plenumo de la tasko al li konfidita, efike kunhelpante la sincerajn Spiritojn dediĉitajn al la bono kaj vero.

Se mediuemo multe atendas de siaj gvidantoj, estas pravigebla, ke liaj spiritaj mentoroj multe atendu de lia klopodo. Kaj tial, ke ĉia homa progreso, por esti daŭrigata, ne povas ne bezoni siajn bazojn jam konstruitajn en la spaco kaj tempo, la mediuemo nepre sin donu al la studado, ĉiam, kiam tio estas ebla, kreante la kutimon kunvivi kun la lumohava, bonfara spirito de la instruintoj de la Homaro, sub la egido de Jesuo, ĉiam vivaj en la mondo, per siaj libroj kaj ekzemploj.

La kutimo, ĉion atendi de gvidanto, povas ŝanĝiĝi en abomenindan malvirton, nuligante la plej karajn kapablojn de la animo. Alveninte al tiu malvirtiĝo, oni atingas la deklivon de la mistifikoj kaj doktrinaj strangaĵoj, kaj la mediuemo fariĝas mallaborema kaj ventanima, respondante por la devio de sia sankta tasko.

393. – *Kiel ni komprenu la obsedon? Ĉu ĝi estas fatala provo, aŭ akcidento, kiun oni povas facile forigi, nuligante ĝiajn efikojn?*

– La obsedo ĉiam estas provo, sed neniam eventuala okazaĵo. Ĉe ĝia ekzameno tamen ni devas konsideri la meritojn de la viktimo kaj la favoron de la dia mizerikordo al ĉiuj suferantoj.

Por mildigi aŭ forigi ĝiajn efikojn, estas nepre necesa la sento de universala amo en la koro de tiu, kiu parolas en la nomo de Jesuo. Ne sufiĉos la doktrinaj formuloj. Estas nepre necesa la sindonemo per la plej pura fratamo. Kiuj sin donas al la kuracado de la obsedoj, tiuj devas pesi, antaŭ ĉio, la bezonon de interna prilumado de la konsternita medio, ĉar en lia spirita eduko sidas la kuracado mem. Se tiu penado ne plenumiĝas, estu zorgema, ĉar tiam la efikoj etendiĝos al ĉiaj centroj de organa kaj psika fortoj. La obsedito, kiu sen morala rezisto forlasas sian korpon al la malkleraj, konfuzantaj Spiritoj, similas la artiston, kiu transdonus sian multvaloran violonon al malbonfaranto, kiu iam povos rezigni la instrumenton ne apartenantan al li, lasante ĝin disrompita, tiel ke ĝia posedanto laŭrajta, sed ne antaŭzorga, ne povos utiligi ĝin por la sanktaj vivoceeloj.

394. – *Por la kuracado de obsedito, ĉu estos ĉiam utila la instruado al la konsternita Spirito, fare de konvinkiĝinta spirito?*

– La kunlaboro de la kunulo tre valoras kaj ĉiam tre utilas, precipe al la elkarniĝinto; sed la plena resanigo de la medio ne dependas sole nur de tiu rimedo, ĉar se plurfoje estas facila la instruado al la malfeliĉa, suferanta Spirito, la instruado al la enkarniĝinto estas la plej malfacila el ĉiuj, ĉar ĝi postulas la valorojn de liaj sento kaj bonvolo, sen kio la psika kuracado fariĝas neplenumbla.

395. – *Ĉu obsedo povas ŝanĝiĝi en frenezecon?*

– Ĉia ajn obsedo povas ŝanĝiĝi en frenezecon, ne nur kiam la provoleĝoj tiel ĝin postulas, sed ankaŭ en la okazo, kiam la

obsedito memvole sin forlasas al la sieĝo de malutilaj fortoj, lin ĉirkaŭantaj, preferante tian specon de spertoj.

396. – *Temante pri la bezono de prepariĝo por la mediuma tasko, ĉu estas juste kredi la movadon de malutilaj fluidaĵoj malprofite de la proksimulo?*

– Ĝi estas la kazo, ke ni demandu, ĉu vi ne agigis la malutilajn energiojn, dum la vivo, kontraŭ via feliĉo mem.

En mondo kiel la Tero, kie multo da malsuperaj fortoj preskaŭ frakase superas la efektivajn valorojn de la bono, la movado de la malbonefikaj fluidaĵoj estas afero pli ol natura; sed estas necesege instrui al tiuj, kiuj agas sur tiu kampo de malico, ke iliaj penoj efektivigas la malfeliĉan semadon, kies estontaj dornoj sin turnos kontraŭ ili mem, per amaraj returnaj batoj, kaj estas necese ankaŭ eduki la hodiaŭajn viktimojn pri la vera fido al Jesuo, tiel ke ili komprenu la problemojn pri la meritoj ĉe la tasko en la mondo.

La nuntempa afliktiteco povas esti bono naskonta altvalorajn konkerojn en la estonteco, kaj, se Dio permesas la influon de tiuj malsuperaj energioj en difinitaj fazoj de la surtera ekzistado, tiel estas, ĉar tiu influo havas sian profundan celon, ĉe la dia servo de la individua regenero.

397. – *Kial kelkaj mediumoj laŭŝajne suferas pro la fenomenoj de enkorpiĝo, dum aliaj tute nature manifestas tiun saman fenomenon?*

– En la mediumaj manifestiĝoj ekzistas distingiloj propraj al ĉiu peranto inter la homoj kaj la elkarniĝintoj; sed la manko de spontaneeco de la mediumo, ĉe la momento praktiki siajn kapablojn, preskaŭ ĉiam rezultas de la manko de psika eduko.

398. – *Ĉu estas kompreneble, ke dum la studkunsidoj la mediumoj sin lasu influi de la malordigantaj Spiritoj, kiuj kutimas rompi la ritmon de la profitaj, sinceraj laboroj de edukado?*

– Tia interveno ne estas komprenebla kaj ĝi devas esti tre miriga al ĉiuj bonvolaj studemuloj.

Se la medio de sindoninto al la malutila agado nescias siajn devojn diktajn de la doktrinaj instruoj, tio okazas ĉar li estas obsedito, postulanta maksimumon da frata helpo; sed, se tio okazas per kunulo havanta ĝustan scion de siaj devoj en la rondo de la doktrinaj aktivecoj, estas juste fari lin respondeca pri la konsterniteco, ĉar tiam la fakto devenas de liaj malvigleco kaj neantaŭzorgemo rilate al la sanktaj devoj, koncernantaj ĉiun el ni, ĉe la penado por la bono kaj vero.

399. – *Kiam la ironia aŭ insulta opinio atakas la veron, sur la media kampo, ĉu estas juste, ke ni serĉu la helpon de la amikaj Spiritoj, por la rebato?*

– Via maltrankvileco en la mondo kutimas konduki vin al multaj malsaĝaĵoj.

Tia peto al la elkarniĝintoj estus ja unu el tiaj malsaĝaĵoj. La valoroj de media kampo triumfas per si mem, per la esenco de amo kaj vero, de konsolo kaj lumo, kiujn ili enhavas, kaj estus nepravigeble kunvoki la Spiritojn por diskuti kun la homoj, kiam jam troas la polemikoj de la homaj studemuloj inter si.

Krome, ankaŭ tiuj, kiuj ne akceptas la sinceran, fratan parolon de la kurieroj el la supera sfero, iam devos aliri la tombon, kaj estas vane perdi tempon kun paroloj, kiam ni havas multon farotan sur la tereno de niaj edifoj mem.

400. – *Ĉu oni povas permesi, ke medio sin helpu de alia medio por havigi al si la subtenon de siaj spiritaj amikoj?*

– Estas juste, ke amiko sin turnu al la frateca estimo de kunkredanto pri aferoj de intima, reciproka konfido, sed, ĉe la media funkcio, la portanto de tiu aŭ alia kapablo serĉu en sia propra valoro la elementon, ligantan lin al liaj mentoroj el la nevidebla sfero, kaj estas ja kontraŭefike, en tiu aparta okazo, serĉi subtenon ekster siaj kapabloj, ĉar alie li sin apogus sur aliula fido, kiam la fido devas fonto interne de ĉiu homo, en la meĥanismo de la vivo.

Krome, ĉiu medio posedas sian agosferon en la medio al li destinita. Forlasi la propran fidon por sin turni al aliulo estus superŝarĝi la dorson de kunulo de laboro, forgesante la

elaĉetan krucon, kiun ĉiu enkarniĝinta Spirito devos porti, serĉe de la dia heleco.

401. – *Ĉu la mistifiko, trafinta mediumon, signifas, ke al li mankis la subteno de la spiritaĵaj mentoroj?*

– La mistifiko spertita de mediumo ĉiam havas ian utilan celon, kia estas tiu forigi lin de la memamo, de la mallaboremo ĉe la studado de siaj propraj bezonoj, de la persona vantemo aŭ de la ekscsesoj de fido al si mem.

La faktoj de mistifiko ne okazas sen la konscio de liaj plej altaj mentoroj, kiuj, nur tiel, lin kondukas al la efektiva vikleco kaj al la realigoj de la humileco kaj prudento en lia subjektiva mondo.

APOSTOLADO

402. – *Ĉu estas juste akcepti monan pagon por la praktikado de la mediumeco?*

– Kiam mediumo decidas transformi siajn kapablojn en fonton de materia profito, estas pli bone forgesi siajn psikajn kapablojn kaj tute ne aventuri sur la delikata tereno de la spiritaĵaj studoj.

La mona pago, rilate al la profundaj demandoj de la animo, estigas kriman komercon, de kiu la mediumo devos atendi la plej dolorajn elpagojn, en la estonteco.

La mediumeco ne estas monda ofico, kaj la Spiritoj prilumitaj de la vero kaj bono konas, pli ol siaj enkarnaj fratoj, la bezonojn de siaj perantoj.

403. – *Ĉu estas akceptebla, ke la mediumoj pensu pri la solvado de materiaj aferoj apud siaj mentoroj el la nevidebla sfero?*

– Oni ne forgesu, ke la kampo de la materiaj aktivecoj estas la sankta lernejo de la Spiritoj enkorpiĝintaj sur la ter-globo. Se al la spiritaĵaj amikoj ne estas eble rompi la leĝon de libereco propran al siaj fratoj, ne estas juste, ke la mediumo

pensu pri la solvado de materiaj problemoj apud siaj amikaj Spiritoj. La mondo estas vojo, sur kiu la animo devas kolekti la sperton, atesti la fidon, elvolvi la superajn inklinojn, koni la bonon, lerni la plej bonan, pliriĉigi la individuajn naturdotojn.

La mediumo, kiu riskas deturni siajn psikajn kapablojn al la tereno de la monda materialismo, marŝas en la direkto al la krudaj manifestiĝoj de la malsuperaj sferoj, kie li eble prenos sur sin la plej penigajn ŝuldojn.

404. – *Ĉu la mediumo devas oferi la plenumadon de siaj devoj ĉe la ĉiutaga laboro kaj ĉe la sankta medio de la familio, favore al la doktrina propagando?*

– Al la doktrinaj servoj la mediumo donu nur la tempon, kiun li povas disponi, inter la santkaj perlaboroj de la ĉiutaga pano kaj la plenumado de siaj noblaj familiaj devoj.

La plenumado de tiuj devoj estas ja sankta kaj urĝas al li ne fali sur la deklivon de la parazitaj situacioj, aŭ de la religia fanatikeco.

Ĉe la laboro por la vero, Jesuo iras antaŭ ol ĉia homa klopodo kaj neniu havu pretendon konverti iun ajn, dum ĉe la mondotaskoj ĉiam estas okazo por la necesa kono de si mem.

Neniu mediumo trompiĝu ĉe tiaj perspektivoj. Estas preferinde suferi la nekomprenemon de la kunuloj ol malobei la principojn, kaj fali en nerespondecon aŭ en penigajn konsciencoŝuldojn.

405. – *Ĉu oni povos akcepti, ke la spiritistoj sin helpu al media apostolado, por solvi ĉiujn malfacilaĵojn de la vivo?*

– La mediumo ne estu superŝutita per la postuloj de siaj kunuloj, rilate al la malfacilaĵoj de la sorto. Estas pravigeble, ke liaj fratoj sin helpu de liaj kapabloj, en esceptaj cirkonstancoj de la ekzistado, kiaj en la okazoj de malsano kaj similaj. Ĉirkaŭigi mediumon per ĉiaspecaj petoj estas tamen misuzi la taskon de amiko kaj nuligi liajn plej valorajn kapablojn, krome, oni ne devos ripeti en la sincera Spiritismo la mensan sintenon de la romkatolikoj, kiuj sin forlasas apud la “bildo” de “sanktuloj”, forgesante ĉiujn valorojn de la individua klopodo.

La spiritistaj nukleoj devas konsideri, ke ĉe iliaj laboroj ekzistas tiu, kiu ilin akompanas el la supera sfero, kaj ke ili ĉiam ricevos la spiritan kunhelpon de siaj fratoj liberiĝintaj el la karno, kaj ke la solvo de tiu aŭ alia aparta problemo dependas de la persona merito. Agi kontraŭe estas ja nuligi la mediuman aparaton, kaj doni doloran ateston pri malkompremo.

406. – Kiam esploranto penas sin helpi de la servoj de mediumo, ĉu estas juste, ke li submetu la mediuman aparaton al ĉiaspeca eksperimento, por certigi pri siaj vidpunktoj?

– Dependas de la karaktero de tiuj samaj eksperimentoj, kaj, kiaj ajn ili estas, la mediumo devas esti tre zorgema, ĉar, sur la vojo de la spiritaj akiroj, ĉiu esploranto trovas la materialon, kiun li serĉas. Kaj kiu alproksimiĝas al spirita fonto, ĝin makulante per la trompemo kaj malsincereco, tiu certe ne povas sensoifigi sin per pura akvo.

407. – Por ke iu certigu pri la spiritisma veraĵo, ĉu sufiĉas sin helpi de bona mediumo?

– Ankoraŭ ne havante valoran, seriozan konvinkon sur la tereno de la fido, la studemuloj de Spiritismo devas konfesi, ke en tiaspecaj laboroj ne sufiĉas la rimedo de bona mediumo. La peranto ne faros miraklojn en la naturo. Estas necese, ke la esploranto posedu, kune kun edifa scivolemo, neforigeblajn moralajn valorojn, kiaj sincereco kaj amo al la bono, servante al ekzistado honesta kaj riĉa je puraj faroj.

408. – Ĉu estus profita la kreado de societoj por materia helpo al la medioj?

– En Spiritismo estas ĉiam prudente eviti la iniciativojn, celantajn estigi novan pastran klason en la mondo.

En tiu aŭ alia sektoro de la homa socio, la medioj ŝuldas la saman tributon al la laboro, al la lukto kaj al la sufero, ĉiuj nepre necesaj al la havigo de ŝirmo kaj materia pano. Krome, super ĉia malfirma protekto el la mondo, ni konsideru

la protekton de Jesuo al siaj bonvolemaj laboristoj. Ĉia elmonro de sincera oferemo estas saturita de dia lumo, ĉia sincera laboro estas nobleco, kaj ĉia doloro estas lumo, kiam elportata kun sereneco kaj fido al la Majstro el la majstroj.

409. – *Kiel devas konduki la sincera mediumo, por la valorigo de sia apostolado?*

– La sincera mediumo devas kompreni, ke, antaŭ ol pensi instrui la Spiritojn aŭ siajn kunbatalantojn sur la Tero, estas necesa la prilumado de si mem per lernado, per plenumo de la plej noblaj devoj kaj per sia klopodo ĉe la perfekta asimilado de la doktrinaj principoj.

Ĉe la elvolvado de tiu tasko, li neniam malzorgu la viglecon, penante profiti la kapablon al li donitan de Jesuo, ĉe daŭra, utila laboro de edifado. Li ne devas kulturi la suferadon per nekonvenaj kaj troaj plendoj, nek sin ĉiumomente helpi de siaj gvidantoj, kvazaŭ li persite kondukus kiel malsperta infano. La studado de la Doktrino kaj, super ĉio, la kulturado de la memevangelizo estu konstantaj. La sincera mediumo povas vigli, evitante la materian aŭ sentimental-an ekspluaton, ĉiuokaze komprenante, ke, kiu la plej bezonas favorkorecon, tiu estas li mem, por ke li donu plenan ateston pri sia apostolado.

410. – *Kie troviĝas la plej granda rifo al la mediuma apostolado?*

– La unua malamiko de la mediumo sidas en li mem. Ofte ĝi estas la egocentrismo, la ambicio, la malklereco aŭ la ribeleco ĉe la memvola nescio de siaj evangeli-aj devoj, kio estas ja faktoroj de morala malsupereco, plurfoje lin kondukantaj al malvigleco, al ventanimeco kaj al la konfuzo de la senproduktaj kampoj.

Kontraŭ tiu malamiko estas ja necese movi la internajn energiojn per studado, per kulturado de la humileco, per bonvolemo, kun la plej bona memedukado, ĉe la heleco de la Evangelio.

La dua pli potenca malamiko de la mediuma apostolado ne sidas sur la kampo de la aktivecoj kontraŭaj al la disvastiĝo

de la Doktrino, se en la sino mem de la spiritistaj organizaĵoj, kiuj konsistas el tiuj, kiuj konvinkigis pri la fenomenoj, sed ne konvertigis per la koro al la Evangelio. Ili portas al la vicoj de la Konsolanto siajn personajn kapricojn, siajn malnoblajn pasiojn, malutilajn inklinojn, opiniojn kristaliĝintajn de la malmoleco de la koro, ne rekonante la realecon de siaj neperfektaĵoj kaj la malgrandecon de siaj internaj riĉaĵoj. Kutimiĝintaj al la haltado, tiuj malfeliĉaj fratoj malestimas la klopodon – unikan vojon al definitiva, sincera edifo – por sin helpi de la amikaj Spiritoj ĉe la plej malgrandaj malfacilaĵoj de la vivo, kvazaŭ la mediuma apostolado estus ia seĝo de kartdivenistino. Neka-pablaj por la interna laboro por la edifado de si mem per la fido kaj konfido al Dio, ili opinias, ke ili bezonas konsolon. Se nekontentigitaj pri siaj malnoblaj kapricoj kaj pri siaj personaj aferoj, ili estas ĉiam pretaj akuzi kaj moki. Ili parolas pri karitato, humiligante ĉiajn fratecajn principojn; ili ne konas alian intereson ol tiun, kiu nutras al ili la egoismon. Ili estas ironiaj, akuzemaj kaj preskaŭ ĉiam kondutas kiel infanoj ventanimaj kaj malkvietaj. Tiuj ĉi ankaŭ estas la konfuzelementoj, ne penetrantaj en la templon de Jesuo kaj ne permesantaj la eniron de siaj fratoj.

Tiu speco de malamikoj de la mediuma apostolado estas tre komuna kaj persista ĉe tiuj procedoj de sugestio, kaj estas nepre necese, ke la misiulo de la bono kaj lumo sin gardu ĉe la preĝo kaj vikleco. Kaj tial, ke la vero ĉiam devas aperi ĉe oportuna momento, por ke la apostolkampo ne steriliĝu, estas ja nepre necese apartiĝi de ili.

411. – *Kie troviĝas la definitiva lumo por la venko de la mediuma apostolado?*

– Tiu dia heleco estas en la Evangelio de Jesuo, kun kiu la misiulo devas esti plene identigita por la sankta plenumo de sia tasko. Sen la Evangelio, la mediumo povas liveri la plej altajn informojn al la kadro de fragmentaj filozofioj kaj sciencoj sur la Tero; li povas esti mondfama profesulo, agento de eksperimentoj el la nevideblo, sed li ne povos esti apostolo per la koro. Sole nur la sindonemo al la Dia Majstro preparas en la interno de la laboranto la fibron de prilumado por la amo,

kaj tiun de la rezisto kontraŭ la detruaj energioj, ĉar la evangelizita medio povas ja kulturi la humilecon per amo al la ĉiutaga laboro, per la prilumita toleremo, per sia eduka klopodo de si mem, per la signifo de la vivo, ankaŭ povante leviĝi por defendi sian amotaskon, defendante la veron sen malobeo al la principoj, ĉe la oportuna momento.

La mediama apostolado ne estas do nur la movado de psikaj energioj laŭ ties fenomenaj kaj meĥanikaj esprimoj, ĉar ĝi postulas la laboron kaj oferecon de la koro, kie la lumo de la konfirmo kaj de la sciigo estas ja tiu, naskiĝanta el la komprenemo kaj sindonemo al Jesuo Kristo.

NOTO

En “La Libro de la Spiritoj” de Allan Kardec, la teorio pri la ĝemelaj animoj aŭ eternaj duonoj estas pritraktita jene:

Demando n-ro 298. “Ĉu la animoj, devantaj kuniĝi unu kun la dua, estas, ekde sia origino, antaŭdestinitaj por kuniĝo? Ĉu ĉiu el ni havas, ie en la universo, sian duonon, kun kiu ĉiu estas iam fatale kuniĝonta?” ⁽¹⁾

Respondo. “Ne; neniam aparta kaj fatala kuniĝo estas inter du animoj. Kuniĝo ekzistas inter ĉiuj Spiritoj, sed malsamgrada, laŭ la respektivaj rangoj, tio estas, laŭ iliaj perfektigiĝo-gradoj; ju pli perfektaj, des pli forte kunigitaj. El malkonkordo naskiĝas ĉiaj ĉagrenoj de la homaro, kaj el konkordo rezultas kompleta feliĉo.

Poste, resumante la instruon elvolviĝanta de la §§ 291 ĝis 302, la Kodiginto ĝin ilustras per la jena persona komentario:

“La teorio pri la “eternaj duonoj” estas figuro pri la kuniĝo de du reciproke simpatiantaj Spiritoj; tio estas esprimo uzata eĉ en la vulgara parolo, kaj tial ni ĝin ne prenu laŭlitere; certe, la Spiritoj, ĝin uzantaj, ne apartenas al la alta ordo; la sfero de ties ideoj estas, tute certe, malvasta, kaj ili esprimas sian penson per vortoj, kiujn ili uzadis dum sia enkorpora vivo. Devas do esti flanken metita la ideo, ke du Spiritoj estas kreitaj unu por la dua kaj ke ili iam nepre kuniĝos por la tuta eterna tempo, post pli aŭ malpli daŭra diseco.”

⁽¹⁾ Por tiu ĉi transkribo mi permesas al mi uzi la klasikan tradukon faritan de la karmemora D-ro Porto Carreiro Neto. – **La Trad.**

Ĉi tiu cirkonstanco kaj la supozo, ĉiam akceptebla, pri iu manko ĉe la mediuma ricevado, tiel subtila kaj delikata, igis nin formuli al la mediumo, por ke li ilin submetu al sia eminenta Mentoro kaj Aŭtoro de tiu ĉi libro, la jenajn kontraŭdirojn:

“Tiu ĉi teorio, aŭ hipotezo, en tiu ĉi libro, ŝajnas al ni iom malklara. Ĝi ne kontentigas nin kaj, laŭ la formo en kiu ĝi estas prezentita, ĝi ŝajnas al ni nelogika kaj kontraŭdira. Efektive, tiu originala, duobla kreado, igas nin konkludi, ke la animoj estiĝas nekompletaj. Ĝi estas konkludo neakordigebla kun la ĉioscienco de Dio. Cetere, ĝi estas ideo refutata de Allan Kardec, en “La Libro de la Spiritoj”. La spirita alligiteco devas etendiĝi al ĉiuj kreaĵoj, kaj, se tiu binara genezo povus praviĝi, la universa komunumo neniam estus unueca kaj kompleta. Eble oni povus akcepti ĝin, kiel hazardan okazintaĵon sur la vojo de la defalintaj estuloj, sed, eĉ tiel, en provizora, kondiĉa, sed neniel absoluta karaktero. Alie, ŝajnas al ni, ĝi estus escepta dualismo, baro kontraŭa al la leĝo de amo, kiu devas enfermi ĉiujn kreitaĵojn de Dio en perfekta identeco de origino kaj celoj. Plie, nia granda Amiko kaj luma Instruanto firme asertas, ke Jesuo translimas aŭ transcendas lian koncepton. Nu, konsentite, kiel nekontraŭdirebla aserto, ke ekzistas pluraj Kristoj, ni opinias, ke la teorio aŭ sistemo de la ĝemelaj animoj komencas perdi sian karakteron universan, kaj nenecese estas konsideri ĝin.

Por ni, la problemo multe pli bone alĝustiĝas al la familiosistemo kiel provo de duhoma societo, sed ĉiam kondiĉa aŭ hazarda kaj provizora, celante la kolektivitan unuiĝon kun la Kristo, al Dio.”

Al tiuj konsideroj, la eminenta, bonkora Emmanuel bonvolis respondi per la jena mesaĝo:

“Mia amiko, Dio benu al vi la koron en la materiaj luktoj. Dankante vin pro via frata koreco en la amika, sincera kunlaboro de ĉiam, mi petas modifi la tekston de la demando n-ro 378 de la nova verko, kiu devos esti prezentata per la sekvantaj vortoj:

“Granda nombro da animoj elkarniĝintaj sub la iluzioj de la fizika vivo, iluzioj preskaŭ tute konservataj en la interno, restas kelkatempe nekapablaj kapti la vibrojn el la supera spirita sfero. Tiuj animoj estas kondukataj de siaj gvidantoj kaj elaĉetitaj amikoj al la frataj kunsidoj de la evangelia Spiritismo, kie, en la amemaj okuloj de tiuj samaj mentoroj el la nevidebla sfero, plenumiĝas la ordonoj de la leĝo de kunlaboro kaj reciprokaj bonfaroj, regantaj la vivofenomenojn en la du sferoj.”

“Atribuante al la materio certajn ĉefkarakterojn, apartenantajn nur al la spirito, mi ŝuldas la rimarkitan erareton al malordigoj en la metodo de “mediuma filtrado”, kie nia penso estis difektita.

“Petante tiun modifon, mi petas ankaŭ, ke vi konservu en la teksto la modestan komenton pri la tezo de la “ĝemelaj animoj”, kvankam, en konscienco, la amikoj el la Domo de Išmael estu devigitaj prezenti noton, obeante la lojalecon de tia respektinda vidpunkto. La tezo tamen estas pli kompleksa ol ĝi ŝajnas ĉe la unua rigardo, kaj ĝi inspiras pli longan meditado pri la tendencoj de tiu ĉi jarcento, rilate al “divorco” kaj “tutsekseco”, kiujn la malpli edifa scienco ĵetadas en la spiritojn, des pli ĉar, per la esprimo “ĝemelaj animoj” ni ne deziras diri “eternaj duonoj”, kaj neniu ĝustedire povas sin apogi al tiu eldiro por rezigni la respektindajn kompromisojn prenitajn en la elaĉeta lernejo de la mondo, riskante pliiĝi siajn proprajn ŝuldojn per malfacilaj devoj antaŭ la Leĝo. Koncerne la aferon de la Kristo, ni devas alvoki la tutan respekton por la trakto de lia dia persono, motivo, kial mi pritraktis la tezon nur rilate al la homoj, konsiderante, ke la dumvivaj kuniĝoj estas orientataj per imperativoj de amo pli profundaj ol tiuj estigitaj de la homaj konceptoj, kiuj ŝanĝiĝas sur la evolua vojo. Se eble, jen kion mi permesas al mi peti de vi, renovigante al la kara frato mian sinceran dankon kaj mian ĉiutagan amikecon.”

Emmanuel

Jen por la legantoj la noto, celanta akordigi la fidelecon de nia tuta programo kun la respekto kaj danko, pli ol merititaj, al la klera kaj saĝa kulturanto de la Kristana Kultivejo, por ke ĉiu povu interpreti kaj decidi, konsciencie, kun tiu prerogativo de libereco, kiu estas la plej granda karaktero de nia Doktrino.

La Eldonistoj (BSF)